



# LaSuda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 127 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. Januaro 1931.

## VIKTIMOJ.

originalo de Julio Baghy 237p. 4/- kaj  
6/- ĉe B.E.A.

Ne multaj legantoj de Esperanto-literaturo kontraŭdirus aserton, ke ĉi tiu romano de nia hungara majstro rajte prenas lokon inter la kelk-dudeko da originale verkitaj libroj, kiuj ial aŭ iel povus pretendi al konvena komparo, el vidpunkto de literatura valoro, kun konataj nacilingvaj verkoj.

Ŝajnas, ke la Esp. verkistoj pli-malpli nete grupiĝas sub du stilkategorioj. Estas la klasikuloj, ĉizistoj de belritmaj, velure sonantaj frazoj iom longaj, kiujn ili verkas laŭ preskaŭ timeme korekta sintakso kaj gramatiko, laŭ rigida vortkunmeta leĝo. Tiaj plumistoj mortpaliĝus je nura ekpenso naski monstretojn, kiaj amgeo (paro de amantoj), pirido (juna pireto), ielare (laŭ multe da diversaj manieroj). Ni tenas en penso sinjorojn Luyken, Bulthuis kaj Payson.

Aliflanke laboras la vortludistoj, la ĵonglistoj de l' lingvaĵo, la kreistoj de l' ĉiamnove bezonata esprimmaterialo kaj -maniero. tiuj, kiuj volus ĝislime streĉuzi la elastecon de nia mirakle fleksebla lingvo. Ĉu ni ne indikas la tradukinton de "La Cikoni-Kalifo," Jean Forge. R. Schwartz kaj Julio Baghy? Interese estus, scii kiu el la du tendencoj pli forte influas sur la Esp. leterantaron.

Kia aparta literatura merito povigis, ke Viktimoj atingu vivon en dua eldono? Ĉu pro tio, ke ĝi estas la plej faminda el tiu mikso da soldata psikologio kaj ĉefronta hororo, kion oni nomas la primilita romanaro? Ne: mankas el ĝi multe nepre ĥusta en tiaspecaj verkoj; forestas, feliĉe por la sentemulo, la spinfrostiga realeco de l' fumpeza batal-ejo, tiel korŝire priskribita en "En Okcidento Nenio Nova." Anstataŭ la

teruraĵoj de la korpo frakasado, ni sentas la koron dolore salti pro kompato al homoj luktantaj en anima turmento. Ni vagas tra la premaera barakaro de l' militkaptitoj, lokita en intern-Ruslando; ni rigardas en la samurban teatron, en kiu ludas la ĉehaj aktoramaratoroj, iagrade indulgita malliberuloj.

La kerno de la libro estas la majstre disvolvita historio de la malfeliĉa edzino de prokuroro Mozorov, Katja, jam de ŝia junulina aĝo servute fi-traktita de l' viraĉa speco, kontraŭ kiu ŝi detruie militas per la plena forto de sia volupta kaj malica naturo. Sed iam ŝi renkontas Johanon Doŝky, ĉeha elpatrujigito. Lin la feroce Katja tente amaj-celas. Tordita ne nur de memoro al edzino en fora Ĉehujo sed ankaŭ de lia amo al la por li kompatinda prokuroredzino, li batalas ĝis venko kontraŭ ŝiaj allogoj. Ŝajnas, ke la interna batalo hardas lin ĝis tio, ke li farigas preskaŭ sanktulo, sub kies bona influo Katja karaktere ŝanĝiĝadas de homtigrino en spirite ĉastan virinon, purigitan de la neatendita konduto de unu virhomo. Johano sukcesas montri al ŝi "la templopordon de ŝia animo." la belan vojon de l' vivo. Jam de tiam ŝi rifuzas plu konsenti al naŭzomoralaj artifikoj de sia riĉoficema edzo. La sceno en la karcero, kie Doŝky alvizaĝas la rikanmokan Mozorov, kiel starus fruepok-kristana martiro antaŭ leonoj; la pitoreska figuro de la altruista armeservistino Fiza, kaj de la komika marĉandisto Izur, estas ne facile forgeseblaj; ĉu pro tio, ke Baghy reproduktis ilin el la vivanthomaj foto-grafaĵoj preniĝintaj en la galeriojn de lia cerbo dum la jaroj de la militteruro?

"Taŭzita vizaĝo," "mucida rideto" estas strangaj; 122 furoro (uzita en senco "kolerego" nebone); 24/25 subunga sincereco; 229 vastaj vortoj; 60 Prenu la pantalonon kaj punkto (?); 212, Ne prenu mian menson (Ne frene-

zigu min?); 217 plumbita vagonaro ne estas tre klara; 142, pli ol duonjaro pasis, ke (de kiam) j. ricevis la lastan.

Foje Baghy eksperimentas enkondukante elipsajn formojn, ellasas pronomojn, kaj vorteton "kaj." Li, evoluiganto de la lingvo, volas, ke Esperantaj vortoj kaj vortariĝoj, samkiel nacilingvaj, jam havu por si implicitajn signifojn, neplene esprimitajn sed klare sentatajn ideojn. Jen ekzemplo de elipsa frazo: "Ivan (ne sciante) kion fari, kapitulacis. 7/13 vekigitoj (vekitoj); 171/3 pagono (?); 209/2 sintono (?); 183 ofenzivo (s); 13/17 ridige (rigide); 185/1 kare (knare); 16/23 Ankaŭ mi amas vin kaj nenio (—kaj tio ne gravas?), komparu 58/17; "Escepte" uzita neĝuste, vidu Plenan Vortaron; antaŭ-li-staranto, ekstere staranto (enmetu streketon en ĉi-lastan); li traboris sin tra la homamaso (traboris al si vojon....); neologismoj; volontoro, satisfakcio (ĉe duelo), langvoro, spektator' kopejko (kial ne la fundamenta "kopeko"?!).—Robo.

### PRILINGVAJ DEMANDOJ.

Ho en M. La "Plena Vortaro" opinias indaj je enregistro nur naŭ radikojn komencantajn per ĥ. La litero estas forte necesa, precipe por transliteri la gorgŝonon trovatan ĉe kelkaj lingvoj, ekz., la grekan X germanan ch. hispanan j.

### ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—

That the Soviet Esperantist Union has, during the last three years, distributed more than 100,000 text books on Esperanto.

That arrangements have been made for reproduction, on gramophone discs, of the voice of Dr. Zamenhof. Senor Sabadell, of Barcelona, has lent for this purpose the only cylinder of its kind known to exist.

That an island on the Danube has been officially named "Esperanto"; an iron column rises from it, with the words "Esperanto—lingvo internacia."

That the Chinese Far Eastern Rly. has published two volumes of meteorological data in Russian and Esperanto.

That the Blind Lending Library at Westminster (London) has 900 volumes in Esperanto.

That "Literatura Mondo," successor to "La Revuo", will re-enter life in

January under a guarantee of regular appearance for six years.

That the first Esp-ist group to have its own radio-station is in Melbourne. Call sign VK3CA. Mr. Hughes, 1 Vera-st., Williamstown, Melb., Australia.

That the Berlin Education Department has just introduced Esperanto into 25 elementary schools in Berlin.

That the Arnhem (Holland) town council has placed a large house and park at the disposal of the Cseh Esperanto Institute.

That the Paris Chamber of Commerce has introduced Esperanto as a compulsory subject in the higher schools for girls, and as a optional subject in the other schools under its aegis.

That the best and bulkiest technical review in Esperanto, "La Medicina Revuo," will from January appear every month, instead of every two, as heretofore. 5/- yearly, 20 rue aux Laines, Bruxelles, Belgujo.

That "Heroldo" announces imminent publication of a truly unique work—a history of the world written from an international spirit originally in Esperanto by a noted litterateur.

That 230 persons (2 p.c. of the total population) in town Kiruno, Lapland, 300 metres beyond the Arctic circle, have joined Esperanto study groups.

That Amy Johnson, at the Society of Engineers' dinner in London recently said that Esperanto should be established at all leading aerodromes and landing-stations in the world.

### BOOK NOTICE.

#### Problems of Life and Existence.

New Zealand Esperantist C. J. Adcock has published through Arthur Stockwell (London) fifty challenging pages on which are set down certain of his reflections while formulating "a theory of existence" and suggesting broad lines of approach to our many social problems. They might be regarded as leaves from his notebook, for his writing, while revealing him to be something of a penetrating thinker, are too short and unsustained to satisfy most of those who find intellectual gratification in browsing in such pasture. The ideas, however, suggested or expressed in, say, the four pages given to The Relativity of Reality or Labor's

Part could well form the groundwork for elevation to the literary dignity of essays.

Mr. Adcock urges acceptance of Esperanto. He asserts that the sentiment of nationality has been based on community of language far more than on anything else. Racial origin, in comparison, is almost a negligible factor. With peoples, social heredity is far more important than physical heredity. Culture is inherited more than blood, and culture is bound up inseparably with language. If we are to have an internationalism with a real, solid, cultural basis, we must have an inter-language.

We congratulate our samcelano on his enterprise, and trust that with his next work he may be more felicitous in his choice of a proof reader.

Price, 2/6. Copies from C. J. Adcock, Drury, Auckland, N.Z.

### KRONIKO.

**Wellington, N.Z.**—There was a large attendance at the social evening of the Wellington Esperanto Club, which took place 16/11/30 in the Y.M.C.A., Willis street, Mr. E. C. Jack presiding. The function marked the close of the club's activities for the year. The re-opening date will be 27th January.

H. King next contributed an amusing Esperanto item, "La Loterio." Mr. L. E. Dust presented an original monologue in Esperanto, entitled "La Plumisto."

The concluding item was an original Esperanto one-scene sketch, "La Vilaĝa Policano," presented by Miss Coralie Smythson, Mr. V. Leck, Masters Adrian and Malcolm Potts, and the club secretary.

This enjoyable program was closed with a supper, during which Miss Bland recited "New Zealand—My Homeland." ("Post" 17/11/30).

**Perth, W.A.**—La jarkunveno de la Westralian Esperanto Society okazis la 4an de dec-o. La pasintjara raporton legis la sek-iino. Iom post iom la membraro plimultiĝas. F-inoj M. Miller, Gibson kaj Griffin gajnis la unuan (elementan? Red.) ateston de la B.E.A., la du lastaj kun honoro.

Pro transloĝigo for de Perth nia sek-iino, s-ino E. Sainsbury, devis ekŝi sian oficon, kiun f-ino E. Griffin anstataŭe prenis. La tuta ĉeestantaro esprimis tutkoran laŭdon pro la valora laboro de s-ino Sainsbury kaj veran bedaŭron pro ŝia abdiko. S-ro H. Byatt estis elektita unuvoĉe prezidanto, kaj s-ro A. Saar vic-prezidanto. La

## TRE URĜE! REABONU VI POR 1931

A special welcome was extended to Mr. Joseph Major, a Continental Esperantist, who had that morning arrived in New Zealand. Mr. Major, who spoke in Esperanto, referred to the great progress of Esperanto, and congratulated the club on its pronunciation of the language, which was quite equal to Continental standard.

Miss G. Garty contributed a piano-forte solo, "Selections from Schumann." Mr. W. L. Edmanson recited in English "Unlucky Dick." An entertaining sketch entitled "F-ino Kolerema" was capably presented in Esperanto by Misses I. and C. Smythson and Mrs. Bertram Potts.

A pianoforte solo, "Nocturne in G," by Chopin, was given by Miss E. Duguid, which was followed by an original monologue in Esperanto by the secretary, Mr. Bertram Potts, entitled "La Aŭtoro skribas Leteron." Mr. W.

komitatanoj de nun estas f-ino Byatt, s-roj Casey kaj Miller.

Anoj alestis multnombre kaj manifestis fortan intereson pri la afer-pri-trako. Precipe rimarkinda estis informo donita de la sek-iino, ke la societo jam havas kvardek librojn por proponita biblioteko. Konsilinde estas, ke ĉiu grupo posedu kolekton da purstilaj Esp. verkoj.

Entute ni pravos esperi al sukcesriĉa novjaro. Tion ĉi spertu ĉiuj Esp. rondoj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando, ankaŭ en la tuta mondo.

La anaro ĉeestis vespere por adiaŭi s-inon Sainsbury. S-ro Casey esprimis al la gasto elkorajn bondezirojn nome de la geanoj kaj dankis ŝin pro ŝia sindonema laboro. Por montri al la sinjorino kiel la tuta anaro sentis pri ŝia senlaca servado sekretariina, s-ro Casey pere donacis al ŝi lede bnditan libron, kiel memoraĵon de kunlaborantoj.

SinJORINO Sainsbury trafe respondis kaj dankis la anojn, dirante, ke ŝi nur faris sian eblon, same kiel ĉiu seriozulo penadas por disvastigi nian lingvon. Post iom da muziko kaj ludoj la ĉes-tantoj ride kunbabiladis antaŭ ves-permanĝo kaj gaja foriro. Dimanĉon, s-ro Colin Unwin bonkore invitis la geanojn viziti lin ĉe lia semajnfina dometo en la montetoj. Multaj samideanoj tien iris por ĝui la gastemecon de s-ro Unwin. Plejparte la vizitan-toj kaptis la okazon por sin ekzerci je nia lingvo. Tutkore ni dankas al la s-ro pro lia afableco.

**Melburno, Vik.** — S-ro C. Ballard ĉeklube rakontis pri dusemajna ferio, kiun li faris en novembro. Lasinte Melburnon aŭtomobile li ĝisiris al Bairnsdale kaj poste la ĉarma Lakes Entrance, kie li tranoktis. Sekvintmatene li atingis Nowa Nowa kaj la indiĝenan rezervejon ĉe Lake Tyers. Ĉe Rivero Cann tagmanĝinte, li alvenis al Genoa kaj Twofold Bay, kie oni industrie kaptas balenojn. Li vizitis Narooma, pitoreskan lokon, ankaŭ Nowra, apud Rivero Shoalhaven. Ĉe Bega sidas soldata memorŝtono, iom similanta al la Arc de Triomphe en Parizo. Elirinte Wallengong, li baldaŭ trafis Sidnejon, kie li pasloĝis 2-3 tagojn. Li priskribis tieajn konstruaĵojn, kaj viziton al la Jenolan Kavernoj. Helpe de fotografiaĵoj li bone ilustris la atentotiran paroladon.

F-ino Sinnotte kaj la anoj de ŝia grupo vizitis la Melb. Esp. Soc. en ties nova ĉambro, kaj ĉiuj spertis feliĉan vesperon.

F-ino Cox, kiu feris en novembro, rakontis al klubanoj iom pri sia ekskurso. Per multo da fotografiaĵoj, ŝi montris al anoj la belecon de Adelaide, kaj la interesriĉan veturon sur Rivero Murray ĝis Mildura. Mallonge restante ĉe Berri, Renmark kaj Wentworth, pasaĝeroj travagis la urbojn elserĉante interesaĵojn. Post dutagresto en Mildura, nestanta meze de orangarbe vestitaj teroj, vinberejoj kaj konstruaĵoj por pak- kaj ekspedado de fruktoj, f-ino Cox revenis Melburnon.

### INFORMO AL PUBLIKO.

La Suda Kruco estas presita ĉiunomate en nombro 400. Oni dise sendas 250 al diversaj partoj de la mondo. Tri fojojn en la jaro oni presas po 600, por ekstra ekspedo al anoj de la Nov-Zelanda Esp. Asocio, kiel ĉi ties bul-teno.

### TO OUR SUPPORTERS.

Many thanks for their encouragement through the past year! May 1931, in spite of inevitable difficulties that lie in it, mark a further consolidation of "La Suda Kruco" as the organ of a healthy, progressive fellowship of Australian Esperantists. We acknowledge the following:

Mr. A. Saar, 5/-, julio '31; Mr. J. Sayers, 4/6, dec. '31; Mr. G. Woodhall, 5/-, dec. '31; Mr. C. Ballard, 9/-, dec. '32; Dr. F. Williams, 4/6, dec. '31; Mr. W. Waterman, 4/6, dec. '32; f-ino W. Trundle, 4/6, nov. '31; Sales 8d. Ensume: £1/17/8.

### KURSO PER TRADUKADO

(kondukata de s-ro George Gordon, F.B.E.A.; sek-iino, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melb., E.10.)

### TRADUKO 14

#### KAPITANO CHARLES STURT

.... Aŭtoro kaj Landesploristo. ....  
(daŭrigata)

Fine (1) ili atingis la riveron (2) Darling ĉe loko en distanco de naŭdek mejloj de tie, kie ili la unuan fojon ĝin vidis kaj pli supre de la rivero. Sturt ĉagreniĝis trovante ĝin ankoraŭ sala. Esplorado de la ĉirkaŭa tero pli mal-kuraĝigis Sturt'on, kaj antaŭ ol returne (14) ekiri li skribis en sia taglibro, ke la tutan tagon ili vidis "nek folion da (3) herbo nek guton da (3) freŝa akvo. Ni ne plu (4) vidis postesignojn de indiĝenoj. La regiono ŝajne estas dezerto, kiun tiuj neniam eniris, kaj en kiu ne troviĝas eĉ birdo."

Ankoraŭ restis mistero, ĉu ekzistas aŭ ne ekzistas internlanda maro, kaj en la jaro mil-okcent-dudek-naŭa Sturt jam (5) nun estro de bone ekipita ekspedicio, denove turnis la vizaĝon al la internlando, havante kun si George MacLeay'on (pron. ĝorĝ mak-lej) kiel subestron. En la daŭro de kelke da (6) tagoj ili marŝis flanke de la rivero Murrumbidgee (pron. morom-biĝe) sed kanoj kaj marĉoj ankoraŭ unu fojon (15) malebligis ilin, iri pluen sur seka tero. Ili kunmetis (7) la partojn de la balena boato kaj faris boate-ton, kaj je la sepa horo en la mateno de la sepa de Januaro la sep homoj de la Sturt'a ekspedicio komencis sian epopean boatvojaĝadon sur riveroj. La sekvintan tagon (8) dronis la boateto kune kun la manĝaĵoj (9). Savinte tion, kiom ili nur (10) povis, ili pluen remis kaj post unu semajno rapide por-

tigis en larĝan, imponan riveron. Sturt sentis, ke fine li ricevis rekompencon por ĉiuj siaj penadoj kaj ĉagrenoj. Li nomis la riveron Murray (pron. morej) laŭ la nomo de Sir George Murray. Post ne longe minacis (11) ilin malamikaj indiĝenoj, kaj sangoverŝo ne okazis (11) nur pro ĝustatempa interveno de kvar aliaj indiĝenoj, kiujn jam antaŭe Sturt traktis bonkore. Post tri semajnoj la malgranda ekspedicio, kun preskaŭ elĉerpitaj fortoj pro senĉesa remado, vidis la finon de la rivero, kiu fluis en lagon, kiun li nomis Alexandrina. La fino ne estis tia, kian esperis Sturt, kiu skribis: "pro tio (12), ke tajdoj tiel malmulte influis (11) la lagon, mi tuj vidis, ke verŝajne ni ne povus trovi praktikan komunikejon kun la oceano." Nenio farebla krom tio, returne (14) veturi laŭ la malfacilega vojo de ilia veno. Ĝia sukceso estas senmorta atesto al la lerta estreco de Sturt. Kvankam ĉiuj estis malfortigitaj de senŝirmeco, malsato kaj troa laboro, tamen neniu murmuris. Unu el la remistoj, pensante, ke Sturt dormas (13), diris, "mi devas morgaŭ sciigi al la kapitano, ke mi ne plu (4) povas remi." Tion li diris, tamen la morgaŭan tagon li remis ĝuste kiel antaŭe. La laŭdado de posteuloj estis la unua honoro al tiu heroo. Li estis punlaborulo, kaj oni remetis lin en malliberecon post kiam la bravegaj ekspedicianoj, malgraŭ malsano kaj malsato, trabatis al si vojon al civilizejo por sperti sendankecon. Eĉ Sturt'on mem oni sendis (11) kun lia regimento al New Norfolk (pron. nju norfok), kie la malseketa klimato pli malsanigis lin. En la jaro mil-okcent-tridek-kvara Sturt, preskaŭ blinda, returne (14) iris Anglujon (2), kaj tie publikigis sian unuan libron. En la jaro mil-okcent-tridek-kvara, post tempo de tuta blindeco, vidkapablo iom post iom revenis al li. Li edziĝis al Charlotte Green (pron. ŝarlot grijn) en Dover.

En mil-okcent-kvardek-kvar Sturt denove sin trovis en Aŭstralio kiel komisaro de ŝtataj teroj kun definitiva instrukcio, esplori la mezon de Aŭstralio. (daŭrigota).

#### NOTARO 14.

1. "Fine" (ne "eventuale").—2. Akuzativo de loko, al kiu oni iras. Cox 68 (3b).—3. Ĉi tie "folio" kaj "guto" havas figuran sencon de mezuro, tial "da".—4. "ne plu" aŭ "jam

ne." L.R. pĝ 65.—5. "jam" ĉi tie akcentas la ŝanĝon, ĉar la antaŭa ekspedicio estis nebone ekipita. La Angla ekvivalento estas akcentata "now".—6. "kelke da". Notaro 11/2.—7. Rimarku la konstruon kun aktiva verbo por eviti pasivan formon kun kunmetita tempo (boato estis konstruita).—8. Cox 68 (3b).—9. Eble ĉi tie "provisions" havas pli vastan signifon ol "manĝaĵoj".—10. "nur" antaŭ "povis" signifas, ke la ago estis ĝis la limo de la povo (as much as ever they could). Kp. F.K. 114/9, Gen. 44/1. Mart. 96/6, 140/17.—11. Vidu noton 7.—12. "pro tio, ke" aŭ "ĉar" aŭ "tial ke".—13. "dormas" (ne "dormis") Cox 219, 221.—14. Zam. ĉiam uzas "returne" (ne "returnen") ĉar la vorto mem enĉi havas la ideon de almovo. Vidu F.K. 63/13, 145/6, Gen. 43/12.—15. "ankoraŭ unu tojon," once more, yet again.

#### PLI DA RESPEKTO!

"Adreslibro de filatelistoj," eldonita de Ladislao Lekowski, Piastow, a/Varsovio, 32p. 2ŝ. Ĉi tiu libro por poŝtmarkuloj estas honta ekzemplo de komencula fuŝo. Plejparte pollingva. La Esp. parto preserare plenplenas; manke ĉapelhavan literaron la eldoninto ignoris la Zamenhofan anstataŭilon (la postan h, aŭ apostrofon), uzante haosrezulte nur la simplajn literojn. Oni promesas netan duan eldonon. Espereble oni atingos tion! Sinjoro L. eldononta direktu la okulojn sur la modele redaktatan Tutmonda Kolektanto anoncitan en nia septembra numero. Ni respektu nian lingvon! (Robo)

#### ESPERANTO POR INFANOJ.

Dediĉita al la infanoj de la mondo, ĉi tiu eldonaĵo estas ĝustpriskribe leglibreto por komencantoj. Ne utile uzebla seninstruiste; memlernanto devas studi ĝin kun gramatiko. En ĝi troviĝas nenia priregula klarigo, oni renkontas nenie kunmetitan verbtempon. La komencaj ĉapitroj titoliĝas jenekzemple: La Verda Pomo, La Porkoj Poste la aŭtoro donas pli da celhaveco, nomante ilin, "leciono pri -ej. -il" k.c. Neŝuste lokmetita inter lecionoj pri afiksoj sidas ĉapitreto sub "Gramatiko." Ĉi porinfane pritraktas la simplan verbtempon, jen ĉio. La verketo estas senmetoda kaj mankoriĉa. Mirinde, ke ĝia eldoniginto, s-ro Gladstone Solomon, ne pli trafe ĝin nomis, Unua Leglecionaro Porinfana, aŭ Enkondukaj Lecionoj en Esperanton. 9. Ne estas

lecionoj je (en) dimanĉo. 22. Ne manĝu verdajn pomojn denove (neniam plu) 24/28. Tie estas multaj belaj glanj-oj (multe da); 46. J. lernis ĉi tiun poe-meton post 5 min. ("en la daŭro de, aŭ, antaŭ ol pasis"); 49. Iun tagon J. havis malbonan kataron. (fortan mal-varmumon?); "Floti." Konsilinde estas, ke oni uzu nur oficialajn radikojn en lernolibro. 67. Estas plaĉe, rimarki distingon inter "devas ne" kaj "ne devas." 68. "pojn-horloĝo" (!), aŭto (aŭtomobilo). "ĉiuj la musoj"; grava difekto precipe en lernolibro.

Prezo 1/6 ĉe BEA.—(Robo).

### PRI LA SUFIKSO „END“.

La sufikso -end' ankoraŭ ne estas oficiale aprobita, tamen jam nun tiom multe uzata (eĉ en rondoj lingve tre konservemaj), ke supozeble la oficialigo okazos baldaŭ.

Parenca al -end' estas la finaĵo de la pasivo -ot'. Komuna ĉe ili estas la fakto, ke ambaŭ estas direktitaj al la estonto kaj ambaŭ estas pasivaj; diferenco estas, ke -ot' konstatas simple la fakton, ke io baldaŭ okazos, -end' kontraŭe enhavas neceson, devigon. Ekzemploj: La letero estas skribota; mi konstatas, ke post iu tempo mi skribos ĝin, sed ne diras, ke tio ankaŭ certe okazos. Por pravi tion mi diras: Kiam la letero estis skribota, mi konstatis, ke mankas al mi ideoj kaj mi rezignis. Sed se mi diras: La letero estas skribenda, tiam mi konstatas, ke pro iu ekstera deviga kaŭzo mi devas ĝin fari, per aliaj vortoj: La letero estas nepre, certe skribota. Alia ekzemplo: La kotizo estas pagota komence de la jaro; tio signifas, ke mi simple konstatas la fakton. La kotizo estas pagenda; mi asertas, ke mi devas ĝin pagi, se mi volas resti membro.

Do la difino por -end' estas jena: Ĝi signifas, ke io devas esti necese farata en baldaŭa estonteco. Rememorigi necesas, ke -end' havas nur pasivan sencon, do sekve estus erare diri: Mi estas skribenda leteron; ĉar la letero estas skribenda.

Oni povas formi jenajn derivaĵojn: Multaj farenaĵoj min atendas. Oni

ĉiam prezentis al ni la imperiestron kiel adorendulon. Longe mi hezitis, sed nun la afero plenumendiĝis; kaj simile.

(El "La Socialisto," Vieno)

### LA ĈINA LINGVO.

Unu el la plej malfacilaj lingvoj en la mondo estas la ĉina lingvo. Ĝi estas unusilaba, t.e. la radikaj vortoj konsistas el unu silabo kaj tiuj ĉi vortoj estas neŝanĝeblaj, ĉar la ĉinaj vortoj ne havas la diferencon inter ununombro kaj multenombro kaj ankaŭ ne havas konjugacion aŭ deklinacion. La sama vorto krome povas esti substantivo, adjektivo, verbo, adverbo; tio tute dependas de la loko en la frazo.

Fari novajn vortojn per prefiksoj aŭ sufiksoj estas neebla en la ĉina lingvo. Plie estas la nombro da radikvortoj ne tre granda; ĝi varias inter proksi mume 450 kaj 700, laŭ la dialekto.

Sed kiel oni povas esprimi siajn pensojn per tiel malmulte da vortoj? La malriĉeco je vortoj estas kompensata de la diversaj tonoj, laŭ kiuj oni prononcas la vortojn. La sama vorto povas havi kvin ĝis ok signifojn se ĝi estas dirata laŭ alia tono. Pro tio ankaŭ oni ne parolas la ĉinan lingvon, sed kantas ĝin.

Kompreneble ekzistas en lando, tiel vasta kiel Ĉinujo, multaj dialektoj. La diferenco inter ili estas tiel granda, ke ĉinoj el la suda parto de la lando ne komprenas la loĝantojn de la norda parto, kaj okazas eĉ, ke anoj de la sama provinco, sed loĝantaj en diversaj urboj, ne komprenas unu la alian.

### KIAL LA AŬSTRALIAJ INDIĜENOJ RESTIS SOVAGAJ.

Kial propra civilizacio ne evoluis ĉe ili? Pastro Love, misiisto en okcidenta Aŭstralio, asertas, ke naskiĝo de ia civilizacio estis ĉiam ne-ebla ĉe la indiĝenoj de Aŭstralio.

En primitiva Aŭstralio ne ekzistis manĝeblaj, kultiveblaj vegetaĵoj, per kiuj povus vivi granda popolo. Ne ekzistis bestoj, kiujn oni povus utiligi je la terkultivado kaj simila laboro.

## HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

## Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

Mangkreskaĵojn kaj brutojn nur la blankhomoj enkondukis en historia lastatempo. La nigruloj devis pene vivadi en mizera kaj malsatiga lando, kies nenia loko povis provizi nutron dum eĉ longeta tempo; ili do devis konstante vagadi, serĉante la vivrimedon. Ankaŭ la virinoj, pelate de la vivbatalo, ofte devis fari longajn piedirojn en malfacilaj vojoj kaj severa vetero, kaj tial ne disponis sufiĉe la tempon necesan por la sana edukado de infanoj. Infanoj foje detruigis, ne pro manko de gepatra moralsento, sed ĝuste pro kruela devigeo de la sorto.

Resume, la indiĝenoj ne povis plenigi sian landon per grandnombra loĝantaro; ili ne povis loksidiĝi en la daŭro de sufiĉe longa tempo por ellaboradi al si stabilan socion. Male ili dis-erigis en diversajn tribojn, kiuj parolis tute malsamajn lingvojn. Primitivaj homoj ili restadas ne pro malalta inteligento, sed tial, ĉar mankis al ili oportuna vivmedio taŭga por ebligi ilin atingi nivelon de mensa kulturo kaj civilizacio egala al tiu de aliaj popoloj.

### HOMOJ DE LA SOVAĜEJO

kaj iliaj fidelaj hundoj.

el "The Sun" (Sydney) de la 1a de Majo, 1926.

El la Angla lingvo tradukis George Gordon, F.B.E.A.

Oblikve falantaj radioj de la suno donis kuprecan brilon al soifanta ebenaĵo. Pro la varmego la aero super "claypan" (1) trembrilis kiel dezerta fata-morgano.

Oscedis grandaj fendoj en la tero, kaj sub la nepalpebrumanta rigardego de la suno la senmove staranta akvo jam malpliigis ĝis bruna lageto, brilanta kiel Ciklopa okulo en la flava ebenaĵo.

Proksime de areto da polvokovritaj "cotton-bushes" (2) armeo da "soldat' formikoj" kaj "buldog' formikoj" (3) avancadis, malfaldiĝadis en linion, retiriĝadis. El ĉiu fendo en la sunbruligataj deklivoj de la kava tero venis tiuj ŝvelaj, anasirantaj, brunaj insektoj.

Tra la subteraj koridoretoj kaj galerioj de la formikejo apud la tonto de la rivero Barcoo antaŭe zumis la vorto, signalo, senfadenaĵo, flustro aŭ kio ajn, per kio la formikoj interkomunikiĝas. Apude troviĝis mangaĵo, kaj la formika armeo amasiĝis por la testeno.

Sub la ardanta suno kulis "swagman" (4) spasme spirante, senĉapela, senbota, malsatega, preskaŭ mortanta.

Tiu bruna kvazaŭ vivanta tapiŝo minace avancadis al la disetenditaj brakoj de la kuŝanta homo, dum ree kaj ree batfalis sur ĝin unu vila piedo de fidela hundo, kiel sur grenspikojn falas draŝilo. Polvo leviĝis, branĉetoj kraketis, sekaj folioj dispeciĝis. Ree kaj ree retiriĝis tiu bruna tapiŝo de morto kun ŝiritaj, ĉifonitaj franĝoj, kaj post ĝi restis polvovestitaj kadavroj, en la flavan teron batitaj de la vila piedo.

Brilante sub la sunaj radioj, tiuj brunaj batalionoj ree kaj ree avancis al la vojaĝlacaj kruroj kaj ilia ĉifonita, katuna pantalono. Sed ĉiam peze sur ilin batfalis la vila piedo en disflugigo de polvo. La batalionoj disrompiĝis kaj torkuris, lasante post si sennombro da disbatitaj kadavroj. De tempo al tempo tra la nebuleco, kiun naskis la varmego, ehis altatona bojeto, kaŭzita parte pro spito al la atakantoj kaj parte pro timo pri la suferanta mastro.

Tiamaniere dum longaj varmegaj horoj Spider, malgranda "Kelpie" (5) defendis sian mastron kontraŭ la atakoj de la formika armeo.

Kelkajn mejlojn sur la sunbakita ebenaĵo du aliaj vojaĝantoj sekvis la paŝosignojn de grandaj botoj kaj malgrandaj piedoj. La linio de paŝosignoj perdiĝis inter la aroj da "cotton-bushes," kiuj kvazaŭ gardostaris super la "claypan" for de la ĉefa vojstreko, kondukanta de Springside al la rivero Barcoo. Tamen troviĝis signoj, kiuj ŝajne kondukis la du vojaĝantojn al tragedia sceno. Unue troviĝis boto, due malplena akvosako, trie ĉapelo, kvare sako de mangaĵo, kvine dua boto, kaj fine polvokovrita "swag." Ĉio tio ŝajne signis la vojiradon de iu soleca

### PERCY HOLMES

ELEKTRISTO KAJ RADIISTO.

212 NOONE-STR., CLIFTON HILL.

Prezentas al vi novan radi-aparaton. La "VERDASTELO" maŝino estas speciale konstruita por la Esperantistaro, kaj estas havebla laŭ diversaj ampleksoj, kiuj entenas de du ĝis ses valvoj. Aŭskultu ĝin en propra hejmo via!

MEMORU—POR ĈIO ELEKTRA.

Telefonu: JW 4017.

"swagman" al lia morto sub la senindulga suno. Trairinte la aron da "cotton-bushes" en tiu varmega posttagmezo ili trafis tiun ekzemplon de hunda fideleco apud la bruna "claypan."

Neniam sciiĝis, kiel longatempe Spider rebatadis tiun brunan armeon da kruelegaj formikoj. Ĝi obstine eltenis; la malgrandaj okuloj ekflamis, la felo hirtiĝis, la dentoj ekbrilis. Ĝi ree kaj ree saltis trans la sterniĝintan korpon de la mastro, kaj per sia mortiga piedo frakasis la antaŭgvardiojn de la formika armeo ĉiufoje, kiam ili kuregis trans la seninsektigitan spacon por ataki la senfortiĝintan kuŝanton.

Spider faris polvan, neŭtralan zonon ĉirkaŭ la "swagman," kaj en tiun zonon venis neniuj formikoj krom tiuj, kiuj agoniante sin tordis en la polvo. Daŭre de horoj la malgranda hundo sopiris al trinko. En distanco de kelke da metroj estis akvo, tamen neniam la hundo sin movis for de sia gardostaro ĉe la mastro. Nur tiam, kiam venis helpo, kaj oni levis la mastron el la rondo de minacantaj formikoj, Spider volis trinki.

(finota)

### TERMOMETROJ.

(El Verdkata Testamento de R. Schwarz).

Se vin mallaŭdas la kritiko,  
Se vin atakas konkurenc',  
Se kalumnias vin amiko,  
Nu, ĝoju pri la konsekvenç',  
Ĉar ĉio tio ja signifas,  
Ke vi vivas !.....

Se bonon pri vi ĉiuj diras,  
Kaj nur parolas pri merit'  
Se ĉiuj ŝajn-sincere miras:  
"Ho kia viro ! kia spirit'"  
Videble oni florojn portis,  
Ĉar vi mortis !.....

### ITALIAN OR ESPERANTO?

Charles is writing:—...filo, caro, via, frate, presi, doni, ero, servo, due, tre, io, sono, prete, lui, ago, male, volo, peli.

Peter: I am indeed glad, Charles, to see you learning Esperanto.

Charles: Esperanto! Why, I'm doing exercises in Italian.

(Translation of the above Italian words, which are also Esperanto forms with different meanings:—fadeno, kara, vojo, monako, (mi) prenis, donacoj, (mi) estis, servisto, du, tri, mi, estas, pastro, li, kudrilo, malbono, flugo,

haroj).

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Me'burna Esperanto-Societo**, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.





# LaSuda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

**N-ro 128 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Australio. Februaro 1931.**

## ANDREE STORY IN ESPERANTO Covers Civilised World.

Flying to the Pole in 1897 was a much more dangerous undertaking than it is now. Wireless, of course, was unheard of. The more meritorious, therefore, is the courage of the Swede Andree, and his two companions, who in that year attempted to reach the North Pole.

In Sweden Andree has become quite a mythical figure. In song and story his countrymen have, for the last thirty years, talked of the hero who flew towards the North Pole and was swallowed up.

Then, some six months ago, a Norwegian scientific expedition chanced on the place where Andree and his companions slowly perished. There also they found the famous diaries, so that one can now follow the doomed men day by day, hour by hour, first in the balloon, then in their struggle against ice, snow and Arctic seas.

When it was blazed abroad that Andree's last camping place had been discovered a sensation ran through the civilised world, for up till then that first air voyage had been wrapped in impenetrable mystery. The intense public interest called for a complete description based on the notes made by the actors in one of the most dramatic enterprises of modern times, so, on 25 Nov., appeared the complete story in eleven languages, one of which was Esperanto. The publishing of the work in the interlanguage has made it possible for Esperantists in over 70 countries to translate it into their tongues, even into Malayan or Icelandic.

This Esperanto translation was made by Stellan Engholm, the young Swede whose original novel "Al Toronto" received admiring comment from over thirty countries. It has over 400 pages,

and 115 photos which are unique in that they were rescued from polar ice in which they had lain for 30 years. Only the careful attention of a photographic scientist enabled them to be developed.

To finger the pages confirms the impression on the eye of the volume's combined elegance and solidity. One will find in them not only a vivid description of a hazardous exploit but also much valuable scientific information garnered by the ill-fated expedition. In Sweden the first edition (30000) was sold the first day.

The price of the Esperanto edition (10/- paper; 12/6 board, 6d. post.) is cheaper than the Swedish edition. The English costs 21/-. Publishers are the Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1. Order through B.E.A.

## ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned:

That the first vol. of a series of Esperanto guide-books published under the ægis of the powerful Italian Touring Club, "Milan and the lakes of Lombardy," is almost ready. It will have 120 pages, 8 maps and 9 colored plans.

That Miss Odette Piau won the Esperanto type - writing competition in Paris. In a five-minute test she beat 29 competitors. Her strokes totalled 2,099.

That there are over 200 Esperanto-speaking tramwaymen in Stockholm.

That the municipality of Bratislava (Czecho-Slovakia) has named a street after Zamenhof.

That Esperanto has been introduced into the trade schools of Linz (Austria). Some 350 pupils are learning the language. Salzburg will follow.

That a plate honoring Dr. Zamenhof has been set into the wall at the corner of Piotrkowska and Zamenhof streets

in Lodz (Poland), as a mark of esteem from the town's citizens.

### ŜATESPRIMO ŜATATA.

Por nia modesta entrepreno venis nepetite la jena karto el Parizo. Ĝia kelklinia enhavo vere kuraĝigas, krediĝante nin, ke la S. K. nutras almenaŭ iomete le penson al la ĉefa kontrolinto de la komuna lingvaĵo ĉe la Plena Vortaro, la kompilinto de la valorega Franca-Esperanta vortaro kompleta, k.s. verkoj.

15/12/30.

### Altestimataj Samideanoj.

Denove dankante al vi pro la afabla regula sendado de La Suda Kruco, kiun mi ĉiufoje legas kun aparta intereso kaj plezuro, mi petas, ke vi bonvolu notian transloĝigon. Mia adreso estas nun: 7 rue Bonaparte, Paris 7.

Kore via

Prof. E. Grosjean-Maupin.

### KRONIKO.

**Brisbano (Kvislando):**— Kvankam mankis raporto, la Brisbana societo estas en lastatempo sufiĉe agema.

En la Metodista preĝejo de la antaŭurbo Wilston oni prezentis propagandan koncerton, dankon al la klopodoj de nia ano sinjoro W. Baker, kiu mem faris paroladon pri nia afero. Fraŭlino Rose Macpherson deklamis "Ho, Mia Kor'", kaj antaŭ la deklamo membro legis mallongan tezon de sinjoro Klement Kidd pri la deveno de la poemo. Sinjorino Vitoŝinki faris nelongan paroladon en Esperanto pri Esperanto, kiun tradukis laŭfrazo ŝia edzo; kaj ŝia kelkfoja nekontento pri la traduko ne malplaĉis al la aŭdantaro. Poste sinjoro Vitoŝinski parolis angle pri religia kaj socia vivo en Ruslando. Aliajn kantojn kaj deklamojn faris en Angla aŭ Esperanto sinjorino T. Benussi kaj fraŭlino Grace Brown. Akompanis la kantantojn fraŭlino Gertrud Carrick.

Por monhelpi la societeton, oni aranĝis, laŭiniciate de nia ano sinjoro S. L. Parry, en la Kumalong-klubo, du dancojn, kiuj alportis notindan profiton.

Pri nia Zamenhoffesto, bonvolu legi apartan raporton.

**Melburno, Vik.**—Ĉe la Esp. Klubo merkredon, la 14an de jan-o. s-ro Hussey, en ridanta humoro, priparolis sian vojaĝon al Oksfordo. Li akcentis faktan, ke la lingvaĵo de la Esp-aj prelegistoj ĉe la Somera Universitato estis por li ĉiam facile komprenata, eĉ tiam,

kiam la fakuloj pritraktis la plej profundpensajn tezojn, kia ekzemple tiu de prof. Migliorni pri la komplikajtoj de l' modernaj lingvoj, aŭ tiu de la muzikisto prilumanta la "nekonatan Mozart." S-ro H. laŭdis fortadmire la instrumentodon de pastro Ĉe, kiun li nomis vera miraklisto Esperantistiganta. Ĉe Oksfordo la rumano, post nur momentoj, jam paroligis Esperanton al tute ne-esperanta publiko, ne uzante eĉ vorton anglan! S-ro H. diris, ke tremvibroj de vera fiereco trakuris lin, kiam li devis traduki antaŭ fremduloj la vortojn sur la ŝtono ĉe la tombo de Shakespeare, kaj tiujn en la dometo Hathaway. Unu franca s-ino, post plezura tempo sub la afabla gvidado de nia sam-o, koleriĝis akre pro la loĝaranĝo en Oksfordo, kaj rapidis for en sialandon, figure sputante sian malplaĉegon. Bedaŭra afero, pri kio ni kulpigas la francan temperamenton.

S-ro H. flugis al Koln (3½ horojn), kaj tuj falis en veran inferon de malkomprenebleco. Germana lingvo ĉie. Pere de UEA libro li atingis akompane de s-ro Pyke s-ron T. Jung ĉe Heroldo. Ĉi tiu aferoplena bonkorulo prete ekiris kun ili por uzi plezure la posttagmezon. Ĉe la Kolna klubo ili rimarkis la biertrinkadon kaj la hejmiron brak-enbrakan je la 1.30 matene.

Malgraŭ la ofta diro, ke la anglan oni komprenas, eĉ parolas, vaste en Berlino, s-ro H. trafis tie nur malfacilegon pro sia nepovo uzi la germanan. Resto dusemajna ĉe riĉkora germana familio donis ĝuplezuron nur pro la Esperanteco de la du filoj. Gepatroj sidis mute, sciiĝante pri la aŭstralia vizitanto ĉiam pere de la fila traduko. Al Jena, Stuttgart, Lucerne, Geneva, kie li vizitis la faman bibliotekon de interlingvo ĉe UEA, Parizo, kie denove langa paraliziĝo trafis sur lin. Efika kuracisto estis finfine trovita Esp-istino franca, ĉe kiu li feliĉe regajnis sian aplombon kaj rajtan dignon. Tiam al Londono kaj ties klubo, kie oni nepre paroladas nur Esperanton, kaj tre bel-flue.

La paroladintón la anoj kore aplaŭdis pro lia bonhumora rakonto.

**Wellington, Nov-zelando.**—La Esp. klaso rekomencis la 27 Januaro sian funkciadon por la jaro 1931 post mallonga interrompo dum la festtagoj. Alian sukceso-plenan jaron!

La 30 Decembro, per la vaporŝipo "Makura" foriris al Filadelfio, Usono,

la familio McGuigan. Bedaŭrinde, per tio la N.Z.E.A. perdis tri el siaj anoj estimataj, kiujn multaj memoros kiel gepartoprenintojn en la Unua Esp. Kongreso (Wellington, Januaro, 1930). Al ili prosperon en nova lando.

#### Zamenhoffesto en Brisbano.

Vere brila sukceso estis la Zamenhoffesto de la Brisbana societo en la kafejo Ann Hathaway en 15-a de decembro. Ĉeestis kvindeko da samideanoj kaj amikoj, kaj regis gajeco kaj ĝuo. La sukceson oni dankas al la laboro de la sekretariino, fraŭlino E. B. Carrick kaj ŝiaj helpantoj.

Post vespermanĝo ĉe ornamitaj tabloj kun menuoj en Esperanto, oni aŭdis per radio paroladon de la prezidanto (sinjoro Hyde) el la ĉefa radistacio 4QG. Sekvis bona programo de kantoj kaj deklamoj, ĉefe en Esperanto, kaj instrumenta muziko. Notinda estis la deklamo de propra originala poemo (en Angla) de fraŭlino Rose Macpherson pri la vivo de Zamenhof.

Oni donis premiojn al la lernantoj de la kursoj; kaj al fraŭlino Carrick, kies energio kaj senfina sindono estas la ĉefa risorto de la societa agado, la anoj donacis belan vitran horloĝon.

Poste oni dancis.

Bonaj raportoj aperis en ĉiuj kvar taggazetoj.

#### COBURG'A ESPERANTO-KLUBO. (vidu No. 115 S.K.)

Septembron 1929 oni fondis la Coburg'an E. Klubon. S-ino Anne C. Hintze, tiame prezidanto de la Coburg'a filio de la Aŭstralia Laborista Partio, ricevis permeson tiucele uzi ties ĉambregon kaj senpagan lumon, sed ĉar aliaj kluboj uzis la ĉambron, estas eble nur ĉiun duan jaŭdon tie instrui, kaj pro tio lernejo s-ro Wilson disponigis al ni kunvenejon en ŝtatinstruejo. Tiu aranĝo daŭris ĝis dec. 1930. La instruantoj estas: S-ro G. Burns, D.B.E.A., hon. sek.; s-ro A. Spencer, s-ro C. Shanahan, s-ro N. Perkins, D.B.E.A., kaj s-ino A. Hintze, de la Melb. Klubo. S-ro Perkins meritas riĉan dankon de la Coburg'a klubo pro sindona instru-servo. Jam de starigo ĝia, li vojaĝas al ĝi de Clifton Hill por gvidi kursanojn. Senlaboreco forpulis el Coburg kelkajn anojn, malgraŭ tio ĉi dudekok lernantoj ĉiusemajne kunvenas — tre kuraĝiga por la gvidantoj. Tre interesajn fotojn, p. kartojn kaj gazetojn ricevas la lernantoj el alilando. El la

gazetoj, la "Sennaciulo" estas precipe interesa. Estontece la klubo kunvenos ĉiun jaŭdon ĉe la Laborista Halo, Sheffield-str., Coburg. Bonvenon al ĉiuj, kiujn Esperanto interesas.

#### KORSALUTON

al F-ino Coralie Smythson, Vic-prez. de la Wellington'a (N.Z.) Esperanto Klubo, kiu antaŭ ne longe trapasis kun honoro la por-diploman ekzamenon de la B.E.A. — imitinda ekzemplo, kiun, espereble, sekvos ĉiu lernanto de ŝia klubo.

#### EDZIĜO

**Mumford—Sinnotte.**—Je la 25a de decembro, 1930, fariĝis geedzoj en la Preĝejo de la Sankta Triunuo, Okcidenta Melburno, William, unuenaskita filo de la estintaj gesinjoroj William Mumford; kaj Edith Alleyne Sinnotte, due naskita filino de la estintaj gesinjoroj Walter Powell Sinnotte. Faris la solenon lia kanonika moŝto doktoro Crotty.

#### "MONDA LIGO"

Korespondu kun Esperanto-parolantaj membroj en ĉiu mondparto!

Interŝanĝu P. markojn, P. kartojn, Librojn, k.t.p.

Aliĝu al nia tutmonda ligo!

Informojn donas C. A. Wittenbach, 19 William-str., Richmond, E.1., Victoria, Aŭstralio.

#### TO OUR SUPPORTERS.

We again express our thanks. There is, however, a large amount of subscription money still outstanding. May we again ask all who read these lines, and who at the same time are doubtful of their soundness to the Suda, to regard it as a personal appeal to bring themselves into line with those who are battling to bring the paper through a difficult time.

S-ro W. Holloway, 4/6, feb., '32; s-ino Purnell, 5/- (por d-ro Bennie) dec., '31; s-ro C. Wittenbach, 4/6, dec., '31, kaj 2/6 anonco; s-ro E. M'Kenzie, 10/- donaco; s-ro J. Parker, 4/6, nov., '31; vendo per s-ro Cox, 1/-; same per f-ino Griffin, 1/8; s-ro R. Heyden, 4/6, jan., '31; s-ro E. Hynd, 4/6, jan., '31; s-ro L. Illingworth, 4/6, dec., '30; f-ino Blyth, 21/- donaco; s-ro S. Clarke, 4/6, jan., '32, kaj donaco 2/6; s-ro P. Paris, 5/-, dec., '31; s-ro A. Davern, 4/6, jan., '32; W. Middleborough, 5/6, sep., '28. Ensume: £4/10/-.

**KURSO PER TRADUKADO**  
(kondukata de s-ro G. Gordon,  
F.B.E.A.; sek-iino, f-ino Blyth, 10  
Victoria-av., Surrey Hills, Melb., E.10.)

**TRADUKO 15**  
**KAPITANO CHARLES STURT**  
—aŭtoro kaj landesploristo (daŭrigata)

Veninte (1) al Laidley's (pron. lejd-liz) Ponds, Sturt la dek-unuan de Oktobro sendis subestron (2) Poole al proksimaj montoĉenoj por explore rigardi la terenon. La konsternantan sekvon de tiu ago oni vidas en la jena eltiraĵo el unu letero de Sturt:—Morgaŭ ni ekmarŝos al la montoĉenoj kaj la akvoj—la nekonataj akvoj, sur kiuj neniam naĝis boato kaj super kiuj neniam flirtis flago. Poole diras, ke tiu maro estas (3) intense blua.—Tamen tio, kion vidis Poole estis nur fata - morgano (4). Senluziiginta (5) sed ne senkuraĝiginta (5) Sturt pluen marŝadis kaj kampis (6) en valetio, kies nuna nomo estas Sturt's Depot (pron. depo) Glen. Sturt skribis:—Ni marŝis laŭ ĉiu rivereto kaj esploris la regionon en ĉiu direkto, kaj ne ĝis tiam mi konstatis la veron, ke ni estas (3) enfermitaj en varmega, dezerta regiono tiel efektive, kiel ni estus, se ni travintrus ĉe poluso. Dum (7) ses malgajaj monatoj la esploristoj restis malliberigitaj ĉe Depot Glen. Ĉiaj bestoj malaperis. Sovaĝulo mistere aperis kaj egale mistere malaperis. Poole mortis, Browne kaj Sturt terure suferis de (8) skorbuto. Pluvoj en Junio liberigis la ekspedicion, kiu de tiam marŝis tra kuraĝiga regiono, ĝis subite baris (9) al ĝi la vojon vasta, ŝtonplena dezerto. Post tio Sturt sekvis rivereton, kiun li nomis Eyre's Creek (pron. ejrz krik), sed ĝi finiĝis en la dezerto. Senkuraĝiginta (5) Sturt sin turnis returne por esplori laŭborde de rivereto, nun nomata Cooper's (pron. kuperz) Creek. Denove mokis lin la dezerto. Sufoka varmego kaj nesufiĉeco da akvo devigis, ke la ekspedicianoj iru returne al Depot Glen. Ili senprokraste faris akvosakojn el bovaj feloj, kaj la malsukcesinta ekspedicio ekpenegis sin liberigi. Sturt perdis la korpoforton kaj vidkapablon, kaj tial (10) devis veturi sur ŝarĝveturilo. La dudek-unuan de Decembro la ekspedicio atingis sendanĝeran lokon, kaj tie finiĝis (14) la lasta esplorvojaĝo de Sturt.

Sturt, ankoraŭ ne taksata (5) laŭ sia merito, reveturis Anglujon (12). Nur kiam li kuŝis sur sia mortlito en la jaro mil-naŭcent-sesdek-naŭa li ricevis

la nesufiĉan rekompencan—titolon de kavaliereco. Post lia morto lia vidvino per gracia permeso tenis tiun bagatel-aĵon (15). (Fino).

#### NOTARO 15.

1. Adverba participo, Cox 211.—2. "Poole," Kiam titolo en akuzativo antaŭiras personan nomon, ne estas necese doni akuzativan finiĝon al la nomo.—3. "estas" ne "estis." Notaro 13/14.—4. "mirage"; fata-morgano estas Zamenhofa vorto. Fab. de And. vol. 1, 75/6.—5. La adjektiva participo ĉi tie esprimas la staton de Sturt. Antaŭ ĝi oni subkomprenas "estante."—6. "kampi," to camp. Plena Vortaro de Grosjean-Maupin.—7. "Dum" aŭ "en la daŭro de."—8. "de" aŭ "pro."—9. Notu la frazkonstruon kun aktiva formo por eviti kunmetitan verbtempon (estis barita).—10. "tial," for that reason, ne "tiel, ke," in such manner that. Ofta eraro de iuj verkistoj.—12. aŭ "al Anglujo." Cox 67 (2). L.R. pĝ 74.—14. Vidu noton 9. Neniam uzu "konklud'" en la senco de "fin'".—15. Mi ne scias, kion la aŭtoro volas komprenigi per la fina frazo.

#### KORESPONDAĴO.

Omoto: "The People of the Abyss" bone tradukiĝis per "la homoj de la (socia) fundo." Laŭvorte, "la popolo de la abismo."

M.B. en L. Mi legis kun vera intereso vian studindan verkaĵon pri la verbo "devi" en Kristana Revuo (Dec.) sed honestadire mi ne povas en la nuna tempo plenumi la cetere plezuratan taskon, kiun vi fide almetis al mi.

Tipisto: Odette Piau, la ĉampionino, "tipis" po 69.9 vortoj en ĉiu minuto.

I. S. en Sy. Vian faskon da literaturo sur ĉielarkokolora papero, ambaŭflanke skribmaŝinstampita oni konsideras. Komence pikis tento forĵeti la tuton, sed verdire vi verkis liniojn sufiĉe legindajn. Penstreĉa laboro frontas jam aferplenatan red., kiu devos ofere dediĉi tempon reskribi ĉion eventuale presotan. Kial Esp-isto jam de 20 jaroj ankoraŭ ne lernas, kiel prezenti bonorde materialon al redakteto? Tamen dankon por ĉio.

#### In Condolence.

With sincere regret we record the passing of two of our readers and fellow-workers, Mr. F. T. Hepworth, of Canterbury, and Mr. J. Widdowson, of Rockdale, Sydney. To those bereaved we express our sympathy.

## **Heraldo de Esperanto**

**AMPLEKSA, AKTUALA, ATENTOTENA, SEMAJNA GAZETO, CIRKULAS EN SEP KONTINENTOJ.**

Petu specimenon de Brusselerstr. 94  
Koln, Germanlando.

### **Hofman in Derby (W.A.)?**

We have received from s-ro Heinrich Hofman, Bohm-Leipa, Sonnen-gasse 235, an inquiry as to the presence in Derby of anyone by the name of Hofman, who left Germany some years ago. Would our Perth friends kindly arrange for a search to be made in the general directory.

### **PRI LA STILO.**

Interesaj estas la linioj pri (vidu la recenzon pri "Viktimoj") la stiltenden-coj en Esperanta literaturo. Laŭ mia opinio niaj "modernaj lingvo-evoluigis-toj," "vortĵonglistoj," tielnomataj "stil-majstroj," povas fari grandan malutilon al nia afero, pro sia aminklino tro simili la lingvon al ia hina cerbumigilo.

Preskaŭ ĉiuj Esperantistoj deziras legi Esperanton tiel facile, kiel sian nacian lingvon, kaj se ili trovas tekston kvazaŭ enigmo solvenda, ili aŭ ĵetas ĝin flanken aŭ nur enue rapide trakuras per la okulo disajn partojn. Tia estas mia kutimo, kaj pli ol unu fojon mi disŝiris libron, por ke ĝi ne malutilu al nia kara lingvo. La spirito de Esperanto estas simpleco. Mi opinias, ke la Esperanta gazetaro ne faras sian devon, ne severe recenzante verkojn, kiuj deflankiĝas de la ĝusta vojo.

Tre prefere mi sorbas kun facileco ian glate verkitan rakonton de s-ro Luyken aŭ tradukaĵon de s-ro Eggles-ton, ol mi pene luktas malimpliki la fantaziajn fraztordaĵojn kaj vortmon-strojn tro ofte trovatajn sur la litera-turaj paĝoj de niaj gazetoj.—Simplulo.

### **HOMOJ DE LA SOVAĜEJO**

kaj iliaj fidelaj hundoj.

el "The Sun" (Sydney) de la la de  
Majo, 1926.

El la Angla lingvo tradukis George  
Gordon, F.B.E.A.

(2a Parto)

Tiu kortuŝanta anekdoto pri Spider estas unu el sennombraj historioj, ven-intaj el la Aŭstraliaj sovaĝejoj, pri in-teligenta kamaradeco inter homoj kaj hundoj. En tiuj vastaj, silentaj regio-noj de eŭkaliptoj homoj ofte parolas dum horoj al hundoj kun tiel sama res-pekto kiel al homa kunulo. Ofte homo

kaj hundo kune sin trenis kaj trotetis lacigajn mejlojn, kune kuŝis ĉe bivakaj fajroj, kaj hundaj oreloj rekte ekstar-antaj kaj akrevidaj okuloj avertis pri kaŝita danĝero en la mallumaj inter-arboj. Kune ili spertis prosperecon kaj malprosperecon, kune ili baraktis tra pluvo kaj koto kaj ŝanceliĝante kaj spiregante marŝis sub kruela suno laŭ senfinaj ruĝpolvaj vojstrekoj.

La hundo, kiel ajn estu ĝia nomo, ĉu Spider, aŭ Bluey, aŭ Spot, aŭ Dick, aŭ Jack, aŭ Brownie aŭ Smokey (6), havas honoran lokon en la kronikoj de la vojaĝado de la "swagman." Se iu senkonsidere parolas malrespekte pri ĝia raso aŭ reputacio—jen! tuj sur-tutoj kaj ĉapeloj estas deĵetataj kaj pugnobatalo ekfuriozas. Malantaŭe de Bourke la plej facila maniero por inciti al pugnobatalo homon de la sovaĝejo estas paroli malrespekte pri lia hundo.

En la solecaj sovaĝejoj de ĉiu ŝtato se "swagman" devas nedaŭre foresti, li fidplene konfidas al sia hundo la gar-dadon de la bivakejo. Malofte la hundo pruviĝas nefidinda. Sennombraj hun-doj ĉe sennombraj bivakejoj haltigis nekonatojn en tiu rondo, proprigita al la mastro per la tiesto de fajro, "billy" (7) kaj kelke da lanaj litkovriloj. Ne-konato povas enpaŝi en tiun neŭtralan rondon, sed ne povas eliri returne ĝis la reveno de la mastro. Se li faras paŝon por foriri, tiuj viglaj okuloj ek-flamas, rozkolora lango elĵetiĝas inter teruraj dentaroj kaj la hundo minace sin pretigas por atake eksalti.

Altaj inter la hundoj de la sovaĝejoj pro siaj inteligento kaj fideleco staras la Spot'oj, la Dick'oj, la Jack'oj, la Smokey'oj, la Brownie'oj kaj aliaj, kiuj estas gardistoj de tirbovoj. Iliaj ler-taĵoj plenigus libron por amantoj de bestoj. Hodiaŭ sur la okcidentaj eben-aĵoj troviĝas hundoj, kiuj laboras ĉe tirbovoj je preskaŭ mistera scio kaj kapablo. Ofte el milo da tirbovoj la mastro volas jungi eble tridek. La cetero eble estas bovoj apartenantaj al aliaj homoj. La du bovoj por la an-taŭo de la jungaĵo estas elpelitaj el la milo kaj jungitaj, kaj estas la tasko de Dick aŭ Bluey aŭ alia hundo kolekti la ceteron el la tridek. Ĝi plenumas la taskon kun kapablo, kiu impresus eĉ Henry Ford'on. Ĝi elpelas la bovojn "Ranger" (8) kaj "Red" el arego da sin paŝantaj bovoj, poste "Snowy" kaj "Roany" (8) kaj la ceteron el la jungo-taro kun senerara lerto kaj neniam bovon neapartenantan al la mastro. La rapido aŭ malrapido de la laboro multe

dependas de la humoro de la mastro. Se tiu inklinas ne multe klopori, tiam la hundo ne rapidas kolekti la bovojn, sed se la mastro por vigligi ĝin kriegas al ĝi kelke da insultaj kaj malbenaj vortoj, tiam ĝi rapidigas la paŝojn de la bovoj per serio da ekordetoj ĉe la poplitoj (9). Per kio ĝi distingas la bovojn de la mastro de aliaj bovoj estas unu el la misteroj de la hunda instinko.

Lia hundo estas la kunlaboranto de la mastro dum la laboraj horoj sur la vojoj, lia kamarado ĉe la bivako, kaj ofte fariĝas la fidela gardanto de la mastro, kiam tiu permesas al si ripozan tempon en kampara urbo kaj plenigas sin je biero. Kiel ofte post kiam la mastro sterniĝis sub la verando de drinkejo, ĝi minace mordcelis ĉiun, volantan aliri la kuŝanton aŭ la "swag" ĵetitan sur la plankon? Kiel ofte ĝi tortimigis tiujn rabemulojn, kiuj, eĉ en kampara urbo, ne hontas turni senhelpan ebrulon poŝ-al-supre kaj kurigi facilmovajn fingrojn inter ties propraj? Kiel ofte la vigla, brua gardomarsado de la hundo ĉirkaŭ la ebria mastro efikis, ke oni portis tiun en la tenejon de fojnhakaĵo malantaŭ la drinkejo, por ke li tie povu per dormo forigi la ebrieton, sendanĝera de fingroj de ŝtelistoj?

Fideblaj kamaradoj estas la Bluey'oj, la Spider'oj, la Smokey'oj, la Spot'oj.

(1) "claypan" (prononcu: klejpan). Nomo donita, precipe en la seka internolando de Aŭstralio, al malprofunda enpremaĵo en la tero. Ĝi varias laŭ amplekso de kelke da kvadrataj metroj ĝis unu mejlo aŭ pli. La surfundaĵo el argila ŝlimo malakcelas la sorbadon de akvo.

(2) "cotton-bushes" (t.e. koton' arbustoj). Vulgara nomo de Bassia bicornis kaj Kochia aphyela.

(3) "soldat' formikoj," "buldog' formikoj." Vulgaraj nomoj de specoj de atakemaj formikoj de la genro myrmecia.

(4) "swagman" (prononcu: ŝagman). Homo piede vojaĝanta sur la sovaĝejo por serĉi laboron kaj surdorse portanta "swag"—rulpakaĵon el lana litkovriloj kaj entenantan necesajojn por piede vojaĝado

(5) "kelpie" (prononcu: kelpi). Speco de hundoj, deveninta de pariĝo de Skota ŝafhundo kaj la Aŭstralia "dingo" (Canis dingo).

(6) Prononcu: Spjaer, blui, spot, dik, ĝak, braŭni, smoki.

(7) "billy" (prononcu: bili). Lada kaldrono ĉie uzata de vojaĝantoj en sovaĝejo por fari teon.

(8) Prononcu: Rejnĝer, red, snoi, roni.

(9) "poplito." Parto de la kruro malantaŭ la genuo.—(Verax).

### INTERNACIA LEGOLIBRO.

Redaktis A. Kengott.

Havebla per A.E.A. prezo 50 cendoj

El lando, ne riĉa je Esperantistaj agadcentroj, sed rimarkinda pro fervoro de kelkaj individuoj, venas ankoraŭ libreto de unu tia persistemulo, s-ro A. Kengott, lingvisto ĉe la Universitato de Texas. Kontribuis al la enhavo anoj el kvin lingvoj; la kompilo do ne estas monde reprezenteca. Malestas ekzemploj tipaj de la franca, germana, hispana Esp.-majstroj, jam ne parolante pri malgrandaj nacioj cetere riĉa je niaj talentuloj. Kial ne elspezi iom pli da kloporo, rigide limigi la diversajn lingvanojn je po nur unu peco, kaj per tio ampleksi ĉi tian verkon multe pli riĉe? Ne bone en Internacia Legolibro, ke el 16 kontribuajoj sepo estas el angla lingvana cerbo, kvar el hungara, tri el rumana. Poezion la redakanto iakiale ignoris.

Pritraktojn pri la beleckulturo kaj simila de d-ro K. Mezei legos multaj kun intima intereso. La finlanda aŭtoro de "Antaŭ la Senfino," J. Bergh, majstramane malkovras animojn de du gehomoj frontantaj turmentan morton sur izole flosanta glacipeco. Ilia amo, naskita de komuna danĝero, venkas timon antaŭ la Neniigo. La plej frapa verkaĵo en la volumeto. Kun amara sento oni legas "La Robo," skizon pri malgrandanima filo, hontante sian trivialan naskmedion. Kun libera imago, s-ro Kengott bellingve re-vestas la malnovan legendon, la Lorelei. S-ro Stojan

## HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE,

## Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

MELBOURNE.

fantazias ediziĝon en jaro 1999. La interagado de la menso kaj la materio estas temo de P. Balkanyi, kiu rakontas pri la potenco de sonĝo sur amajema fierulo.

Entute la lingvaĵo plaĉas; la enhavo daŭre tir-tenas la okulojn. Tamen, ĉu ne atentindaj estas la jenaj: Bonfire Day (festfajra tago); antipati' estas oficiala (131); pflac (?); kosmetik' estas la oficiala radiko. Kial tiuj, kiuj pretendas gvidi nin en internacian unuecon lingv-uzan, ne ĉiam fidele sekvas mem la konsilon de nia Lingva Akademio, esprimitan per ties zorge elektita radikaro de oficialaj vortoj?! 73. kemistoj (!); 73/5 haŭto(n); 74 kolorigis lipojn, 75 koloras vizaĝon; 79 terurita (ne terurigita); stivi (ŝargi aŭ malsargi ŝipon); plombo (nenecesa radiko); palizado (paliso estas oficiala); 95 magistrato devas esti -ano. Glitbas-tonoj (skioj); rivoko (nuligo); 119 neniĝo (neniĝo); 122, 123, ŝajnis al li, ke li -is (-as); onĝlo (ungo!).

—ROBO.

**“POR RECENZO”**

Verkita de K.R.C. Sturmer.

Eldonita de la Esperanto Publishing Co. Ltd., London.

Prezo 1/6, 2/6, ĉe B.E.A.

S-ro Sturmer ne havas rakonton per kiu regali legantojn de la supre strange titolita verketo, sed vere per ĝi li ebligas al tiuj, kiuj ŝatas esplori popolmorojn, belan enrigardon en la anglan karakteron kaj en la rilatojn inter la diversaj tavoloj de socia Anglujo. Per trafvorte konstruitaj bildoj li vipas la “snobismon” (afekta socisupereco), burĝetan hipokriton, kaj bagateleman animon de tiuj gehomoj, kiuj ĵaluze defendas sian pli malpli “neproletariecan” pozicion en la socia tekso. Facile diserigās amikecoj en tia venena etoso (amata vorto de la aŭtoro), kaj s-ro S., kun penetrema animokulo priskribas la pensvojojn, intimajn revfadenojn kaj esperojn de kelko da intelektuloj vivantaj en ĝia haladzo. La amiĝa renkonto kaj kuna enmarŝo en gefianĉecon de

Rudolf kaj Filiso estas majstre pentrita epizodaro.

La aŭtoro montras vole-nevole ian influon de H. G. Wells sur sian pensmanieron; la Esperanta lingvaĵo kelkloke indikas, ke la aŭtoro notas v. kojn de Baghy.

7. Obscene (malĉaste, putraĉence); 8. nervoza (nerve interplektitaj manoj. Z.); Ĥinio (Ĥinujo); 16. malgraŭ ioman scivolemon (kial akuzative?); 22. grandaj gutetoj (!); 29. el sian pipon (akuzativo nenecese post “el”); 30. umi el la patra monujo (plibone uzi formon kun “log”); 31. super mentono iom antaŭnema, sed ne malforta (?); 32. Interese estas, ke la aŭtoro uzas kiel unua “laŭTamiza,” “KristalPalaca”; 34. paĝio (vidu Plenon Vortaron); Meksiko (Meksikio); danduloj (dandoj); 42. farinte kion (tion); 55. la hundo venis, la korpon esprimanta eksciton... (kun la korpo...); 58. ni bone instruas ilin pri iliaj lokoj (anglismo? ni...pri ilia efektiva rango?)

Finpaĝe sidas difinoj de “aprezi,” “etoso,” “svelta,” “evento,” “obscena,” “oĝjo,” “morna.” Tiu de la kvina estas diskutinda.—(Robo).

**ESPERANTO LERNOLIBRO POR POPOLLERNEJOJ**

laŭ rekta metodo verkita de Arthur Degen, laŭ komisiono de la Esp. Asocio Germanaj Instruistoj.

Unua parto (1a-2a lernjaro)

Eld. de Ferd. Hirt, Leipzig.

Prezo 2 rmark.

Ni ne povas tro laŭdi ĉi tiun modele taŭgan instruilon por uzado ĉe la ekgermantaj Esperantistoj. Malavare ampleksa, riĉekzempla, en manoj de la konsciencia lerniganto ĝi estos vere magibastono por ekestigi la novajn vicojn da praktikuloj, kiuj marŝante portos honore nian standardon eĉ pli antaŭen.

Ĉu ne akcentinde, ke tre prefere devus elekti negermanlingvanoj ĉi tiun libron kiel komenculan studilon? Laborante super ĝi, ili multe pli facile akiros al si stilon liberan de naciismoj kaj laŭvortaj tradukeroj. Kresku inter

**PERCY HOLMES**

**ELEKTRISTO KAJ RADIISTO.**

212 NOONE-STR., CLIFTON HILL.

Prezentas al vi novan radi-aparaton. La “VERDASTELO” maŝino estas speciale konstruita por la Esperantistaro, kaj estas havebla laŭ diversaj ampleksoj, kiuj entenas de du ĝis ses valvoj. Aŭskultu ĝin en propra hejmo via!

MEMORU—POR ĈIO ELEKTRA.

Telefonu: JW 4017.



# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 129 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Australio. Mario, 1931

## N.Z.E.A. SECTION.

### 5th Official Bulletin.

Notwithstanding the inroad made by the festive season into the quarter concluded since the publication of the **4th Official Bulletin**, the New Zealand Esperanto Association has accomplished much useful, though perhaps unspectacular work during the period. In addition to the usual enquiries from N.Z.E.A. members and other Esperantists regarding common questions relating to the language and the movement, requests for information concerning Esperanto, textbooks, and tuition have been received from several of the general public. These requests have been satisfied, and the N.Z.E.A. has been given further opportunities to show forth its usefulness and to fulfil the aims of those Dominion enthusiasts who, in January, 1929, stressed the necessity for and established the national organisation.

### Propaganda Work Continues.

The N.Z.E.A. has pursued its propaganda policy wherever possible; and succeeded in arranging with the editor of "**The School Committee Journal**," published at Auckland, for a re-print in full of the N.Z.E.A. specially compiled propaganda leaflet issued last year. By this means much convincing data were again placed before the educational authorities. Translations relating to the various postal administrations were also prepared and forwarded to the editor of "**The Katipo**," who readily gave them prominence in his journal—the official organ of over 7000 New Zealand post and telegraph officers.

### Por Esperanto per Esperanto.

### Pan-Pacific Conference.

Preliminary steps have been taken by the N.Z.E.A. in an effort to arrange for either an official representative or a discussion on the subject of Esper-

anto at the next Pan-Pacific Conference.

### Membership, etc.

Although the financial year of the N.Z.E.A. ends on the 31st March, four additional members have come forward. On the other hand, three members, Mrs. McGuigan and two sons, have departed overseas, thus increasing the number of N.Z.E.A. members abroad to eleven and relatively decreasing the number at home. Two other members renewed for the new year, thereby doing their share towards encouraging the office-bearers in their work. In view of the General Election this year—at time when much can be achieved for the language—it is hoped all who have Esperanto at heart will accord the N.Z.E.A. full support. To assist is a simple matter: renew subscription (2/6), **which fall due on 1st April**, early, and introduce as many additional members—active or associate—as possible. (Hon. Sec's address: Mr. W. H. King, 10 Queen Street, Wellington.)

Since the 1st November, the N.Z.E.A. funds have benefited by two further donations — one of 5/- from Mr. D. Tilly, Whangarei, and another of 5/2 from Mr. G. Woodhill, Half-way Bush, Dunedin. Increased income from this source will hasten the issuance of a book of N.Z.E.A. rules and of a List of Dominion Esperantists.

### Second New Zealand Congress.

The second New Zealand Esperanto Congress is being arranged under the auspices of the N.Z.E.A. to take place at Auckland during Easter. A strong Local Congress Committee comprises Mr. C. J. Adcock (Chairman), Mrs. Watkin and Mr. Russell (of the N.Z.E.A. Executive), and Messrs. Marinovich, Robinson, and J. P. Lauder (Secretary), representing the Auckland



Club. All communications in connection with the congress should be forwarded to the L.C.C. secretary, care Mr. J. S. Russell, 2 Pukenui Rd., Epsom, Auckland. A programme is under consideration, and although details have not yet been completed, all who anticipate taking part can rest assured an enjoyable time awaits them in the Queen City of the Dominion. As in the case of the First Congress, the primary object of the Second is to propagate and to prove to the public that Esperanto is advancing in New Zealand, and at the same time to afford Dominion Esperantists opportunities of meeting each other and of using the international language — the link of nations. An invitation to the congress is being issued separately to all New Zealand samideanoj and sympathisers whose addresses are registered with the N.Z.E.A.; and, needless to state, any Australian friends who may visit Auckland during the congress will be very cordially welcomed.

(W.H.K.)

### NEKROLOGO.

Forpasis ĉe Masterton, Nov-Zelando, je la 23a de Januaro pasinta, post longa malsano, s-ino L. Payne. 62-jaraĝa, kunfondintino de la nuna grupo de Masterton. Por ĉiam sur la paĝoj de la Historio de Esp-o en Nov-Zelando estos skribita ŝia altestimata nomo, ĉar estante anino de la N.Z.E.A. kaj U.E.A., arde laborinta pioniro de Esp-o en la Dominio, kaj fervora, vera amikino de la movado ĝenerale, s-ino Payne multe klopodis por la lingvo, aŭ instrue aŭ propagande aŭ sekretariine. Al la edzo respektplenajn kondolencojn.

### KRONIKO.

**Masterton, N.Z.**—Dum Februaro du gravajn kunvenojn okazigis nia grupo—la ĉiujara je la 3a, kaj la 6a fest-vespero ĉiujara je la 10a. Ambaŭ altiris grandan ĉeestantaron.

Ĉe la antaŭa s-ro B. Johns kapable prezidis. Pro alta respekto al la memoro de nia mortinta eks-sekretariino, s-ino L. Payne, la ĉeestantaro staris mallonge en silento.

La grupoficistoj estis re-elektitaj por la nova jaro, sed s-ro H. Franks (38 Warksop Rd.) estas la nova sekretario kaj grupdelegito al N.Z.E.A. Estis decidite, ke la ĝenerala komitato konsistu el ĉiuj grupoj; ke s-ro H. Franks kaj s-ro A. M. Dewar estu la fest-afera

komitato; kaj ke la kotizo estu po 5ŝ. ĉiujare.

La festa vespero estis sukcesego pleje pro la energio kaj entrepreno de la nove enoficigita sekretario, s-ro Franks. Parlamentano s-ro G. R. Sykes prezidis, kaj post la kantado de la nacia himno, li preparolis Esperanton kaj la internacilingvamovadon. Multaj bonegaj programeroj estis provizitaj de ne malpli ol deko da geroluloj, ĉiu el kiuj ricevis (kaj meritis) aplaŭdon. Specialmenciinda estis la kantado de "La Espero" de s-ino Fieldhouse, kiu, prononcante perfekte la Esperanto-vokalojn, donis al la kantado ĉiom da riĉtono, kiom havas la itala lingvo.

Farante proponon de danko al la lokaj redaktoroj, s-ro E. J. Coleman donis meritan tributon al tiuj, pro iliaj afableco kaj komplezo etenditaj al la ĉi-tiea grupo dum longa tempo.

### KURSO PER TRADUKADO

(kondukata de George Gordon, F.B.E.A.; sek-iino Miss B. Blyth, Victoria-av., Surrey Hills, Melb., E.10.)

—oOo—

### TRADUKO 16

### KAPTADO DE SOVAĜAJ HUNDOJ EN AŬSTRALIO

(el "The Sun News Pictorial" de la 7a de Junio, 1930.)

—oOo—

La kaptado de sovaĝaj hundoj (dingoj) estas profita entrepreno, almenaŭ en Okcidenta Aŭstralio, kie en senvoja regiono mi akompanis spertegan kaptiston. Li diris, ke en unu sezono, antaŭ ol komencis konkurado en lia elektita parto de la vasta ebena, li enspezadis po (1) ĝis okdek funtoj sterlingaj en ĉiu semajno.

**Canis dingo**, la stranga hundo, da kies rasanoj oni kaptis aŭ venenis multajn milojn en lastatempaj jaroj, tamen troviĝas en aliaj partoj de Aŭstralio krom (2) en la neplene esplorita centra regiono.

En partoj de Viktorio dingoj estas tre tro multaj. La estraro de ĉiu "shire" (A), en kiu dingoj estas multenombraj, pagas rekompencan por mortigo de tiuj bestoj. La sumo ne estas sama ĉie, sed en iuj "shires" ĝi estas po (1) kvin ŝilingoj por ĉiu prezentata skalpo. En Okcidenta Aŭstralio la rekompenco estas po (1) du funtoj (3), kiujn pagas la registaro kaj iu brutedukistara kaso, ĉiu duonon de tiu

sumo, tial ĉiu libera dingo reprezentas eblan grandprofiton. La kaptadon praktikas ne nur profesiuloj, sed kiel kromlaboron ankaŭ aliaj homoj, kiuj semajnfine per ĝi profite sin amuzas.

Metodoj de kaptado estas diversaj, sed tiu de sperta kaptisto estas tia, kia certigas sukceson, kie senzorge metita kaptilo malsukcesus.

Mi observis la metodon de homo, kies ĉiusemiajna enspezo, je kaptado estas dek du funtoj pli ol la rilataj elspezoj. Li portis pezajn, ledajn gantegojn kaj per la nudaj manoj tuŝis nek kaptilon, nek logaĵon, nek la grundon ĉirkaŭ la arbusto, kaŝanta (5) ilin (3), ĉar la dingo estas akreflaraj kaj suspektemaj.

Estas arto en la metado de kaptiloj, kiel en ĉiu alia grava afero, kaj oni ĝin akiras el la lernolibro de la sovaĝejoj. Logaĵo konsistas el kuniklo, bova ostoj kun karno sur ĝi aŭ el peco da ŝafo, metita (5) malantaŭ la kaŝita kaptilo, sur kiun devas paŝi dingo logata al mortiga manĝo.

Kvankam dingo estas malkuraĝa en libereco, kaj oni malfacile proksimiĝas al ĝi, tamen dingo en kaptilo vidigas mirindajn kuraĝon kaj eltenon ĉe sufero. Ofte okazas, ke mizera viktimo formaĉas piedon kaj tiel sin forsavas, kripliĝinta (6) por ĉiam.

Kvankam la plenaĝaj dingo estas singardemaj, la dingidoj, ĉarmaj kreitaĵoj laŭ eksteraĵo, estas tiel scivolemaj, ke ili sentime aliras altrudulon. Unu fojon unu venis preskaŭ ĝis aŭtomobilo kaj rigardis la kaptiston en la vizaĝon.

La dingo neniel deziras, ke oni ekstermu la kuniklojn en Aŭstralio. Tra vastaj areoj de la internlando la dingo sekvas la kuniklon, kiu sekvas la manĝeblaĵon, irante de partoj dezertiĝintaj (5) pro senpluveco al tie, kie la vegetaĵo estas verda aŭ kie estas vivrimedoj por kunikloj.

Kompreneble estas, ke la dingo ja meritas sian malbonan reputacion inter brutpaŝtistoj (4) kaj terkulturistoj. Ĝi estas ŝafmortigulo kaj ofte mortigas nur por la plezuro de mortigado. Tamen la natura nutro de la dingo konsistas el marsupialoj, tiaj, kiaj valabioj (B) kaj bandikutoj (C). Miksrasuloj devenintaj de pariĝo de dingo kun domhundo estas la pli ruzaj. (daŭrigota)

A. "shire" (pron. ŝajr). Nomo de unu el la dividoj de la ŝtato por administrado.

B. "valabio." Transliteraĵo de Aŭstralio nomo (wallaby) por la pli mal-

grandaj specoj de kangaru'similaj bestoj de la genro makropo.

C. Transliteraĵo de la Aŭstralio nomo (bandicoot) por la insektmangaj marsupialaj bestoj de la genroj **para celes, paragale kaj choeropus.**

#### NOTARO 16.

1. "po" ne signifas la Anglan "p" sed "at the rate of." Notaro 6/6.—2. "krom." L. R. pĝ 70.—3. Kiam Angla frazo estas dusenca aŭ dubesenca, oni tradukante devus kiel eble konstrui por klarigi la signifon.—4. Oni edukas (brings up, rears, raises) infanojn, ĉevalojn, ŝafojn, bovojn, porkojn, kokinojn k.t.p. "Brutedukisto," raiser of live stock (Gen. xlvi, 32). "ŝafedukisto" aŭ "ŝafpaŝtisto," sheep farmer, pastoralist (Gen. iv, 2). "Bredi" (vorto ankoraŭ ne oficialigita) ne estas samsignifa kiel "eduki" sed signifas "to breed as a business or hobby pure-blooded animals."—5. Adjektiva participo.—6. Oni subkomprenas "estante" antaŭ "kripliĝinta."

Preseraroj en Tradukota Peco 17. En L2 forstreku "and" antaŭ "dog," la punktokomon post "wild." En L4 post "killer" anstataŭigu la punkton per komo.

#### —ESPERANTO—

#### UNIQUE CONGRESS LANGUAGE

The true ground on which to test the fitness of English for the role of secondary world tongue is not a German hotel or a French ticket office but the assembly hall of an international congress. Here the discourse is not confined to the exchange of simple question-and-answer heard many times a day, but assumes a character that may take the loftiest flights of imagination, or follow the subtlest labyrinths of reasoning.

English is taught more or less widely in all European states, and in some ranks only second in importance to the language of the country concerned, but in spite of this advantage, never, in any country, has there been held a truly international congress in which only English was used. This is significant.

Opponents of Esperanto in English-speaking lands would seem to lack a healthy confidence in the future of English as a world secondary tongue, for they are ever stressing what they term the imperative need for the study of foreign languages in order to furnish effective equipment to those engaged in the struggle for new trade markets.

In the United States the teaching of modern languages is diligently fostered, but there are more pupils there learning French than German, Spanish, Italian and Latin put together. One would, however, wrongly infer from this that America deems the world to be moving towards acceptance of French as its auxiliary tongue!

On ground worth holding—the large-scale international congress—Esperanto has strikingly outpointed English, its great rival. 1931 should record ever more decisive and eloquent victories on this field.

### INTERNATIONALITY OF STYLE

Prof. Cart said: "In Esperanto there is only one rule of style: to write as clearly as possible. That which is clear may be incorrect, but never bad Esperanto. There is only one prohibition: to write obscurely. That which is not clearly comprehensible may at times be correct, but never good Esperanto."

Prof. Cart said also that while logic helps to make a language easy, that is not absolutely true: logic must yield, if necessary, to certain idiomatic mannerisms common to European peoples, mannerisms that Esperanto does not aim to obliterate. But composition in Esperanto may be correct and comprehensible without revealing those characteristics that lift it up beside that of the best stylists.

There lacks in so much writing that crisp originality of expression, that light effortless construction born of the power to weave pleasing word-vesture, that proclaim the writer as one who has drunk deep at the wells dug by the masters.

This is well known; here are a few examples drawn from recognised stylists. It would be interesting, while reading them, to think of the phrases we would have used to translate the same thoughts, or to write the English expressions down and ask the best English-speaking Esperantist of your acquaintance to translate them. Would not the comparison throw light on this problem of internationality of style?

A costly piano immediately caught the eye (tuj falis en la okulojn multekosta fortepiano); The Frenchwoman, who sprawled in the armchair (la francino, kiu larĝe etendite sidis en la brakseĝo); I would very much like to get a permanent position (mi tre dezirus ricevi firman oficon); Where do

you permanently reside? (Kie vi loĝas konstante?); The paleness of his face (la laca koloro de lia vizaĝo); But the illusions could not last long (sed la iluzioj ne povis teniĝi longe); Instead of making any reply, she bent down... (anstataŭ ĉia respondo, ŝi kliniĝis...); Supply and demand (proponado kaj postulado); But is philosophy everything? (sed ĉu nur pri filozofio estas la parolo?); It's a long time since you were with us (kiel longe jam vi ne estis ĉe ni); Train of thought (fadeno da pensoj); (E. was a "young lady," and I was a mere girl (E. estis fraŭlino kaj mi estis simpla knabino); She was endowed with a fair share of common-sense (ŝi posedis sufiĉan dozon da prudento); After a few moments (post kelka momento); In a jiffy (post mallonga momento); The big gate was opened full-wide (Oni malfermis en la plena larĝo la pordegon); Front windows looking on to a bustling street (frontaj fenestroj elirantaj sur multehoman straton); Well matched things (harmonie interkonformigitaj objektoj); Glowering, repressed anger (obtuza, retenata kolero); Well dressed (peneme vestita); What of it? (Kio do sekvas el tio?); How far is... (Kiom distancas...?); Put yourself in his place (Imagu do vin sur lia loko); How many of us are there? (Kiomope ni estas?); To keep his courage up (por teni al si varme la stomakon); How good you are to me! (Vi estas tro bona kontraŭ mi!); He had a man's suit made for her (li lasis fari al ŝi viran veston); indubitable and incontrovertible facts (sendubaj kaj nemalkonfeseblaj faktoj); what particular language fate has ordained.. (kia nome lingvo la sorto difinis..); positively absurd! (rekta absurdo!); go and fetch it! (Irprenu ĝin!); I touched a sore point (mi tuŝis ĝenan flankon); Now then, up you get! (Nu he! Surplanden!).

Notice in these examples the complete freedom from that "Englishy" taint that mars the work of far too many British Esperantists. Let us all learn by heart the following words of him who was acclaimed the greatest stylist after Zamenhof himself:

"Se efektive mi estas ne malbona Esperanta stilisto, mi havas nur unu meriton, ke mi atente legis kaj studis la verkojn de nia Majstro, inokulis al mi la mirindan simplecon kaj naturecon de lia stilo kaj penis ĉiam ĝin imiti. Se mi sukcesis, mi atingis la rezultaton nur

dank'al la elekto de bona modelo kaj al fidele imitado." (Kabe).

### ROSEROJ.

Tia estas la titolo de la dua libreto da poemetoj verkitaj pri simplaj temoj de holanda vojaĝema Esp-isto, s-ro Adalberto Smit. Rezulte el lia vizito al diversaj belvid-lokoj en Eŭropo, li lasis al si elverŝi kelkajn poezie esprimitajn priskribojn, el kiuj eble la plej bona estas "Budapeŝta Belo." La cetero facile tuŝas sur la amŝenton, kaj satiretas aŭ kondamnas malfortajn flankojn de la homa naturo.

Montriĝas, ke ĉi tiu poeto kapablas vortludi simile virtuoze al tiu de la franca versisto Schwarz. Bedaŭre ie kaj ie la pensoj ne kontentige pasas de lia koro en sian lingvaĵoveston. Malgraŭ tio la verketo meritas simpatian trakton pro tio, ke ĝi enhavas plaĉe tintantajn versojn kiaj jene:

Dum la dormo la demono,  
Kies nomo estas "Mono"  
Ne plu persekutas nin.  
Akvo gustas kiel vin'.  
Tro pezanta, ora krono  
Aluminiigas sin.

Smit enkondukas divers-iele kelkajn neologismojn, kaj provas du-tri novajn formojn. "Tipad'" (?); parkeda (pargeta); resurekcio (releviĝo el la morto); konvoj' (?); kio signifas "plenpatosa" aplikata al "Zaragosa"? Dunkl-okula (G. dunkel; do "dark-eyed"). "Ehodo." Meto de sufikso -ad post la substantiva finaĵo estas stranga. Prezo O.75 guldeno pere de la BEA.

### LA JUNULINO EL STORMYR.

Inter svedaj verkistoj staras Selma Lagerlof kiel ĉefa. Tutjuste ŝi ricevis la Nobelpremion en 1908, kaj nun oni vidas verketon sian vestita per la bela lingvaĵo de l' interhoma paco, Esperanto. La recenzanto pensas supozebla, ke oni feliĉe elektis ĉi tiun romaneton, kiel respregulon de la genio Lagerlofa.

En juĝejo la perfidita Helga perforte tiras biblion el manoj de la kulpa fiĵuronto, por ke li, laŭ ŝia simpla kredo, ne malfernu por si la pordon de l' infero. Per tio ŝi nescie admirigas sin antaŭ okuloj de Gudmund, jam fianĉo kun riĉa Hildur.

Post ebria konfuzvespero li pensas sin mortiginta kundrinkulon. Hildur, hontkolere, forrifuzas malfeliĉan Gudmund, sed Helga, sekrete tenanta pruvatestaĵon pri la senkulpeco de Gud-

mund, informas la eksfianĉinon pri tio. Ĉi tiu, instigite de la amanta lin Helga, kiu antaŭ ĉio celas la edzan feliĉon de Gudmund, iras por ŝajnigi sin edziniĝvole pardonanta spite al lia krimo, sed senreteneble elverŝas antaŭ Gudmund la faktojn de la afero.

Konstante la okuloj sorbas la tekston ĝis la finlinioj, en kiuj la fidele sindona Helga laŭdestine gravitas al la koro de Gudmund, kiu ĝustatakse rezignas la riĉan Hildur-on favore al hardita amo.

Ĝi estas ĉarma novelo, kaj la traduko de s-ro O. Frode estas simplalingvaĵa kaj flulegebla, eĉ estus bonega se ne estus tiom multaj gramatikaj eraroj, precipe da misuzo de verbtempoj. Denova ekzemplo de la neŝago, ignori la konsilon, ke oni nepre submetu publikigotan verkon sub kontrolan manon de kompetentulo. Neĝuste uzitaj; majstro', kontrol' (reg'); ofer' (prezent'); return' (reven'); multoblajn (multajn); realizebla (realigebla, plenumebila); surtabl(ig)is; sabl(ostern)is; 67, spite (tion); kolerigita (kolera); 80/3 antaŭulo (?); pensema (pensdrona, enpenŝa), troa uzo de -em; "kiam" ne estas necesa post "dum"; grava stila eraro estas uzi ne la ordonan verbon post "por ke" (por ke... kuraĝus!); Ofte la tradukisto fuŝas la verbtempojn, kaj paraĝrafo unua sur p.26 postulas tro da komprenpeno. Prezo Kr.1.50 (1/6) per AEA.

(Robo)

### KURACA HELPO SUR MARO.

Radio, kompatema ŝipestro, ĥirurgo de la ŝipo kaj vojaĝanta kuracisto, ĉiuj ĉi ludis sian rolon en rakonto pri homa helpo sur maro.

Pro agemeco de kelkaj bonkoruloj unu germanino nun kuŝas resaniĝanta en hospitalo en Kolombo, anstataŭ esti devinta travojaĝi suferi la Ruĝan Maron en malforta fizika stato.

Tiun marrakonton faris en Perth, okcidenta Aŭstralio, 6/1/31, s-ro J. H. Scullin, ĉefministro de la aŭstralia federacio, ĉe bonveniga tagmanĝeto honore lian revenon el Eŭropo. Li trafe ilustris la kredon, ke ne estas homa instinkto militi kaj mortigi, sed kontraŭe ŝavi vivon kaj nutri.

"Ni gaje daŭrigis vojaĝadon tra la Ruĝa Maro. Tiam venis S.O.S., ke unu germana virino sur holanda ŝipo estas en mortdanĝero, kaj ke mankas kuracisto tie. La holanda ŝipo forestis cent mejlojn de ni. Kion faris do la ŝipes-

tro nia? Li havis pli ol mil personojn kaj multegkoston ŝipon sub sia zorgo. Ĉiu horo da vojaĝo kosta kvindek ĝis cent sterlingoj, ĉiu horo da prokrasto maltrankviligus kaj ĝenus al la ŝipanoj kaj pasaĝeroj. Malgraŭ tio, li ne hezitis momenton, li ordonis ŝipon iri reterne por depreni la germaninon for de la holanda ŝipo, kaj metiŝin en zorgon de brita kuracisto.

Kvankam tio eble estis nur simpla okazintaĵo, ĝi provizis al ni unu el tiuj "tuŝetoj de l' homa naturo, kiuj parenigas la tutan mondon."

Ĉiu pasaĝero ĝis malfrua nokto staris sur ferdeko, por rigardi la maristojn eliri kaj alporti la virinon sur sian ŝipon; matene ili zorgeme demandis, kiel ŝi sanstatas post grava operacio.

Plezurege ili sciigis, kiam ni albor-diĝis ĉe Kolombo, ke ŝi bone progresas sur vojo de l' resaniĝo. Oni monkollektis sur la brita ŝipo por ebligi al la germanino reiri al sia familio.

Ĉar okazaĵoj, kia tiu ĉi, estas ne maloftaj en homaj vivoj, sed estas rimarkitaj ĉiutage, kiu do povas diri al ni, ke estas natura instinkto de l' popoloj militi unu kontraŭ la alian kaj unu la alian mortpafi?

Trad. el West Australian, 7/1/31.  
A. Frakseno.

## MIAJ IMPRESOJ PRI AŬSTRALIO

(de Inocento Serišev, Sydney)

[La redakcio tute ne respondecas pri ia opiniaĵo de la supra sinjoro, kaj volonte presigus leterojn kritikajn de legantoj tuŝantaj sur la temo.]

Mi loĝas en Aŭstralio nur apud kvar jaroj kaj neniam iris for el Sidnejo; tial mia kono de Aŭstralio estas tre limigita. Tamen, eĉ loĝante en Sidnejo, mi ricevis certan opinion pri la lando. Estante 45-jaraĝa, vizitinta 15 landojn, amikiĝinta per Esp-lingva korespondo kun homoj de 80 nacioj, mi povas pretendi ian sperteton kaj observon pri la homa vivo.

Kiam mi vivis en Japanujo kaj presigis en japana Esp-lingva revuo miajn impresojn pri tiu lando, severe kritikante kelkajn negativajn flankojn de la

popola karaktero, mi ricevis dankojn pro mia sincereco, ĉar japanoj mem ne povas rimarki siajn negativajn trajtojn. Estu la samo ĉi tie.

## POZITIVAJ FLANKOJ DE AUSTRALIA VIVO.

### (1) Demokratismo

estas la unua, kio frapas okulojn de fremdulo alveturinta Aŭstralion. Eble tiuj venintaj el Usono aŭ Nov-Zelando ne tiel miras, sed envojaĝintoj el aliaj landoj certe ricevas fortan impreson.

Rusoj, kiuj antaŭe vizitis ĉi-landon, nomis ĝin "lando de vera demokratio," "laborista paradizo." Kaj vere, komparante ĝin kun la aliaj landoj de demokratio, ni devas konfesi, ke N.Z. kaj Aŭstralio paŝas multe antaŭe. Precepte rusoj miras pri tio, veninte el lando de estinta carismo kaj nuna komunismo.

Ne nur nin agrable frapas la politika kaj socia leĝdonado por bono de gelaboristoj kaj gelaborantaj oficistoj, sed ankaŭ la demokrata, t.e., simpla aranĝo de vivo, simpla moraro.

Ĉiuj homoj aspektas egale, kaj surstrate oni ne povas distingi ĉu iras en aŭto laboristo ĉu inteligentulo profesoro, advokato. Soldatajn kaj oficirajn uniformojn oni preskaŭ ne rekonatas.

Laboristoj povas vivi samagrade kiel burĝoj; ili ofte havas aŭtojn; ili havas du tagojn semajne por ripozi ĉe marbordo; ili povas loĝi eksterurbe.

Ilia salajro en multaj okazoj sufiĉas por garantii ŝparaĵojn. Ili ricevas helpon pro ĉiu infano; maljuniĝinte ili ricevas pension; malsaniĝinte ili ricevas ripozon, senpagan kuracon, senpagan naskon de infanoj. Senlaboruloj, se ne drinkuloj, ricevas senpage nutraĵon ĉe "labor exchange."

Irante sur la stratoj oni preskaŭ neniam renkontas speciale inteligentajn aŭ intelektajn vizaĝojn. Vere estas la regno de laborantoj.

Tiu demokratio, kvankam mokata kaj severe kritikata de multaj fremduloj, sukcesis krei la belan landon kaj starigi la bonegajn leĝojn, pro kio multaj ekster-aŭstraliaj landoj emas ĝin imiti.

## HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

## Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

Sufiĉo da eraro estas farata, nemal-multaj difektoj makulas en ĉi tiu sistemo administrada, tamen la plusoj estas pli grandaj ol la minusoj.

(2) **Bonhumoreco de la popolo.**

Ĝenerale ili estas simplaj en intèrrilatoj kaj bonhumoraj. Preskaŭ ĉiam ili ridetas kaj ofte estas sufiĉe ĝentilaj. Nekutime estas al rusoj aŭdi, ke nekonatoj preterpasante ekparolas ĉu pri vetero ĉu simple salutas. Ili ofte ŝercas eĉ kun nekonato. Ili ŝatas babili Ĉio ĉi montras ilian simplecon kaj bonhumoron.

(3) **Ili ŝatas legi.**

Ili amas legi ĉu gazetojn ĉu revuojn ĉu novelojn. Samon mi rimarkis en Japonujo: trame, vagone, ĉekase atendantaj sian vicon, surstrate, ĉie oni vidas ilin legantaj.

Certe estas ne malpli grava la problemo pri la kvalito de legataĵo ĉar sola kvanto ne sufiĉas por paroli pri edukiteco de popolo kaj ĝiaj emoj al altaj interesoj. Tiurilate mi nesufiĉe konas.

La preskvantoj de taggazetoj (120-180.000 potage) estas eĉ kolosaj.

(4) **Simpatio al animaloj.**

Mi rimarkis simpation de loĝantoj al animaloj. Mi ne renkontis krudajn scenojn de surstrata batado al ĉevaloj, infana turmento al katoj kaj hundoj, kiel ofte mi observis en mia patrujo. Eble ekzistas krueleco tia, sed ĝi ne evidentiĝas.

Ekzistas en Sidnejo La Reĝa Societo Kontraŭ Krueleco al Animaloj. Ĝi senpage akceptas katojn, hundojn por ilin sendolore eterndormigi. Ekzistas lerneja societo de birdprotektado. Bonkristane!

(5) **Kontrolataj fremduloj.**

Kompreneble ili estas sed tiel lerte kaj nerimarkeble, ke tio ne ilin ĉenas. Tute kontraŭe fariĝis en cetere kara al mi Japonujo, kie detektivoj entrude, malsaĝe vin spionas. Estas agrable, ke tie ĉi oni ne postulas pasportojn; plena malaĵo al libera komunisma Rusujo kaj imperialisma Japanujo, kie sen pasporto homo ne estas homo, kie homo konsistas el korpo, animo kaj pasporto.

(6) **Civiliziloj.**

Demokratismo estas tie ĉi ligita kun la plej modernaj civiliziloj. Gaso, elektro, telefono, radio, — ĉio tio regas vaste en privata vivo. Speciale min interesas la benzinumado de la vivo. En N.S. Kimruijo ekzistas pli ol 205 000 aŭtoj, pli ol 100.000 motorcikloj, pli ol 1.800 aŭtobusoj. La vivo estas mekani-kumata.

Bedaŭre mi ne povas ankoraŭ trovi pozitivajn flankojn, tial mi alvenu al negativaj, des pli, ke estas ĉiam pli facile vidi en la frata okulo malbonajn branĉojn, ol en la koro la dolĉajn; tio estas ja nur homa, kaj mi ne estas esceptulo.

NEGATIVAJ FLANKOJ DE AŬSTRALIA VIVO.

(1) **Tro multe da drinkejoj.**

Ĉu ne vere? Ĉiupaŝe oni vidas drinkejojn. Ĉiam enestas homoj, kaj kio estas plej abomene, virinoj. En neniu lando mi vidis sur strato ebriajn, kompatindajn idinojn de Eva, sed en Sidnejo ĉiam mi vidas tion.

Drinkemo estas la nacia maŝsano kaj malvirto. En stato de ebrio homoj evidentiĝas sian bestan naturoŝ en plej naŭza formo.

Maŝsatas ni rusoj la aŭstralian manieron drinki. Homoj ne sidas komforte en drinkejo, kiel en Eŭropo, sed staras ĉe longa tablego. La impresoj estas tre forpuŝa. Mi memoras, ke en mia lando, estante studento kaj drinkema, mi vizitis bierejojn; sidante kelkhorojn en apogseĝo mola, mi trinkis nur unu botelon, legis, konversaciis amike, skribis leterojn, revis. Tio ne estas drinkeco. Sed tie ĉi homoj staras, rapidas fordrinki kiom ili nur povas kaj forstumblas ebriaj. Malagrabla estas la aranĝo de aparta ĉambro por virinoj; mi neniam vidis tian en Rusujo, kvankam tie la popolo tre ŝatas drinki. Nur prostituistinoj foje renkontiĝas ebriaj surstrate en Rusujo, sed tie ĉi grizharulinoj falpaŝas idiote sur strato kun blunigraj makuloj survizaĝe — honoraj signoj de batalado.

Stranga kaj nekomprenebla estas la leĝo frue malfermi drinkejojn. Kial? Por ke la laboristo povu antaŭlabore ebriiĝi? Same pri la frua malfermo; se homoj deziras ripozi ĉe tablo en drinkejo, li ne povas tion fari post laboro.

(2) **Barbara boksado.**

Frapas nin la reganta ĉie kutimo boksadi. Kio povas esti pli maldelicate malgracia, estetike abomena? Mi vidis kelkfoje, kiel du malsaĝuloj demetas jakon kaj kiel du kokoj batalas sur stratmezo kun bona trafiko, policano staras flanke rigardante, homamaso kolektiĝas, aŭtoj ĉirkaŭveturas. Nenio simila estas ebla en vere kultura lando.

Li estas forta kaj bona boksanto, mi estas malforta sed prava. Li konkeras min, kaj en la okuloj de observantoj li estas prava kaj salutata, kaj mi estas malprava kaj mokata. Tia estas justo de popolo aŭstralia. Boksado estas an-

koraŭ tial abomenega. ke ĝi celas difekti vizaĝon, kiu estas "spegulo de homa animo." Rompi nazon, eligi okulon—fi, eĉ vomige estas paroli pri tio.

### (3) Trouzo de sporto.

Ne neante la ĉiuf flankan utilon de sporto, mi tamen energie kondamnas la troan ardegon kaj kvazaŭ idolismon al ĝi. Laŭ merito oni povus nomi Aŭstralion "lando de drinkejoj" kaj "lando de sportoj."

Kian ajn gazeton aŭ revuon oni enmanigu al si, ĉiutage oni trovas kelkajn paĝojn pri sporto, ĉevalvetkuroj ktp. Eĉ en surstrataj grandliteraj gazetononcoj oni ĉefe legas—pri sporto. La ilustraĵoj estas duone prisportaj. Vi komprenu, ke ne povas ekzisti vera spirita kulturo kune kun idol-adoro al sporto.

Eĉ la plej terura kaj hontinda por kristana lando, kiu posedas milojn da preĝejoj, milojn da pastroj de la plej diversaj sektoj:— en la granda antaŭpaska vendredo, en la tago de kruc-suferoj kaj pro-nia morto de nia Savinto Jesuo Kristo, anstataŭ preĝadi kaj fastadi, la tuta popolo de Aŭstralio, kiel idolanoj, antikvaj grekoj kaj romanoj, partoprenas ĉevalvetkurojn.... Ho, kiel Sankta Johano Krizostomo en la kvara jarcento vipumis en siaj elokventaj predikoj la popolojn pro tia sama sportamo. Kaj kiel ĝustaj estus liaj vipantaj vortoj nun, sed lokaj pastroj forgesis la esencon de religio, cedas al la spirito de la tempo moderna; iliaj buŝoj silentas.

(Finota)

### FROM OUR SUPPORTERS

We thankfully acknowledge the following. The smallness of the sum, however, speaks eloquently of the indifference, not to say discourtesy, of many lapsed subscribers to whom intimation after intimation have been forwarded without eliciting any reply. These, it seems, are content to allow the generosity of a fervent few to meet what appears to be a regular yearly deficit. We trust that an awakened conscience may lengthen next months' subscription list.

Mr. C. Ballard, 1/-; sales in Perth, 2/-; Mr. J. Nishimura, 6/-, Jan., '32; per Mrs. Mumford, 2/6; Mr. Farquharson, 5/-, Jan., '32; Mr. C. Adcock, 5/-, March, '32. Total, £11/1/6.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon, je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots Church Hall, 97 Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Def: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland)

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.*

**Redakcio-Administracio :**

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

**N-ro 130 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Australio. Aprilo, 1931**

## SHALL WE WEATHER THE STORM?

**Deficit of £7 for 1931.**

The first three months of 1931 have proved the most disastrous for the Suda Kruco since April, 1929, when I took over the editorship from Mr. Percy Hudson. For the period named the expense of producing the three issues was £14/10/-, while receipts from subscribers amounted to only £7/14/-.

The seriousness of the position may be more accurately gauged when it is known that for the term January-March, 1930, receipts were £21/10/- against the expenditure of £15/-/-. Included in those receipts were some £11 in gift and advertisement that enabled the S.K. to survive 1930 with a small credit balance for that year. Today, however, we are again face to face with the unpleasant task of liquidating a deficit for the young year of nearly £7. How can this be done?

Now, there is a sum of about thirty pounds outstanding in subscriptions owed by Esperantists still receiving the paper. I am very hesitant in stopping their copies, as several have paid 10/- or a pound after even three years' silence. Surely an appreciable part of this large sum could be paid without further undue delay. Then there are certain sums guaranteed in early 1930 by well-wishers, some of which money is still held by them. Unsatisfactory as it is to feel that the organ subsists, even in part, by the generosity of a bighearted few, and that it is still unable to take pride in its self-support by reason of its inherent value to those that read it, I feel that only by a fresh call to spread the burden over several shoulders can the S.K. be given further life. It seems hardly necessary to emphasise the point that a loss of £7 in

three months is too much for one unaided to bear; other responsibilities stand ever waiting to be met by its editor, whose reasonable desire and aim it is, to make a self-respecting Suda pay its way.

It is clear that the economic situation and the consequent unemployment lie at the bottom of the trouble. Were the times normal, it is safe to say that the S.K. would have been well out of danger to-day, for some of its most soundhearted supporters are without work and therefore unable to spare even the penny a week that constitutes their subscription. May I, then, urge that ALL who are blessed with work or other means strive their utmost to save our organ from announcing its final number. Were such announced I gravely doubt whether, for many long years, Australian Esperantists would again find pride in an organ of their own.

Regrettable as it is, conditions compel me to fix 28 May as a day of drastic decision. Should the answer to this appeal be then found insufficient to meet the deficit of this year, your editor will feel warranted in interpreting it as a mandate to take a step as painful to him as to anyone. Let us pool our available strength to avoid it.

R. Banham (editor La Suda Kruco).  
28 March.

### PLEASE NOTE.

Would **Australian** subscribers kindly use **open postal notes**, instead of, as hitherto, filling in the name R. Banham and the post office.

### TO OUR SUPPORTERS

We give thanks for the following renewals, etc.:—

Mr. P. Holmes, 4/6, Jan., '32; sales



Coburg Club, 1/8; Mr. Archer, 10/-, jan., '33; Mr. R. Cleary, 4/6, april, '32; Miss E. Carrick, 4/6, March, '32; sales W.A., 2/-; Mr. E. McKenzie, 5/-, April, '32 kaj donaco 5/-.—Total, £2/7/2.

### J. G. PYKE MEMORIAL EXAMINATION.

Members of the Melbourne Esperanto Club, feeling that they would like to perpetuate the memory of the late Mr. Pyke in a way both fitting and practical, have decided that this can best be done by establishing an annual examination as outlined in the following rules:—

1. That the examination be called "The J. G. Pyke Memorial Examination."
2. That it be both written and oral. The written to be such as would show that the candidates have a thorough knowledge of the grammatical points and the ability to write clear and correct Esperanto. The oral to demonstrate that the candidates can make practical use of the language.
3. That the examination be held in Melbourne during the last week in November or on an approximate date to be arranged by the examiners.
4. That the examination be open to all Esperanto students residing in Australia, and those successful in gaining 66 2/3% of possible marks be awarded a certificate of competency.
5. That a special prize of five guineas be awarded to the student gaining the most successful pass, competition being restricted to those who have commenced the study of Esperanto not previous to January 1st in the year in which they are competing.
6. That students competing for the five guinea prize forward a declaration signed by the group secretary certifying he or she commenced the study after January 1st in the year in which he or she is competing. Isolated students to sign a statutory declaration.

The examination will aim at eliciting whether the student has a practical knowledge of Esperanto. There will be no dry-as-dust translations or catch questions, and the oral section will be so arranged as to test whether the

candidate is able to converse fluently in Esperanto on subjects of every-day interest. No attempt will be made to compete with the Diploma examination of the B.E.A.; in fact, both examinations could be held on the same day.

The prize of five guineas, awarded to the student who gains the highest pass after only one year's study, will, we expect, entitle the winner to be recognized as the best student in the Commonwealth for that year.

The examination will **not** be done by correspondence. For the first year all candidates must present themselves in Melbourne, but it is hoped that Examining Boards will soon be appointed in other States.

To assure a firm foundation a capital fund is being established. The amount necessary to provide the yearly prize money and expenses is £130. This will be raised by donations, concerts, social evenings, and collections. Until the full amount is collected the prize money and expenses will be taken from the capital fund.

Groups can help by collecting donations and arranging evenings for the fund. Individual Esperantists can send their own donations and collect among their friends.

All contributions sent to Mr. Rawson, 185 Exhibition St., Melbourne, will be gratefully acknowledged. Suggestions in general will also be welcome.

Yours sincerely, W. J. Drummond, E. McKenzie, R. R. Rawson, Trustees of the J. G. Pyke Memorial Fund.

### MIAJ IMPRESOJ PRI AŬSTRALIO (de I. Serišev) (Finata)

Komparu la konduton de la rusa pia popolo kun tiu de Aŭstralio en tiuj sanktaj tagoj, kaj vi eble respondos nee al la demando de aŭstralia baptista pastro Leederer, kiu verkis la flugfolion sub la titolo, "Ĉu devas esti Rusujo evangelizita?" Li forgesis, ke ĝi estis evangelizita antaŭ jarmilo, ke la rusa popolo estas reale la plej pia kaj "Dio-en-koro-portanta," laŭ esprimo de fama rusa psikologiulo kaj tutmonde konata verkisto, Dostoevskij.

#### (4) Ĥuliganeco.

En Aŭstralio estas divastigata ĥuliganeco, eksterdoma diboĉado. Mi pensis, ke nur en dumrevolucia Rusujo disvolviĝis masa ĥuliganeco, sed neat-

endinte en kultura Aŭstralio mi trovis la samon. Ne estas sendanĝere en multaj partoj de Sidnejo trapasi stratojn vespere aŭ nokte: iu tre povas rabi aŭ bati vin, aŭ, se vi estas virino, perforti aŭ timigi. En Aŭstralio ordinare en la edukistemo mankas instruo pri estimo al laboro de aliaj homoj, respekto al tio, kio apartenas al socio aŭ apartaj personoj. Kontraŭe, regas principo de barbaroj: ne estas la mia. do—difektu. Abomene malkultura inklino. Oni ne kontraŭbatalas tion. Jam de infanaĝo idoj kutimas ne estimi fremdaĵon, nepropiaĵon. Ĥuliganismo nasikas ondon da krimoj; jen kial en Sidnejo estas tiom da senleĝeco.

#### (5) **Negastemo.**

Ili ne ŝajnas esti gastemaj. Rusojn tre frapas komence, vidi, kiel vizitantoj ne estas enlasataj en la hejmon, sed estas akceptataj sur la doma sojlo, kaj tiamaniere oni konversacias iajoje eĉ longe. Gasto staras eĉ la sojlo, la mastro aŭ mastrino interne en la koridoro apud la sojlo, kaj ili babilas. Sidante en verando dommastro ne invitas gaston internen, sed parolas kun li, staranta sur la trotuaro. Serĉante laboron mi vizitis katolikan pastron. Li akceptis min ĉesojle, manojn siajn metinte sur la pordon, tiel ke mi ne povu eniri. Laŭ rusa vidpunkto tio estas malgasteme. Se iu volas regali vin, li invitas en restoracion. Tio estas angla maniero de gastigo. La esceptoj nur jesigas la komunan kutimon.

#### (6) **Rigideco de kutimoj**

montras nealtan spiriton kaj nekleran edukitecon de la popolo.

Mi pensis, ke se mi venis en landon de demokratio mi vidos popolon, kiu ne multe atentis pri vesto en la senco, ke ĝi ne faras veston aŭ modon esti idolo. Sed reale mi trovis, ke la vira modo regas severe en la lando; sen kolumo, manumoj kaj kravato homo ne estas alte taksata, kaj li preskaŭ ne havas ŝancon trovi eĉ trivialan laboron. Mi tion spertis.

Ankaŭ rilate al razo de lipharoj, barbo kaj vangharoj. Tio estas absolute necesa, precipe pri vangharoj. Tial la stilo de razumita loka loĝanto estas tute tipa, sed nebela. Komparu tipon de razulo kun tiaj barbuloj, kiaj estas Karl Marks, hinda Rabindranat Tagore, Darwin, kaj aliaj; barbo beligas viran vizaĝon, kaj almenaŭ ne malbeligas ĝin. Kaj persekuti tiun naturan ornamaĵon de viro estas strange.

Tamen barbuloj ne havas ŝancon trovi bonan laboron, kaj vangoharuloj ne trovas ajnan. Mi estis persekutata pro nekutimo razi min tre ofte. "Estas barbarismo," oni min diris. "Estas barbarismo via postulo pri tuta razumado," respondis mi. Tia postulado estas granda perforto al la personeco. Je nomo de kio?

Mi zorge serĉis belajn, majestajn tipojn de viroj en Aŭstralio, kaj neniam trovis: sed en Francujo, Ruslando, vi sur ĉiu paŝo trovas la belan tipon de vireca viro.

Mallarĝeco de menso loĝantara estas ĉiupaŝe evidenta. Aperas homo en nekutime vidata vesto, aperas viro kun longa barbo, portas homo nemodan veston — pasantoj ekhaltas por rigide esplorigardi kvazaŭ ili estas sovaĝuloj neniam vidintaj tian mirindaĵon.

Mi aŭdis, ke ĥinoj ne povas uzi tie ĉi sian naciĵon, ke japana kimono estas nepermesita, kaj se iu aperus en tia vesto policano kaptus la kuraĝulon kiel ofendanton al leĝo. Ĉu ne strange, tion vidi en la lando de libero kaj demokratio? En Ruslando homoj povas porti sian nacian veston, kaj neniu miras pri tio.

Pastroj katolikaj kaj ortodoksaj ne povas uzi sian talaron sur strato, ĉar knaboj ne lasas ilin trankvile pasadi. Ĉio, kio estas ekster normo altiras la scivolemon de loĝantoj.

Lokaj homoj tre malmulte konas pri aliaj landoj, kaj tre superŝatas la sian, pensante, ke nur la aŭstraliaĵoj estas bonaj kaj raciaj.

Kiam fremdulo kun erara akcento kaj neĝusta stilo parolas ilian lingvon, eĉ inteligentuloj indulge ridetas, kvankam tre ofte ili mem ne povas paroli fremdan lingvon. Ili sentas sian superecon nur pro tio, ke ili perfekte parolas sian nacian lingvon, kaj tute ne sentas, ke fremdulo, kiu povas paroli kvankam ne perfekte en 3-4 lingvoj, ja superas ilin.

#### (7) **Kelkaj Strangaj Kutimetoj.**

Rusoj kutimas pensi, ke fajfado per lipoj estas tute nebona kutimo por virinoj; inteligenta ruso ne fajfas. En Aŭstralio estas kutime eĉ por virinoj fajfi. Sed nin frapas, ke per fajfo oni vokas hundon; tion faras eĉ tre inteligentaj virinoj kaj fraŭlinoj. En Rusujo nur hundojn oni alvokas fajfe.

Min ĉiam mirigas fakto, ke loĝantoj timas aŭ malŝatas sunon. Ja la klimato de N. S. Kimrujo ne estas tro varma,

kaj la suno estas sandona por korpo. Tamen en multaj ĉambroj eĉ ne troviĝas fenestro; loĝantoj ŝatas mallumon ĉambre; se estas multe da lumo ili uzas pezajn kurtenojn. Des pli tio estas stranga, ke aŭstralianoj volonte vizitas marbordon, por longe sin bani en sunradio.

Malbone impresas la troa eteco de domkortoĵoj. Oni ne havas sufiĉe da spaco por infanoj ludi, por eksterdoma ripozo, por ĝardenaraĝo. Nemalmultaj estas domoj, kiuj tute ne havas korton. Min persone mirigas, ke loka polico ofte malabundas en tiuj lokoj, kie ĝi estas plej bezonata, kaj abundas en lokoj malpli bezonantaj ĝian servon. Ekzemple, mi loĝas en la Sidneja urbdistrikto Surry Hills, konata pro diboĉado, huliganeco, krimado, prostituado, drinkado. Ekzistas multe da mallarĝegaj substratetaĉoj, kie geviroj drinkas, amoras k.t.p. kaj neniam polico venas.

(8) **"Blanka Aŭstralio."**

La principo de "blanka Aŭstralio" estas maljusta. Ĝi estas opozicia al la principo de vera demokratismo. Se vere kaj juste, ke Aŭstralio devas aparteni al blankuloj, tiam estas vera la principo de azianoj, ke Azio estu por azianoj. Tamen tiu lasta principo tre ne plaĉas al la blankhaŭtuloj.

• Se koloraj rasanj devas esti pelataj el Aŭstralio, tiam estos plene juste, se Aŭstralianoj kaj aliaj blankuloj estos pelataj el Azio. Se principo de Monroe estas aplikinda al Ameriko kaj Aŭstralio, ĝi estu egale aplikinda al Afriko kaj Azio. Azianoj havas nepre la saman rajton fari al blankuloj, tion, kion ĉi lastaj faras al tiuj. Oni diras, sin pravigante, ke kolorrisanoj povus detruiri per senbara invad-enmigro tiujn gajnajn ekonomiajn, kiujn la lokaj laboristoj jam sukcesis pene almiti al si. Sed, kio malhelpus al lokaj registaroj eldoni leĝojn, kiuj devigu kolorulojn subiĝi sub lokaj vivkondiĉoj?

(9) **"Aŭstralio por Aŭstralianoj."**

Ankoraŭ pli hontinda! Pura ŝovinismo. Malamikaĵo kontraŭ la homaro. Kian rajton havas aŭstralianoj tion prediki? Ĉu proklami, ke Anglujo estas nur por angloj, Ruslando nur por rusoj, Ĥinujo por Ĥinoj, plaĉos al aŭstralianoj? Ĉi ties lando eĉ ne kapablas defendi sin kontraŭ invado de iu agresiva lando, tamen ĝi revas pri plena sendependeco kaj izoleco. Mi legis la libron, "Watch The Pacific," kie reliefigas instinkta timo al Japanujo.

**Konkludo.**

Konklude mi diru, ke ĝenerale Aŭstralio bone impresas fremdulon rusion. Ni rusoj tre ŝatas la kondiĉojn de tiea vivo kaj la bonan klimaton. Ni estas danksentaj al la lando, kiu donas al ni rifuĝon. Multaj rusoj volonte akceptas subregatecon sub Aŭstralio kaj deziras al tiu lando sanan evoluon kaj ĉiuflankan progreson, prosperon, ne forgesante emfazi ĝian ĉefbezonojn, nome plivastan mondriĝardon kaj eniron en la grandan fluon de internacia pensado, kontakton kun la grandaj ideoj de tiuj laborantaj organizoj firmbaze la universalan kunfratiĝon de la popoloj.

[Noto. La aŭtoro uzas "huliganismo." Ĉu la vorto estas trovebla en ia Esp. vortaro? Ĝi signifas angle "hooliganism."]

**KURSO PER TRADUKO.**

Kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A.

**TRADUKO 17.**

**KAPTADO DE SOVAĜAJ HUNDOJ EN AŬSTRALIO.**

Pursangaj dingoĵoj ĉiujare fariĝas pli maloftaj. La ordinaraj dingoĵoj devenas de pariĝo de pursanguloj kun domaj hundoj sovaĝiĝintaj; dum pli ol duono de jarcento estis multaj tiaj pariĝoj, kaj iuj el la miksrasuloj estas grandegaj, fortaj bestoj, ruzaj kiel ŝafhundo fariĝinta safmortigema. Ili evitas kaptilojn kaj turnas sin for de venenaj logaĵoj. Ĉe bivakoj oni ofte rakontas pri famaj dingoĵoj tiaj, kia estis unu dingo, kiu, liberiginte (1) sin el kaptilo je la kosto de piedo, dum multe da jaroj sukcese spitis siajn homajn malamikojn. Fine oni mortigis ŝin. Mi pensas, ke tio okazis per pafado de malproksime.

Restaĵoj de dingoĵoj estas troveblaj kun fosiliaj ostoj de bestoj, kies rasoj ne plu ekzistis antaŭ eble dek kvin jarmiloj.

(Fino)

**VULKANOJ.**

Estis du ĉefaj periodoj de vulkana aktiveco. La unua estis tiam, kiam la malvarmiganta supraĵo de la terglobo estis solidiĝanta, kuntiriĝanta, krevanta, kaj kaŭzanta pro tio tiel grandegan preforton, ke la fluida internaĵo premiĝis supren en la formon (2) de montoĉenoj. Post tio sekvis kvieta epoko,

dum kiu la kuntiriĝadoj de la internaĵo kaj supraĵo de la globo estis egalaj. Poste venis la nuna vulkana periodo. La tera krusto jam (3) estas dika kaj malvarmeta, sed la internaĵo ĉiam perdas varmon per konduko tra la supraĵo; ĝi ĉiam kuntiriĝas, kaŭzante la supraĵon sulkiĝi tiel, kiel sulkiĝas pomo, kiam ĉi tio perdas la malsekecon.

Tiel (4) la tera krusto ŝvelas, sulkiĝas, krevas, glitas. Pro ĝia premiĝo supren formiĝas montoĉenoj, dum pli malsupreniĝas la fundo de apuda oceano, ofte kaŭzante tre profundan akvon proksime al (5) altaj montoj, kiel ĉe la marbordoj de Ameriko kaj Nov-Zelando kaj laŭlonge de la longa etendiĝo de la marbordo de Kamschatka ĝis la Japanaj insuloj.

Ĉar la tero en tiuj mondpartoj glitas por alĝustigi sin al novaj fizikaj kondiĉoj, la intensa interna premforto fandas la rokaĵon en lafon (6), kiu premiĝas supren, iom post iom plenigante la vulkanajn kraterojn. En iuj lokoj la lafo superfluas je regulaj periodoj, kiel en la vulkanoj de Havaii. Preskaŭ ĉiam la linioj de vulkana aktiveco estas laŭ la bordoj de maroj kaj lagoj, kaj en vulkanaj erupcioj ĉiam estas granda elsputado de vaporo. Jen kio okazas. La akvo de lagoj aŭ maroj penetras tra la teraĵon ĝis ĝi atingas la fandiĝintan rokaĵon. Tie ĝi transformiĝas en vaporon (6) de altega temperaturo kaj premforto.

(Per tio ĉi la kurso finiĝas.)

#### NOTARO 17.

1. Adverba participo. Cox 211.—2. "En la formon." Kiam oni priskribas la finan staton de ŝanĝiĝinta objekto aŭ la rezulton de aliĝo, oni uzas akuzativon post "en"; ekzemple: li rompis la vazon en pecetojn; demono turniĝi ofte povas en anĝelon (Ham.); la milito kondukas multajn en mizeron; Alexandro turniĝis en polvon (Ham.). 3.—"Jam" ĉi tie havas la signifon de la Angla "now" akcentata por esprimi ŝanĝon okazintan, ekzemple: la infano ploris longan tempon, sed jam ne ploras (is not crying **now**, aŭ "isn't crying any more").—4. "Tiel," thus, so, in such manner. 5.—"al" aŭ "de".—6. Vidu noton 2.

#### TRADUKA RONDO CEASES.

Regretfully we are compelled to announce cessation with this number of the translation course conducted by

Mr. George Gordon, F.B.E.A. For some time past the interest manifested has not been sufficient to warrant the time and labor entailed. This decision will doubtless be felt keenly by several who have regularly forwarded their work. To these we would warmly recommend correspondence with advanced Esperantists abroad and the faithful study of "La Plena Vortaro" (Grosjean-Maupin), obtainable through the A.E.A.

Mr. Gordon would be pleased to answer, to the best of his ability, questions as to Esperanto language and literature sent to him by any Esperantist whatsoever. Address: Union Bank, Christchurch, N.Z.

#### GEEDZIĜO.

**Banham-Dawes:**—Je la 28a de februaro 1931 geedziĝis en la metodista preĝejo, Palmerston-str., N. Carlton, Melbourne, Frank Reginald, unuenaskita filo de Herbert kaj la estinta Florence Banham, de Lowestoft, Suffolk, Anglujo; kaj Hilda, sola filino de Percy kaj la estinta Amy Burr Dawes, de Maidstone, Kent, Anglujo. Faris la solenon Pastro G. F. Dyson.

#### ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—

That Sweden's most famous living author, Mdme. Selma Lagerlof, has made a contract with La Eldona Societo Esperanto, Stockholm, for publication of all her works in Esperanto. Upton Sinclair, author of "The Jungle," a leading American writer, has also decided to have his books translated into the interlanguage.

That Jean Forge, author of "Abismoj," is at work on another original novel.

That the Berlin police had to moderate the enthusiasm engendered by the visit of Andrew Che, remarkable teacher of Esperanto, to that city. Hundreds have enrolled in his courses.

That Esperanto version of "All Quiet on the Western Front" met with tremendous success.

That the Director-General of the Bulgarian Post has again recommended Esperanto to the staff. An officially subsidised course in Esperanto has now been organised in the Postal School in Sofia.

That at Liverpool University, to which the late Dr. Buchanan left £4,000 for the founding of a lectorate in Esperanto, several eminent professors are adepts in the interlanguage. There are already chairs of Esperanto in the universities of Geneva, Zagreb, Kracow and others.

That the number of tramway employees speaking Esperanto is increasing every day. Trammen in Dusseldorf using the language are distinguished by a special armlet.

That at Lodz (Poland) a course of 50 police officers has been opened. Classes for German gendarmes will shortly be started.

That the Swedish parliament has again adopted without discussion a subsidy for teachers' Esperanto classes. The sum fixed was 2,000 kr. Courtrai (Belgium) has also granted a subsidy of 1,000 fr. for popular courses.

That Boulogne now has its Place Zamenhof. Congratulations to M. le Maire de Boulogne-sur-Mer.

### "PER BALONO AL LA POLUSO" Gravsingnifa verkego.

Post nur unu monato da laboro s-ro Stellan Engholm finverkis lastajn lini-ojn de sia belefarita traduko en Esperanton de la supra 400-paĝa libro. Herkulesa tasko sendube farebla nur de homo konscianta, ke li havas postkontrolanton, kia s-ro Paul Nylén.

La trimonata batalo kontraŭ la frostglave armita naturo finiĝis per la malvenko de tri militantoj de la scienco, Andree, Frankel kaj Strindberg, kiuj, kun la fortoj konsumitaj, en mortmantelo falkuŝis, por restadi tridek jarojn dormantaj en arkta silento.

La heroeco de la antikvaj "vikingoj" reflekte brilas el ĉi tiu eposo. El la yortoj de Andree mem oni sentas la animospiro de tiuj bravaj, vastevagaj lupoj de l'nordaj maroj:—Kaj kiuj estas pli destinitaj ol ni svedoj por fari tian provon? Kiel alte civilizita popolo, delonge karakterizata de plej sentima kuraĝo, loĝantaj en la proksimo de la

polusregiono, intimaj kun ĝiaj klimataj proprecoj kaj de la naturo mem harditaj por elteni tiujn klimataĵojn, ni apenaŭ povas entute liberigi nin de certa sento pri devo en la dirita rilato.... Ĉu ne ni el inter ĉiuj aliaj nacioj estas vokitaj kaj konvenaj por plenumi la grandan taskon? Kaj ĉu mi eraras pri tio, ke same kiel ni esperas kaj atendas, ke la mez- kaj sudeŭropaj popoloj esploru Afrikon, same ili atendas de ni, ke ni traesploru la blankan mondparton?

La historio de la malfeliĉa flugo estas jam skelete konita de la gazetlega mondo. Tiuj multaj, kiuj povas senti korvibrojn de admiro, sorbante de la paĝo detalan vortbildon de grade malvolviĝanta tragedio heroeca, nepre posedigos al si ĉi tiun riĉe prezentitan volumon.

La verko estas cetere grava en tio, ke ĝi rajtas servi kiel esprimilujo por tiuj, kiuj, verkante pri arkta explorekipo, glacilanda topografio, serĉos taŭgajn terminojn.

Surbaze de la notlibroj de Andree estas kompilita sekveca rakonto de la tragedia ekspedicio, jam de ekiro el Ballonghuset ĝis la morteca sceno sur Viton. Tiam laŭvicas traduko de la Andree - taglibroj, stenografiaĵoj de Strindberg al sia fianĉino, kaj plena raporto pri la surpriza eltroviro sur la restaĵojn.

Notindaj estas: Tralibra uzo de sen-deklinacia formo ĉe la daĵoj, ekz., "la 10 majo envenis inĝeniero N."; iniciat' (iniciat'); konstruktor' (konstruist'); ĉu balono povas "veli"?; guideropanta (konduk- aŭ gvidŝnura); loglibro (vojaĝlibro, ŝip(tag)libro); altaĝa (komparu profundaĝa, Zam.); p. 180-1 distrikto (regiono); 224 enparkigitaj (!); knoto, marmejlo (6086.7 futoj), Rhodes kaj Fulcher-Long havas "nodo"; impregni (saturi); eratika (malkonstanta, sendirekte vaga; frikcio (froto); komuluso (kumuluso, amasiĝa); baŝliko; kalota; naŭtika (mar(ist)a, navigaci(art)a.

Pezpapere luksa. Prezo 10ŝ kaj 12/6 ĉe B.E.A.—Robo.

## HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plézuro, kiu donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

## Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

**ANGLA GENTLEMANO.**

Konsidere al la tutmonda intereso pri la Andree-a afero, ni presigas jenon el la taglibro de kapitano Scott, kiu pereis kune kun siaj subuloj ĉe la malfeliĉa sudpolusa ekspedicio en 1913.

"Vendredo, 16 (aŭ) 17 marto. Mi dubas pri tio, kiu nome estas la dato hodiaŭa, sed pensas la duan ĝusta. Bato post bato ĉiam faladas sur nin. Ĉe tagmezmanĝo kompatinda Oates (pron. otz) anoncis, ke li ne plu povas elteni la marŝadon kaj petsugestiis, ke ni lasu lin en lia dormsako. Tion ni kompreneble ne povis, sed sukcesis instigi lin ekprovi la posttagmezan marŝon. Spite al ĝia terura suferigo li baraktis antaŭen, kaj ni do faris plurmejlan distancon. Nokte li montriĝis pli malsana, kaj ni konkludis, ke lia fino tre alproksimiĝas. Mi petas, ke se iu trovos ĉi tiun skribon, oni diskonigos la faktojn rilate al li. La plejlastaj pensoj de Oates estis al la patrino, sed ĵus antaŭe li fieris en la kredo, ke lia regimento tre sentos honoron pro lia mortmaniero. Ni ja atestas lian bravecon. Dum semajnoj li eltenis teruran suferon sen ia plendo; ĝis la plejfino li vole diskutis aferojn ne rilatajn al nia situacio. Li ne rezignis esperon antaŭ ol la morto lin prenis. Vere li estis animo brava. Li ekdormis la antaŭlastan nokton, esperante ne vekigi, sed li devis ankoraŭ unu fojon vidi lumon de la mateno, tio estas, la hieraŭa. Ekstere de la bivako hurlis neĝventego. Li diris, "Mi iras eksteren; eble mi restos for iom longa tempo". Eliren li paŝis en la ŝtormon, kaj de tiam ni ne plu vidis lin. Ni sciis, ja, ke kompatinda Oates intencis iri renkonti sian morton, sed malgraŭ tio, ke ni penis persvadi lin ne fari tion, ni taksis ĝin kiel agon de brava viro kaj de angla ĝentlemano. Ĉiuj ni esperas fronti la vivfiniĝon en spirito simila al la lia, kaj vere la finiĝo ne staras tre fore. Ekstere la bivakon kirlneĝo vipadas. Ne estas plu esperinda ia pliboniĝo de nia situacio. Spite tion, ni tenos sufiĉe alta la spiriton ĝis la fino, sed vere ni ĉiam ankoraŭ pli malfortiĝas, kaj la fino jam ne povas tre prokrastiĝi. Afero bedaŭrinda...sed mi pensas min ne plu kapabla skribi (lasta noto) Pro Dio, ne lasu niajn familiojn mizeriĝi.

Klarigo: Oates iris el la bivako en la ŝtormon, por ne ĝeni la kamaradojn per la spektaklo de sia agonio.

Noto: Kabe uzis "ĝentelmeno" en "Patroj kaj Filoj"; Bulthuis en "Idoj

de Orfeo" kaj Baghy en "Dancu Marionetoj" preferis "ĝentlemano"; Vallienne en "Kastelo de Prelongo," "ĝentilhomo." La angla vorto havas diversajn signifojn, kiuj ne estas tradukeblaj de unu sama Esperanta vorto. Ĉi tie "gentleman" enhavas en si fundamentan ideon de "nobleco" kune kun tiuj de "(laŭnatura) kavilireco aŭ nobleco."

**KRONIKO.**

**Perth, W.A.**—Jen denove novaĵon de nia Societo en la Okcidento. Je la 12a la Sekretariino ricevis leteron de s-ro Pook en Waroona, W.A. per kiu li sciigis nin pri nova grupo, kiu stariĝis pro lia sindona laborado en tiu urbeto. Oni nomis ĝin la "Suna Grupo." Dekdu anoj jam komencis studi entuziasme nian karan lingvon. S-ro Pook estis elektita prezidanto, s-ro Murray sek. kaj kasisto.

Merkredon vesperon la 18an de Marto kelkaj anoj de la Perth Societo vizitis la ĉef-telegrafejon ĉe la G.P.O., laŭ afabla invito de s-ro Saar. Nova kaj interese sperto tio estis por ni ĉiuj. S-ro Saar interese klarigis al ni la multajn telegrafilojn; per iu ilo oni povas sendi kaj ricevi kvar sendaĵojn samtempe laŭlonge de la sama linio. Tre strange estis, rigardi la skribmaŝinojn, kiuj tipskribis aŭtomate.

Pro malfacilaj vivkondiĉoj iuj el niaj anoj ne povas ĉeesti la kursojn kiel antaŭe, tamen ni esperas ricevi novajn kaj malnovajn anojn post nelonge.

**Masterton, N.Z.**—La nia nova kurso de la jaro komencis Mardon, la 17an de Februaro. La membraro konsistas el de kok personoj, inter kiuj troviĝas du novaj anoj; kaj aliĝos frudate ankoraŭ du aŭ tri.

Novan lernolibron, "Step by Step," nun uzas nia instruisto, s-ro Dewar. La libro estas tre taŭga kaj donas plaĉon same al spertuloj kaj novuloj.

Oni decidis fondi grupan bibliotekon; kaj tiuj membroj, kiuj posedas Esperanto-librojn tre bonvole donis literaturon por helpi atingi la celon.

Pro la granda sukceso de la antaŭa fest-vespero, la grupo intencas aranĝi Esperanto-dancon post la okazo de la 2a N.Z. Kongreso, en Aprilo.

La lokaj redaktoroj ĉiam tre kompleze publikigas informon pri Esperanto. Dum Februaro ses raportoj kaj kvar artikoloj aperis taggazete. Ni dissemu konstante!

**Melburno, Vik.** — En feb-o s-ro P. Holmes instrue parolis pri la fonografo kaj perdesegne ĝin ilustris sur nigra-

tabulo. Edison kiel unua eksperimentis en 1877, kiam li elpensis maŝinon, kiu, kvankam krude, reaŭdigis voĉon de la elpensinto. La son-ondoj estis stano. Grade la eksperimentoj progresis ĝis fine oni elektre aŭdigis la voĉon.

La 17an de marto okazis ekzameno entranĉitaj vertikale sur cilindro el folia por B.E.A. diplomo.

Reveninte el Canberra, s-ro C. Clarke estis kore akceptita je Societa kunveno.

S-ro Skurrie amuze fantaziis pri vojaĝo al la Luno. Lia priskribo pri la lunhomo kaj lunana vivo estis forte ridiga.

### ADDRESS BEFORE POSTAL SERVICE.

On 25th February, before a representative gathering of all branches of the service at the Postal Institute, Brisbane G.P.O., Mr. Maurice Hyde delivered an interesting lecture, "Esperanto in the Postal Service." It was reported in the press, mention being made of the fact that the Superintendent Telegraphs and the Superintendent Mails were present. It is hoped to form a class, or, failing that, to establish a course of lectures.

### SECOND N.Z. CONGRESS.

4-6th April.

The Second N.Z. Esperanto Congress was held at Auckland from Easter Saturday to Easter Monday. Arrangements were made for a public propaganda meeting, service at New Church, and a social evening.

### RESPEKTIVE"

(Al la "Suda Kruc").

Sinjoroj:—Mi konsentas, ke tiu uzo (vidu S.K., Decembro, 1930) de "respektive" estas ofta ĉe kelkaj eŭropaj verkistoj, sed ne bona. Fako estas, ke la radiko "respektiv'" estas uzata ĉe kelkaj lingvoj alie ol ĉe la angla lingvo. Mi (native!) preferas limigi ĝian uzon al tiu, kiun ĝi havas en angla lingvo.

Londono. —M. C. Butler.

### ANONCOJ.

Interŝanĝas p.mkjn., kaj il. postkartojn afrankitaj bildflanke. Mi respondas ĉiam. Wilh. Lange, Petrikirschplatz 8, Eisleben, Germanujo.

I wish to correspond with Australian gentlemen in English. Willi Schneeman, Berlin S.O. 36, Wrangelstr. 86.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots Church Hall, 97 Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building." 449 Pitt Street. Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinlando (Queensland)

**Wellington Esperanto Club.**—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 131 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. Majo, 1931

## OUR POSITION EXPLAINED.

Four months' income: £14/8/-. Four months' expenditure: £19/14/6; deficit: £5/6/6. Why? Let us see. Out of some 210 from whom we should receive regular subscriptions, only 140 are paid up; furthermore, some of these are valid for more than one year—some of them are first-year subscribers, to be regarded as weak reeds until their second subscription comes to hand. The cost of producing the S.K. is £56/5/- a year; 140 subscriptions at 4/6 yield only £31/10/-, on the wrong side £24/15/-. It will be seen then that at least 200 regular subscribers are essential if the S.K. is to pay its way on its own value. In other words, sixty more valid names are needed to carry the paper across the flood of present evil circumstance. While it is open to question whether it can be done, there is no doubt that such is the only satisfactory way. The list in this issue of those that sent money contains for the most part names well-known in the movement; scores to whom notices of subscription-expiry were posted are seemingly indifferent to the imminent danger confronting our enterprise. This is not fair to the few who give time and again; it is not fair to the administrator, who feels that the S.K. merits a role more dignified than that of alms-receiver at the door of the Esperanto movement in a part of the world supposedly progressive.

While heartily grateful to individuals, to the Melb. Esp. Soc., and to the N.Z.E.A. for their selfless activity on behalf of the gazette, the writer is urged to warn the general body of responsible Esperantists in this hemisphere that future years will hold for them a standing reproach in that they lacked, in a time of crisis, an associa-

tion of clubs, societies and groups throughout Australia and N.Z., under whose aegis a firmly founded organ could have regularly gone forth.

April 29th.

—R. Banham.

## ANKORAŬ ŜATESPRIMO.

Skribis s-ro T. Jung, redaktoro de "Heroldo de Esperanto," en letero al Box 731F.: "La Suda Kruco" estas eta, kaj laŭ tipografia vidpunkto la artikoletoj estas iom tro kunpremitaj; sed mi ĉiam ĝojas, kiam ĝi alvenas. Ĝi estas pli regula ol multaj pli grandaj organoj, kaj ĝi estas bona pruvo por tio, ke en la malproksimega (de ĉi tie) Aŭstralio la samideanoj ankaŭ laboras kuraĝe kaj diligente. Do, mi gratulas vin precipe pro la regula eldonado de via organo."

(Legante la supran laŭdon de unu tia ŝatanto, nepre kompetenta por ĝuste taksii la kvalitojn de nia gazeto, ĉu ne vere, ke eĉ la plej apatia ricevanto de ĝi sentas puŝon de l' spirito kaj riproĉon de la konscienco, en tio, ke li lasis glitii nian organon jam ĝis la efektiva rando de la abismo?)

## ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—

That the Paris Esp. Federation has been granted a subsidy by the Conseil General de la Seine (a body similar to the London County Council); the municipal councils of St. Etienne and Orleans have also helped in like manner the Esp. organisations in those towns.

That the French "Annuaire Industriel," big trade directory, now contains an Esperanto section.

The Italian Touring Club, membership 400,000, has issued an "Italian Baedeker" guide book to Milan and the Lakes of Lombardy. Satisfactory sale



will mean definite winning over to Esperanto of the largest tourist assoc. in the world. Price 5/-, inc. post at B.E.A.

That a new fortnightly, *Katolika Vivo*, is published at 22 Cours Albert-Premier, Paris 8e. It spreads news of the Roman Catholic Church throughout the world.

That 1,300 "Andree" books ("Per Balono al la Poluso") have already been sold.

That there are 6,262 teachers of Esperanto in 61 countries of the world, according to the latest statistics compiled by Dr. Dietterle. Esperanto is taught in 926 schools in 38 lands.

That the illustrated Polish review *Spolnota* printed an article in Esperanto on the necessity of securing to Poland the town of Danzig as an outlet to the sea. One example among several of the use of a neutral language for national propaganda.

That a chair of Esperanto has been established at Leningrad University. In this city are 50 Esp. groups. There is also a course running at Irkutsk University.

#### PROPOSED SYDNEY CONGRESS

Would all Esperantists likely to be able to attend an Esp. Congress in Sydney about January, 1932, kindly get into touch with Mr. Rutland, c/o W.E.A., 2nd floor, Manning-ch., 449a Pitt-st., Sydney, who is a member of the Congress Committee.

#### "LITERATURA MONDO."

We have received the first three numbers of the above publication. Enjoying the collaboration of the finest writers of Esperanto to-day, this monthly, published in Hungary, aims at giving permanence to the choicest work now being achieved in the language, and at exercising the closest scrutiny over all such books as merit its competent appraisal.

Printed on the finest art paper with a technical perfection that commands admiration, this review should receive the support of every Esperantist who can appreciate the beauty, wit, and realism that characterise the belletristic literature of our language.

Our old Melbourne club member, Mr. L. Thomson, is the agent in Australia

for the "Literatura Mondo." See advt. in this issue.

#### "KOMPLETA ESPERANTA RIMVORTARO."

Jen libreto, kiu devas sidi sub la mano de ĉiu versfarulo verdstela. Kial longe cerbumadi, serĉante rimon por "kaĉ"? Ekrigardeto en la verko tuj donas la bezonatan "maĉ", aŭ—"kraĉ"! La uzanto demandas al si, por kio staras en la teksto radikoj ankoraŭ nerimeblaj, kiaj akv, falĉ, aln, fajf. Tial, li legu kunkune la eruditan artikolon de d-ro Kalocsay pri La Esperanta Rimo, en *Literatura Mondo*, n-ro 3. Vera monumenteto modesta al fera pacienco de la aŭtoro, Maur. Jaumotte, por kiu publikigis La Belga Esperanto-Instituto, rue du Petit Chien 11, Antverpeno. Prezo 2 belgaj frankoj.

#### KRONIKO.

**Melbourne, Vic.**—Ĉe la Societa kunveno je la 3la de Marto, s-ro Percy Holmes donis paroladon pri la telefono. Li priskribis la antikvajn metodojn de komunikado ĝis tiuj de la nuna tempo, kaj klarigis pri la elektra magneta principo de prof. Graham Bell, kio estas hodiaŭ la sama, fundamente, kiel kiam li elpensis ĝin.

Iun sabaton antaŭ ne longe, kelke da Societanoj faris ekskurson ĝis St. Helena, ili ekvidis inter la arboj, etan malnovan preĝejon, kiun oni nomas "Roza Kapelo." Ĝi estis konstruita en 1859 de Anthony Beale, kiu alvenis de St. Helena kun sia familio en 1839. Fenestroj, predikejo, memorkartuŝoj, kaj baptopelvo restas kiel memoraĵoj de la mortintaj familianoj, kies tomboj sin trovas en la tombejo apud la kapelo. Oni diras, ke la familio loĝis en St. Helena dum la malliberco de Napoleo.

**Coburg, Melbourne, Vik.** — Kontentige progresas la Coburg'a Esperanto-Klubo, kiu kunvenas ĉiujaŭvespere en The Labor Hall, Sheffield-st., Coburg.

En 26 marto anoj aŭskultis al instrue interesa lekcieto pri Roturua, unu el la ĉefaj termalaj lokoj en Nov-Zelando. Donis ĝin f-ino Ivy James, kiu per siaj informoriĉo kaj parolstilo alte plaĉis al tridekkelko da ĉevenintoj. Ŝi ilustris dirojn per p.k.-oj de la ŝprucfontegoj kaj bolkotejoj, kaj per specimenoj de la koncernaj argiloj, sulfuroko

kaj rezino el "kaŭri"-arbo (dammara australis).

Membroj preskaŭ ekscitiĝas pro tablotenisa konkurso, kiu komencis en 30 aprilo. Porviran kaj -virinan premiojn donacis s-ino A. Hintze kaj f-ino O. Spencer. Espereble la konkurso kaj la ofte aranĝataj festamuzaĵoj provizos al ĉeestantoj belajn okazojn por lertigi la langon je nia muzika lingvo.

**Balwyn, Melb.**—Nova grupo el dek personoj kunvenas ĉiusemajne en la hejmo de s-ino Mumford (nee Sinnotte). (La membroj studas diligente kaj donas al la gvidanto motivon esperi.

### TO OUR SUPPORTERS.

Thanks for the following: Mr. F. Thomas, 4/6 jan., '32; Mr. F. McLeod, 4/6, apr., '32; Mr. D. B. Thomson, 4/6, feb., '32; Mr. F. Davey, 4/6, jan., '32. Mr. M. Barnett, 9/-, mar., '32; Mr. N. Thomas, 9/-, julio, '32; Miss Griffin, sales, 1/8; sales at Club, 2/-; Westralian E. Soc., 5/6, julio, '31; Mr. H. Facer, 5/-, majo, '32; Miss de Novak, 5/-, apr., '32; Mr. N. Perkins, 4/6, jan., '31; Mr. O. Behncken, 5/-, mar., '32; Miss D. Wells, 4/6, mar., '32; Mr. M. Hyde, 20/-, jan., '34; Mrs. McNab, 5/-, dec., '31.—Total, £4/14/2.

Donations in response to appeal: Mr. H. Byatt, 20/-; Messrs. Barnett and Thomas, 2/-; Miss Trundle, 5/-; "Amikino," 10/-; Mrs. McNab, 5/-.—Total, £2/2/-.

### ASIATIC ROOTS IN ESPERANTO?

Stephen Mladenov, professor of comparative philology at Sofia University, while approving Esperanto in certain points, doubts the wisdom of Zamenhof in limiting to the chief culture tongues of Europe the field from which he drew his "international" vocabulary for the language (see Heroldo de Esp. 12/9/30). He says inter alia: "In its present aspect Esperanto is principally a Latin-Germanic language; Slavic elements in it are very few, nothing is taken from great branches such as the Indo-Chinese, the Semitic, and the Ural-Altai. In order that Esperanto be truly international in its elements all those languages should be laid under contribution..." The founder of Baháism, Abdul Baha, while urging that all his disciples learn Esperanto, also challenged the soundness of Zamenhof's decision, when he asserted that

"Esperanto should contain roots drawn from diverse languages" (p. 121 Baha'u'llah kaj la Nova Epoko).

Now, to diversify or enlarge the basis on which the international language is set would merely result in making one of its conditions, ease of learning, impossible. The Asiatic has nothing to gain by the inclusion of non-European roots, for if say Japanese stems were introduced, Chinese, Hindustani, Persian, Turkish and others would infiltrate, the outcome being that the Japanese Esperantist would find himself compelled to learn hundreds of words more strangely exotic to him than the comparatively well-known French and German neologisms that are ever drifting into Esperanto literature, for the natures of these European languages are more or less familiar to every Japanese student, whereas Hindustani or Turkish is as unknown to him as Sanskrit.

From Europe, Russia and America over the rest of the world radiate the dominant influence of ideas sociopolitical, philosophical, religious. The net of Occidental commerce enfolds the globe; the tongues of the Western world are heard along every Eastern seaboard. It is clear, then, that the success of any project of interlanguage depends on its prior acceptance and use by the nations of Europe. When these unite to overcome the barriers of language, they will fall throughout the civilised world.

The relatively wide use of Esperanto by an eastern nation, Japan, has not, so far, made it necessary for the Language Academy to sanction as official a single Japanese root. Some few words such as "kimono" have, of course, long been fully international, and as such have been assimilated into Esperanto under its 15th rule. Japanese Esperantists have found that in translating pieces of their nation's literature only a very moderate introduction of Japanese stems has been necessary, and in using them they have for the most part only resorted to the recognised device of imparting by that means a certain national flavor to the text, even as English writers do with their albergo, estaminet, podesta, midinette and so on.

When the full history of the international language is written it may well be that to Dr. Zamenhof will be

given the credit for the keenest foresight in laying down a principle, the knowledge of which was essential to the right constructing of the common auxiliary tongue of mankind—the principle that warrants Esperanto in naming itself a synthesis of the international elements of Europe's culture tongues.

### “PINOKJO”

de C. Collodi (trad. el itala originalo Mirza Marchesi).

La literaturo Esperanta estas ne tre riĉa je la gemoj de l'vere valora porinfana verkaĵaro, jam legebla en ĉiu grava nacilingvo. Ekzistas nur tradukeretoj el laboro de fratoj Grimm, kies fantaziaĵojn streĉokule ensorbis etuloj de kultura tutmondo. Ekster la brila traduko de la Andersen'a fabelaro, “La Karavano” de Haufmann, la elĉerpoj el la “Mil kaj Unu Noktoj,” “Rakontoj pri Feinoj” de Perrault, kaj garbetoj dise kolektitaj el fruktoplenaj kampoj de l'germana popolimago, estas multo taŭga por kontentigi al tiu, kies juneca animo ankoraŭ iam sopiras la naivajn sonĝflugojn de l'infanaroj.

Kiam, en mezo de la pasinta jarcento, Carlo Lorenzini verkis la unuan linion de “Pinokjo” — “Kiamaniere majstro Ĉerizo, lignaĵisto, trovis pecon da ligno, kiŭ ridis kaj ploris kiel infano”—li jam ekkomencis skribon destinitan eternigi alian nomon ne nur en la koroj de la itala etularo, sed ankaŭ, ni nun rajtas diri, en la koroj de fantazi-amantoj tra la civilizita mondo.

Plue, ĝia allogo ne limiĝas je la junaĝuloj. Dum lego en vespera horo, maturulo, lasante liberon al sia spirito, enpense sin trovas transportita en sian ludĉambran liteton de antaŭlongaj jaroj, por tie dolĉe dronadi en tiuj mirsongaj aventuroj, kiuj lin ravis tiame. Li iras kun la petola pupeto, kreita el ligno de baldaŭ bedaŭranta tion ĉar-pentisto. Li akompanas ĝin sur vojoj semitaj dense per multspecaj danĝeroj. el kiuj ĝi lerte elturnas sin aŭ ĝustatempe trovas helpeman manon por tio. Ĉiu situacio de la kompatinda Pinokjo, kiun la vivo senĉese persekutas, estas prirakontita kun netrudaj, bele enteksitaj linioj pri la moralo, kiom ĉi tio rilatas al la formiĝanta spirito de la juna leganto.

Estas sentata tra la traduko la varma spiro de la suna Toskana, la gajige stranga komikeco de la riĉe dotita Col-

lodi. Troviĝas kelkaj kritikindaĵoj rilate la lingvon, jene: Pĝ 1, hejti (varmigi) la ĉambron; 14/15, kial “daŭris grumbli,” “daŭrigis dormi”?; 18, de kvin kilometrojn (!); 22, varmumis (varmigis); 26, vipilo (vipo), ogro (giganto); 46, aer-koloran (?); kelkloke oni legas frazojn ŝajne tro idiotismajn, kiaj 84, “Kian sukoni vi trovis, kredigante al mi la historieton pri la ŝarko?” (ĉu vi opinias min stultulo, penante kredigi min...?); 121, “Paciencon unu kornon!” (slango?); 92, fumumitan (fumaj); tranĉumita (pecete distranĉita); 132 malkonvenan (? fortfrapan); 135, “ke mankis nur ereto al ke li falu delirante” (ke preskaŭ li falis...); troa uzo de -um, tineumita (tinee manĝita, difektita de tineoj); 148, muldas (min la vesto), (la vestoj bonege sidas, Zamenhof); 150, P. ne sciis plu eĉ li, ĉu li estas vere vekita aŭ ĉu li sonĝas” (eĉ li?). La 50 lastaj paĝoj estas ne zorge verkitaj kaj bezonas kontrolon de revizianta neitallingvano.

Prezo 3/6 kaj 5/- ĉe B.E.A. (Robo.)

### SE GRENERETO...

de Kenelm Robinson  
eldonita de Heroldo de Esperanto  
160p. tole bindita, ses ŝil.

Kolekto da diversaj verketaĵoj el kiuj kelkaj jam aperis diversgazete Esperante.

Kiel provo respeguli por tutmonda legantaro la animinfluan, moraron kaj lingvaĵon (eĉ fian) de angla pensionlernejo (boarding school) porknaba, la ĉefa vortbildaro eble rajtas preson. La verkinto tamen ne plene sukcesis, penante traduki Esperanten tipajn tiaknabajn esprimojn. Ŝajne li mem sentis tion, ĉar por neanglalingvanoj li antaŭgardante prezentis kun piednoto certajn vortojn prenitajn rekte de sur la knabaj lipoj. “Inda knabo” tute ne redonas la nepre delikatan, malfacilege kapteblan nuancon de l'angla “decent chap”; “stultulo” nur malforte “silly ass.”

Oni ĝenerale ne aprobas la lingvaĵon per kiu la aŭtoro elektis pritrakti kelkajn epizodojn ellaborante sian temon. Ĉu necese paradigi antaŭ nefakula mondo tiom malagrabla la sepsan interparoladon kaj porkeajn petolaĵojn de iuj maturiĝantaj junuloj? Tia “literaturo” pliĝuste troviĝas sub la nazo de pensputraj stratbuboj ol sub tiu de la normala Esperantista publiko, kies

aĉetsubtenon la aŭtoro supozeble celas. Nur en fakskriboj de Ellis aŭ Freud tia esplorado en homaj sterkaĵoj havas konvenan lokon. La scienco ja devas ĉion ampleksi. Sed por distra aŭ pri-pensiga legado, ĉu ne estas ofendo tio, ke leganto iam kaj iam ricevas frapojn al lia (aŭ ŝia!) sento pri eĉ minimuma dececo?

La unua, La Paganta Gasto, ankaŭ dubdece tema, estas la plej artiste sprite verkita en la libro. La aŭtoro satire priridas la sintenon, por li nelogikan, de angla burĝino rilate la nasklimigan demandon.

La enhaveroj "Pri Schwarz en Britujo" kaj "La Plagiado" estas interesaj; kaj tiu ĉi lasta eĉ valoreta instigilo al eventuala serioza kontribuaĵo pri la koncerna temo—la vortoj kaj iliaj pensapartenaĵoj. La unua estas nebeligita de la lasta linio, cetere sufiĉe nebulsignifa.

Neologismoj: morna (malgajiga, neterece timetiga); evento (definitiva okazaĵo); etoso (animo de loko); aprezi (ŝate kompreni, ŝate taksi, precipe en artaferoj); darf, irit, tofeo (butersukeraĵo); dribl, faŭl, hafo (tri futbalterminoj).

Prof. Cart lastatempe tre riproĉis eĉ laŭtnomajn verkistojn pro ilia ignoro al konsilo de Zamenhof rilate uzon de infinitivo post "sen" kaj de "daŭrigi" antaŭ infinitivo. Tamen la Plena Vortaro donas la formojn tute senkomente kiel bonajn. Plagio (plagiato); libera verbigo de neverbaj radikoj—pretas, patri, edzi, fivorti, malpuri, reali, kru-eli; bonfamo (absurda kiel tradukvorto por la angla "goodwill (of business)", klienteca garantio; maltrinkado 92/4 (?); 101/4 pretendi (ŝajnigi), 104/3 ignori (nescii pri), 109/7 ŝajnigis ignori (ŝajnigis nescii, aŭ, simple, ignori); sedonta ("but me no buts"; derivita el "sed," havas sencon "about to demur").

(Robo)

### KIEL ADRESI LETERON ALILANDEN?

(el malnova Heroldo de E.)

.....oni neniam bezonis, neniel bezonas kaj konjekteble neniaokaze bezonos uzi internacian lingvon por taŭge adresi korespondaĵon en fremdlandon. Jam de longatempe, multe antaŭ ol Esperanto ekzistis, oni povis tute oportune, sen ia malfacileco adresi leteron fremd-

landen, kaj la uzita kaj ankoraŭ ĉiutage konstante uzata rimedo estas tre simpla: la parton de la adreso, kiu montras la nomon de la adresato, la straton kaj la urbon, oni skribas en la lingvo de la lando, kien la letero devas alveni, kio estas facile ebla, eĉ se oni tute ne konas tiun ĉi lingvon; kaj la nomon de tiu fremda lando, kien la letero estas sendota, oni skribas en la lingvo de la lando, el kie la letero estas sendata, tio estas en lingvo ordinare konata de la skribanto.

Tiu ĉi tre simpla farmaniero sufiĉas por ke la letero ĝuste atingu la adresaton, ĉar la poŝtovicistoj de la deira lando, facile leginte la nomon de la fremda lando skribitan en sia propra lingvo, senŝanceliĝe metas la leteron en la poŝtsakon destinitan por la celata lando. Aliflanke, kiam la sako alvenas en ĉi tiun landon, la poŝtovicistoj, ne bezonante povi legi la nomon de la lando, legas facile la nomon de la urbo kaj de la strato kaj direktas laŭcele la leteron.

Tio estas malsaĝa fanfaronado, se oni pretendas trudi al la ĉiulandaj poŝtovicistoj la komprenadon de iu lingvo, kiun ili tute ne bezonas por bone plenumi sian oficon. Tiŭ ĉi senutila pretendo riskas kontraŭe malfavorigi ilin al Esperanto. Ni propagandu, ni fervore kaj senlace propagandu, sed ni ne propagandu blinde kaj malĝustokaze. Tiuj faras maltrafan kaj malutilan propagandon por Esperanto, kiuj provas trudi ĝian uzon en la okazoj, kiam ĝia uzo estas sencela kaj eĉ iomete ridinda.

—Prof. E. GROSJEAN-MAUPIN, Direktoro de la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro.

### LEPRULOJ ESTAS RESANIGEBLAJ.

(The "Age," Melbourne, 6/1/31.)

La informo, ke 37 lepruloj sur Peel Island, en Moreton Bay, apud la enmariĝejo de la rivero Brisbane, ricevas kompletan resanon, estas afero tre frapa por la homaro, ĉar ĝi signifas ankoraŭ unu grandan triumfon por la scienco medicina, post multjaroj de raciencia kaj persista serĉpeno. Peel Island plej gravas el la kvar izol-hospitaloj fonditaj en Aŭstralio por kuracado al lepruloj. La ceteraj estas ĉe Little Bay (Nov-Sud-Kimrujo), Cos-sack (Okcidenta Aŭstralio), kaj Dar-

win (Norda Teritorio). Feliĉe, ĉi tiu timinda malsano ĝis nun trafis nur malmultajn viktimojn en Aŭstralio; la nombro de kazoj ĉe la kvar izolejoj estas ne pli ol 150. Male en Azio kaj Afriko la skurĝo larĝe paŝas. Oni renkontas en multaj landoj Eŭropaj la frapitajn de ĝi—en Centra Ameriko, en la Okcidenta kaj Orienta Indio, ankaŭ en la Pacifikaj insuloj. La armeo de tiuj falintaj sub ĝia falĉilo jam nombras milionojn, malgraŭ tio, ke la suferantaj ofte vegetas dum jaroj. La kaŭzo kaj sukcesa kuracado de la lepro ĝis nun restis nekonataj de la medicina scienco, sed de tempo al tempo fakuloj ellaboris interesajn teoriojn rilate al ĝia kaŭzo. Unu el la plej atentotiraj estas tio, ke manĝadi fiŝojn kaŭzas lepron. Ĉi tiun teorion subtenas la fakto, ke la malsano ŝajne pli ofte atakas homojn loĝantajn sur insuloj kaj ĉe marbordoj, ol tiujn, kiuj loĝas en landoj situaciitaj neproksime al maro.

"Klarigante, ke Adhemar estas 'inteligenta' sed, ke li ne havas emon al la literaturo, Sinjoro de la Barge petis al Sinjoro Bergeret konsilon pri facila temo je kiu la juna stultulo povos havigi al si certaĵon....Fine Sinjoro Bergeret donis la sekvantan respondon:

"Estas iu Polinezia lingvo, kiun parolis je la komenco de la centjaro nur unu maljuna flavulino. Ŝi mortis, sed postlasis papagon. Germana studento kolektis kelkajn vortojn de la lingvo de la papago, kaj el ĉi tiuj li kompilis vortareton. Eble ĉi tiun lingvon oni ankoraŭ instruas ĉe la Lernejo por Orientaj Lingvoj. Mi konsilus, ke via filo petu informon.

"Ricevinte ĉi tiun konsilon Sinjoro Panneton de la Barge faris adiaŭon kaj enpense foriris."

**TO OUR SUPPORTERS**

Thanks for the following:—

Per Mr. H. Lanyon, 22/6; Dr. Lamb, 4/6, 8/31; Miss Ryan, 4/6, June, '32; Rev. Galloway, 4/6, Mar., '32; Mrs. Griffin, 2/4, Dec., '31; Mr. Hayes-Williams, 4/6, Apr., '32; Mr. McInnis, 13/6, July, '32; Brisbane E. Soc., (advert.), 5/6, May, '32; Mr. Guilbert, 4/6, June, '32; Mr. N. Gaye, 5/6, Dec., '32; Mrs. W. Butler, 10/-, Apr., '34; Mr. Hudson, 10/-, July, '33; Miss Carrick (sales), 4/4; Miss L. Saw, 4/6, July, '32; Mrs. Heintze (sales), 1/-; Mr. J. Hills, 5/-, Dec., '32; Miss Cox (advert.), 2/- Total—£5/8/8.

**ERROR.**

Note that the dating of the last issue should read "Junio" instead of "Julio," and that "June" should be read instead of "July" in line 43. page 278.

**KRONIKO.**

**Wellington, N.Z.**—Daŭris la mardaj kunvenoj; jene estas programeroj. aldone al la kutima unuhora instruo. Eble aliaj kluboj povos profiti, adoptante nian laborplanon:—

5/5/31. Elmontraro de E. literaturo kaj gazetaro kun taŭga parolado; lego, Egiptologio, s-ro E. Jack; paroloj, La Utileco de Salo al la Homaro, s-ro L. Dust; kaj La Kresko de la Internacilingva Ideo, s-ro J. Major; originala komedio, La Pasporta Fotografisto, rolis s-ro Bertram Potts kaj s-ro Major.

12/5/31. La Evoluo de la Barometro, s-ro Dust, kaj Interesa Promenado, s-ro Jack; originala komedio, La Servista Problemo, rolis f-ino C. Smythson, s-roj Major kaj Potts.

19/5/31. En la instrua horo improvize parolis s-ro Major, La Dancarto; s-ro V. Leck, La Parolanta Filmo; s-ino C. Leck, Oni Lernas Rulglitadon; f-ino Smythson, Fiŝkaptado; s-ro Dust, La Ŝtormo sur la Maro, kaj s-ro Potts, La Pereo de Vaporŝipo. S-ro Major skizis pri Oomoto movado en Japanujo; s-ro Dust parolis pri La Barometra Diagramo; orig. komedio, La Botelo da Biero, rolis f-ino Smythson, s-roj Major, Leck kaj Potts.

26/5/31. La Lanindustrio, s-ro Dust; Fabelo de Havaja Insularo, s-ro Potts; komedio, La Reformita Trompisto, rolis f-ino Smythson s-roj Jack kaj Potts.

2/6/31. Paroloj kun nigratabulaj

desegnoj, Stenografio rilate al Esp-o, s-ro Major; Magnetismo, s-ro Dust; orig. komedio, La Nova Stenografistino (! prof-o Collinson proponas "stenistino") venas al la Firmo, rolis s-roj Major kaj Potts.

9/6/31. Oni la tutvesperon dediĉis al praktika uzo de E. Mallongaj paroloj de f-ino G. Carty, La Destino de la Teatro, kaj La Scienca Fenomeno de la Vetero; f-ino E. Duguid, La Literaturo de Esp.; s-ino Leck, La Psikologio de la Infano, kaj La Muziko de Antikva Epoko; s-ro Leck, Pierre Loti, la fama Franca aŭtoro; s-ro I. Gordon, La Prononco de Esp.; s-ro Major, La Einstein Teorio de la Universo; s-ro Potts, La Moderna Skolo de l'Arto; lekcioj, La Enigmo de la Sfinkso, s-ro Potts, kaj Akvo-divenado, s-ro Dust; orig. komedio, La Skandalo en la Firmo, rolis f-ino Smythson, s-roj Major, Leck kaj Potts.

Leginte la supron oni rapide konstatos, ke nia klubo estas vera edukejo, kie membroj povas la scion pliigi en tre agrabla maniero.

**Masterton, N.Z.**—Malgraŭ ekonomie malprospera tempo la grupo daŭras flori sub s-ro Dewar, D.B.E.A. Vizitado al kunvenoj dum vintro estas kontentiga, kaj ĉi-jaro sendube pli sukcesas ol la antaŭaj. Ordo nova troviĝas nun ĉe ni en tio, ke du klasoj funkcias—unu por ĉiuj membroj marde, alia por spertuloj vendrede, kiam nur Esp-on oni parolas. Rimarkante progreson, ĉerpas ni kuragon.

**Melbourne, Vic.**—S-ro Ballard kontribuis interesan eron en la programo lastmonate. Li skizis la historion de Esp-o jam de jaro 1887, kiam d-ro Zamenhof donis sian benriĉan elpensadon al la homaro, ĝis la nuna tago.

Je la 22 junio s-ro Skurrie instruan parolon donis pri la muziko, uzante kartojn por plua klarigo.

Helpe al la J. G. Pyke Memorial Fund la Melb. Klubo prezentis koncerton en sia ejo la 24an de Junio. Troviĝis sur bonregala programo, tute en Esp-o, kantoj, muziko, kaj du teatraĵoj—"Parker" kaj "The Woman's Hour."

F-ino Naomi Byatt, el Perth, feris en Melbourne kelkajn semajnojn, kaj ŝia vizito al la Societo faris al ni neatenditan plezuron.

**SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.****Successful Year.**

Despite the economic crisis the Sydney Esperanto Society concluded a successful year on 11th June, when it in fact "came of age," this being the date of its 21st Annual General Meeting. Mr. Edgar Pryke presided and Secretary Leslie Pfahl was in unusually good form, remarking that the only way a man could get rid of an Esperanto Secretary's job was to die. The forty members present immediately wished him long life. Treasurer Davies received cheers when he announced that a sum of £18 remained in the Bank, and was flooded with proposals for spending it, which he resisted. He may yet be elevated to the Commonwealth Treasury.

The following officers were elected for the ensuing year:—President: Mr. L. Thomson; Secretary: Mr. L. E. Pfahl; Assistant Sec.: Mr. L. Hillen; Treasurer: Mr. Davies; Vice-Presidents: Messrs. H. Matašin, E. A. Pryke and Miss Bridge; Librarian: Miss Anderson and Auditor: Miss A. J. Harrison.

It has been decided to give a series of "Anti-Depression" Lecturettes at depression prices (free) between 7-8 p.m. every Thursday evening, and an effort is being made to secure sufficient publicity to secure support from the public. Three prizes are being given at the end of 1931 on the occasion of "Zamenhofa Festo" to the three best students at the lectures—a child, youth or girl and an adult. N. S. Wales readers of the "Suda Kruco" are asked to send or bring along their friends. The first lecture will be repeated on 2nd July, 9th, 16th and 23rd, and the "stickers" then taken through progressive stages of acquiring Esperanto. Lectures take place in the W.E.A. Rooms, 449 Pitt St. A number of new members resulted from similar lectures last year.

**PAPERMONO.**

Money order (poŝtmandato); Bank note (bankbileto, banknoto laŭ Revizoro 80/19); Postal note (poŝta monbileto); Paper money (papermono, monpaperetoj); One pound note (unu-funta (bank)bileto). Gego.

**—TO LET—**

In the popular mountain resort, Belgrave, Vict., comfortably furnished 4-r. cottage, with bathroom, E.L., 2 verandahs, accom. six, close tennis courts, shops, rail. station. Moderate rental. Apply Miss V. Cox, 31 Albany Cres., Surrey Hills, Melb.

**ĈU LA VORTOJ ALIU, ALIES ESTAS ĜUSTAJ?**

La finaĵoj de la Zamenhof-aj tabelaj vortoj (-al, -el, -u, -om ktp.) estas principe ligeblaj nur al la vortradikoj de la tabelvortoj (ki-, ti-, neni- ktp.) kaj ne povas esti uzataj kiel memstaraj finaĵoj. Tial vortoj kiel ali-es, ali-u, kelk-om ne estas ĝustaj. Nur -a kaj -o, ĉar ili estas finaĵoj adjektiva kaj substantiva, povas esti forlasitaj kaj anstataŭigitaj per aliaj finaĵoj aŭ sufiksoj. Do oni povas diri neni-igi kaj neni-iĝi anstataŭ nenio-igi kaj nenio-iĝi.

Dum la lastaj jaroj enkondukiĝis vortoj kiel: kelkiu, kelkiam, kelkie anstataŭ la vortoj: kelka iu, kelke iam, kelke ie. Ĉar tiaj vortoj estas kunmetaĵoj de plenaj vortradikoj, ili ne estas kontraŭregulaj.

**PRI LA RADIKO "RADI".**

En Rostov (USSR) estas grupo "Proleta Rajono." La fondintoj evidente volis eviti uzon de "radio" pro la fakto, ke tutmonde jam oni konas la teknikan eltrovon sub tiu nomo. Ili volis ne riski miskomprenon, ĉar vere la grupo ne estas aro da senfadentuziasmuloj. La vorto rajono estas franca neologismo, "rayon" (A. ray). Ŝajnas, ke kelkaj verkistoj sentas bezonon foje distingi inter la du ideoj, el kio sekvis la preso en pola gazeto de la formo "radjo" por nomi la gravegan por homoj inventon. La vortaroj, eĉ la Plena Vortaro, ne donas duan difinon, "la scienco sendi kaj ricevi informojn per la elektraj fortoj de la etero." Tamen, ekzistas fundamenta parenceco inter la du ideoj, kaj dubinde estas, ke la neologismoj "rajono, radjo" tenos la vivon.

**Korespondado.**

Instruistino de elementa lernejo en Estonio deziras korespondi kun geesperantistoj en Aŭstralio. Adreso: Leontine Martin, Tartu, Raekojja 36,1. Estonio.

### REMARQUE'S NEW BOOK IN ESPERANTO.

"Heroldo de Esperanto," at great expense, has acquired the translation rights of "The Road Back," a new novel by Erich Remarque, author of "All Quiet." Esperantists should buy this edition instead of those in the national languages, by this means at once encouraging the enterprising publishers and demonstrating by the book's ready sale the growing importance of Esperanto in this particular field. Details will follow.

### SATESPRIMO EL JAPANUJO.

De nia malnova abonanto s-ro K. Takahaŝi, Ŝizuoka: 22/4/31. "Kortuŝite mi dankas vin pro via grandanimeco, ke malgraŭ mi ignoris tiel longe vian afablan averton pri elĉerpiĝo de mia abonmono, vi ne riproĉis min sed sendadas seninterrompe vian interesan gazeton. Jen mi sendas al vi poŝtmandate la sumon de 10 ŝil., kiun mi esperas vi ricevos siatempe. La marta nr-o de via gazeto alvenis al mi hieraŭ, dankon. Tute via K.T."

Ho se nur la aŭstraliaj multfoje-avertitoj tiel respondus! (red.)

### ESPERANTO IN EUROPE.

"...Our situation in Europe is, on the whole, very favorable. Never has Esperanto received so much public attention as now. Technical difficulties caused by language diversity are increasing—and those who recommend Esperanto as the solution are increasing. Many important congresses, while realising the hindrance of polylingualism, yet show certain hesitancy in adopting Esperanto. Such an attitude is, however, natural to responsible bodies before making weighty decisions. An attempt was recently made (at Geneva) to overcome the language difficulty by means of an ingenious technical installation which, in our judgement, must prove to be a merely provisional solution. The use of Esperanto, and its consequent adoption, are inevitable. In this, time is working for us more rapidly than we may think. Let us, then, prepare ourselves for the decisive hour.

The economic distress in Europe is, however, a great barrier to our ad-

vance. The everyday need to safeguard one's mere existence paralyses idealism. If Esperanto is making slower headway than we have right to expect, the economic situation is the chief retarding factor. But we are optimistic enough to believe a change will and must come. So let us use our strength rationally, sparing ourselves for the day when an offensive will be entered upon along the whole front. Let us keep our hearts warm and our heads cool, in the knowledge that progress is the reward only by unceasing battle.

(From the report of the International Central Committee of the Esperanto Movement, 1929-30.)

### ESPERANTO IN DUTCH COMMERCE SCHOOLS.

The Dutch Ministry of Education, Arts and Sciences has decreed that from 1st September, 1931, the State will grant subsidies for the teaching, in commercial schools, of the following optional subjects: Stenography, Typing, Spanish, Malay, Russian, Swedish, and Esperanto languages. The subsidy is valid for one year, and is conditional on an enrolment of not fewer than 8 pupils (in a class) for stenography, and 5 for the other subjects. (Heroldo de E.)

### "BAHA' U' ULLAH KAJ LA NOVA EPOKO."

D-ro J. Esslemont.

El la angla trad. Lidja Zamenhof. Eldonejo, "La Nova Tago," Weinheim, Germanujo. 191 pp. Prezo 4 ŝil.

Jen iom tre kompleta pritrakto pri la Bahaa religio, jam de la apero de Bab, heroldo de la ĉeffiguro Baha'u'llah, ĝis la morto en 1920 j. de la "mesiido" Abdul Baha. Sen literatura edukiteco la trio faskope verkadis klarigojn lumĵetajn sur la bazajn principojn de la jam vaste diskonigata revelacio; Baha'u'llah uzis jen modernan persan lingvon, miksitan kun la araba, jen la plej persan, jen simplan, jen klasikan araban! Abdul Baha parolis perse, arabe, turke, kaj interalie profetis, ĉu mirakle? la frakason de l'franca (1871) kaj germana (1918) militaŭtokratioj; kaj, ke jam en 1957 "universala paco estos firme estigita, universala lingvo estos

enkondukita, miskomprenoj estos malaperintaj, la baha afero estos disvastigita en ĉiuj mondpartoj, kaj estos efektivigita la unueco de la mondo." Permeseble estas dubeti.

La bahaismo forprenas unikecon for de la Kristo kaj kategorias lin nur kiel unu el kelkaj "Malkaŝantoj." Laŭ ĝia instruo la Kristo antaŭanoncis venon de granda mondinstruanto kun "pli plena kaj glora revelacio" ol la sia. Baha lerte fortikigis tiun tezon, citante Mateon 17, sed Marko 13/22 donas averton, kiu multaj povas direkti kontraŭ eĉ persaj "mesioj."

Kredeble estas vere, ke la organizita Kristismo povus forte sin riĉigi, suĉante el la bahaaj instrufontoj tion, kio al ĝi ankoraŭ tro mankas—sanan supernaciecon, kaj pli profundan inklinon studi la fenomenojn de disvolviĝanta historio, por trovi, ĉu vere ne ekzistas rilato inter ili kaj la profetaj voĉoj.

La traduko estas tre plaĉa. Nur pene trovataj formoj pikas: 16/2 "Se judo vidus sian infanon, donantan glason" (donanta); 19/3 mals. furio (vidu Plenan Vortaron; furiozo); 47/34, 58/8, 108/8 mals. "kontinui" estas ne-transitiva verbo; 59/8 potenciala; 62, lasta linio, kaj 6a mals. "akto" (ago); 107/13 "faktorio" (jam oni uzas por tiu, "fabrik(e)jo," "manufakturo," "uzino!"); 155/6, aŭtokracio" (aŭtokratio); 103/3 "avanco" (Zam. uzis "promocio"); 178/13 "feĉo tra pastbulo"?

—Robo.

#### Gratulon

al s-ino L. Semb, Christchurch, pro sukceso ĉe la B.E.A. Elementa Ekzameno. Kiu sekvos?

#### ERIK AXEL KARLFELDT,

la plej fama moderna sveda poeto, mortis en aprilo. Per tio la brita kulturo ricevis fortan baton, pro tio, ke li estis angla-universitata doktoro de filozofio. En 1917 oni proponis al li la Nobel-premion, sed Karnfeldt rifuzis "pro lia akademia pozicio."

Ĉi tiu versmajstro apartenis al tiu

kategorio de poetoj, kiuj restas nekona-taj de la vasta mondo ĝuste tial, ĉar ili verkas en lingvo, kiun parolas nur kelkmiliono da homoj, kaj ke krome la poezio ilialingva estas netradukebla. Estas sendube, ke se Karnfeldt estus verkinta en lingvo franca aŭ angla, oni jam nomus lin vera iniciatoro de nova lirika skolo. (El "The Age," Melb.)

Ankoraŭ ekzemplo de la kultura subpremo de la nacietoj, pro la fera fakto de lingva superrego. Precipe por la lingve malfortaj popoloj devas allogi Esperanto, ĉar per ĝi iliaj vortmuzikistoj povas rekte atingi tutmondan ŝatan-taron.

#### LA 3AN DE DECEMBRO, 1854.

De Nathan F. Spielvogel en  
"The Lone Hand Magazine."

"La revolto ĉe Eureka estas la solnura pitoreska sangomakulo sur la blankaj paĝoj de Aŭstralia historio. Britaj oficialuloj nomis ĝin "bagatelaĵo," sed la malgranda batalo estis tre rezultoriĉa, ĉar ĝi tre helpis frakasi la oficialaĉan tiranecon tiaman, kaj establi demokratan regadon en Aŭstralio."

"La mallonga ribelo ĉe Ballarat (The Eureka Stockade—Palisaro de Eureka) en 1854 devenis de nejusta impostado de la orfosistoj kaj prema kolektado de tiu imposto. Ĉe kiu ajn horo policano povis postuli de orfosisto montron de lia fospermeso, kiun li devis pagi per unu funto kaj dek ŝilingoj en ĉiu monato. Pro nehavo aŭ nemontro de fospermeso sekvis grava monpuno. Pli kaj pli incitiĝis la fosistoj; ĉe granda kunveno ili publike bruligis la fospermesojn kaj postulis diversajn politikajn rajtojn. Fine ili konstruis fortikaĵon, sub gvido de iu Petro Lalor, Irlandano, Vern kaj Thonen, Germanoj; Raffaello, Italo; kaj flirtigis la standardon de nova regno; "la Respubliko Viktorio." Ducent sepdek soldatoj kaj poŝtanoj atakis kaj en dudek minutoj venkis la ribelantojn. Mortis kvin el la solda-

#### HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE. MELBOURNE.

#### Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

toj kaj ĉirkaŭ tridek el la ribelantoj, kaj tiel finiĝis la sola batalo sur Aŭstralia tero. La kondukanto, Lalor, perdis la dekstran brakon kaj tamen forsavis sin. Aliajn ribelantojn oni procesis, sed ne kondamnis: tamen al Lalor oni nenion faris. Jarojn poste li fariĝis ano de la ŝtata parlamento, kaj eĉ ĝia prezidanto: homo modera kaj honorata. Post tiu malgranda eksplodo la orfosistoj ricevis pli justan impostadon; la orminado daŭris kiel tute paca okupo, kaj iom post iom transiris en la staton de proza, organizita grandindustrio." (Eltiraĵo de "Aŭstralio, Lando kaj Popolo," de s-roj Lauri Laiho kaj "Delsudo.")

Antaŭ la Gubernatora Domo en Melbourne uniformita gardisto meĥanike paŝadis laŭ sia difinita distanco. Ĝi estis neimpona konstruo el ŝtono, havanta en la antaŭparto du etaĝojn, en kiuj troviĝis kvin malbelaj, kurtenitaj fenestroj. Meze de la fronto estis malgranda portiko kun du Ionikaj kolonoj. Flagstango staris antaŭ la domo, kaj ligna budeto de gardsoldato troviĝis dekstre de la portiko.

Is "LA SUDA KRUCO" worth a Penny a Week to you? If so, send your subscription to us if you have any doubt as to your validity. It will be correctly acknowledged in the following issue.

BOX 731F, P.O., ELIZABETH-ST., MELB.

La gardisto, kun bajoneto eningita sur lia longa pafilo, tien kaj reen paŝadis dum sia teda deĵoro.

Subite li haltis.

Kotŝprucita rajdpolicano alproksimiĝis, urĝante lacan ĉevalon laŭ la strato kaj ŝanceliĝante de flanko al flanko en la selo.

Atinginte la placeton antaŭ la Gubernatora Domo, li glitiĝis de sur la ĉevalo. "Depeŝojn por lia gubernatora moŝto," li raŭke sciigis. La tutan nokton li rajdis, kaj la koto jam kruste sekiĝis sur liaj vizaĝo kaj manoj. La pordo malfermiĝis, kaj Sir Charles Hotham aperis en plene parada uniformo, ĉar li amis la militistan vestaron.

Ambaŭ viroj lin salutis.

"Nu, homo! Kio estas?"

La alrajdinto ŝanceliĝe ĝisiris lin kaj enmanigis leteron. La gubernatoro deŝiris la koverton kaj liaj densaj brovoj sulkigis dum li legis.

"Bona Dio! Ĉu aferoj tiele marŝas?!" li diris mallaŭte. Post momento oni aŭdis lian ordonon—"Tuj sonigu la alarmon enviciĝi!"

La tranĉa tono de la klariono, la alarmo, la rapida moviĝado, la revuo de la armitoj! Post horo taĉmentoj de

la 12a kaj 14a regimentoj, sub kapitanoj Wise kaj Queada, estis pretaj por ekmarŝi. Ruĝaj vestoj kun baskoj, blankaj bekhavaj ĉapoj, tre alte butonumitaj gamaŝoj, tornistroj surdorse, pafiloj enmane!

"Anglaj soldatoj!" alparolis Hotham, "Bandaĉo de fremdaj kanajloj, surfundaĵo de Eŭropo, jam armite minacas ĉe Ballarat. Vi devas dispremi tiun ribelon. Ĉiu pied- kaj ĉevalsoldato en la kolonio ricevos alvokon, kaj postsekvos vin kiel eble plej rapide. Viaj kamaradoj estas en danĝero. Al ilia savo! For, for!"

La armeeto vive hurais, sin turnis kaj ektrotis for. Hotham rigardis ĝis ili fandiĝis en nubon da polvo. Je tio li repaŝis por eniri la domon. Ektrafis lian okulon la ekspreso dormanta en la gardistbudeto. "Hola vi!", li ordone vokis al siaj servistoj; "enkonduku tiun homon kaj prizorgu lin. Iu venigu mian ĉevalon."

Li rajdis supren al Hotelo Prince of Wales, por paroli al la grandanima generalo Robert Nickle (elp. nik'l).

Je informo pri la novaĵo la vizaĝo de la militisto akceptis seriozan mienon.

"Malbona afero ĝi estas. Malbona afero."

"Nu, Nickle, ne diru, 'Mi pri tio avertis vin.' Mi ne dubas, ke via opinio mi estas kulpa," varme diris Hotham.

"Mi staras preta plenumi la ordonon de via gubernatora moŝto," serene respondis Nickle.

"Pro Dio, do, tuj sekvu la taĉmenton kune kun ĉiu disponebla homo!"

"La ordono de via moŝto ricevos senprokrastan plenumon," respondis Nickle, kaj, salutinte, li paŝis eksteren.

Post du tagoj li foriris el Melbourne kiel ĉefo de mil soldatoj, kun municiaj vagonoj, kvar batalkampaj kanonoj, kaj rajtigo proklami la "diggings" (elp. digingz; ormineja regiono) esti sub milita leĝo. Melbourne ekscite bolis.

Ankoraŭ ne alvenis la tagoj de la telegrafo kaj specialaj ĵurnalistoj. Famoj kaj timigaj diroj disflugis tra la metropolo, kaj palvizaĝaj urbanoj staris en stratoj Collins kaj Bourke (elp. kolinz: burk), interŝanĝante ĉiam pli vasten terurajn neveraĵojn kaj sangecajn rakontojn.

"Oni buĉis la tutan policanaron!" "Kvindek mil orfosistoj nun marŝas al Melbourne por ĝisgrunde forbruligi ĝin!"

Je la posttagmezo de la 1a de Decembro kunvenis sur Bakery Hill en Ballarat, granda amaso da orfosistoj. La unua marŝis Ross el Toronto, fiere portante la nove elektitan bluan flagon je ekstremo de longa stango. La viroj sin formis en procesion kaj marŝis mal-supren de la strato nun nomata Humfray-st. (elp. humfri strit), tiam en straton Main (elp. mejn) kaj poste, simile al grandega skolopendro, ili laŭiris supren de la strato Eureka (elp. jurika) ĝis sur la deklivoj de la monteto.

Neniu rajdsoldato, neniu policano vidiĝis.

La orfosistoj havis armilojn. Kelkaj portis pafilon, kelkaj la tiutempan grandan selpistolon. Carboni Raffaello svingadis super la kapo glavegon, restaĵon de la okazoj de la jaro 1848. Iuj posedis nenion pli efikan ol akriĝitan ferpecon fiksitan al ekstremo de longa stango—ĉi tiujn armitojn oni nomis "la pikilegitoj de Vern." Multaj portis nenion pli militistecan ol sia pioĉo. Ĝi estis ja armeo de ĉiaspecaj homoj ĉiamaniere ekipitaj. Sed neniu priridis. Je tia tempo mokridado estus tute nekonvena kaj—danĝera.

Dum la procesio pretermarŝis centoj sin enmiksitis en la huraantaj kaj kantantajn vicojn. La granda homamaso atingis la deklivojn de Eureka. Petro Lalor senembarase ordonadis. Oni devis fari barikadon, kiu enfermu proksimume du akreojn. Centoj da volontaj viroj rapidis al tiu laboro. Multaj el ili antaŭe gajnis sperton pri barikada starigo en Parizo, en la tagoj de la Commune (1). Post nemultaj horoj la tendaro estis enfermita per alta muro el lignoplatoj, amasigita minteraĵo kaj ŝtonoj.

Ĝuste en la mezo, sur malgranda teraltaĵo, brave flirtis la nova blua flago: proksime staris dudek forĝistoj farantaj pikilegojn: pli fore, sur la terplato, Vern kaj Black kaj Ross ekzercis arojn da okulvideble nemilitistaj viroj.

En sia tendo Petro Lalor, la ĉefkomandanto, sidis kun sulkigitaj brovoj, enpense frapetante per la fingroj.

"Ho se ni havus pafaĵon! Se ni ne tuj venkos, tion ni neniam faros! Ni ne havas ŝargaĵojn po dekdu por ĉiu nomo. Kion fari?"

(daŭrigota)

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro Jas. P. Lauder. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots Church Hall, 97 Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Svdney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland)

**Wellington Esperanto Club.**—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 134 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. AŬGUSTO, 1931

## ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—

That Esperanto is stirring University circles. The Academical Esperanto Society of Vienna will open a course in the University there; courses in the Szechuen (China) University; Mr. Scherer, world-touring delegate of the International Central Committee of the Esperanto Movement, addressed International Central Committee of the the Fuh Tan (Shanghai) University on Esperanto with marked success. There are 1,350 students at the University. In the Tartu (Estonia) University, Professor Ahlstrand, of the Swedish Esperanto Institute, held a course of 165 pupils, among whom were several professors of the institution; Professor Collinson, of Liverpool University, will in October open two courses, elementary and advanced, at the University. He intends also to arrange a conference in Esperanto, on historical and philological subjects.

That Esperanto book-selling is beginning to pay. The Esperanto Publishing Co., Stockholm, had a turnover of 41,209 Swedish crowns for 1930 as against 22,833 for 1929. It declared a 6 p.c. dividend on a profit of 1208 crowns. The Belgian Esperanto Institute paid the same dividend; the Centra Esperanto-Librejo in Holland paid 7 p.c. The Esperanto Publishing Co., declared a dividend of 3 p.c. tax free.

From July 1929 to March 1930, there were sold in the Soviet Union Esperanto Books to the sum of 29,726 rubles (over £3000). In those nine months more Esperanto printed matter was sold than in all the preceding statistical years put together.

That for the International Jamboree

to be held in Budapest, 14/20 July, more than 100 Boy Scouts in the Hungarian capital are learning Esperanto.

That the International Esperanto Museum in Vienna contains 3,500 books, 600 complete issues of Esp. gazettes, and a mass of other material of great bibliographical worth.

That the National Union of Police for France and the Colonies has recommended the study of Esperanto to its members. Latterly Esperanto has received much attention from police circles throughout Europe.

That "Jane Eyre" (Bronte) has been translated into Esperanto by Language Committeeman, H. Bulhuis.

That the Soviet Posts has again issued stamps in Esperanto. This time, the fourth, the denominations are one and two rubles.

That S. Grenkamp is writing a life of the recently deceased Professor T. Cart, president of the Lingva Akademio.

**ANATOLE FRANCE—PROFETO.**  
Eltiraĵoj el paroloj antaŭ simpatiantoj  
kun la rusa popolo. France liveris ilin  
en 1905, okaze de la Petersburga  
masbuĉo.

La Caro liveris al la glavo homojn mortantajn pro malsato kaj mizero, homojn, kies nura krimo estis, ke ili, el fundo de koro, kriplendis al li, kiel al patro sia, ke li donu al ili helpon. Iliajn fervorajn preĝojn, iliajn filecajn petvokojn, iliajn larmojn, li respondis per la vipoj de siaj kozakoj kaj la kugloj de siaj grenadistoj. Tiuj kugloj trafis ikonon lia-bildan portatan de la pastro Gaponon. Tiel, ne vole, la Caro mortigis la Caron. El la sango ruĝiganta la akvon de la rivero Neva homoj



milionope leviĝos, por venĝi la buĉitajn viktimojn. La Caro jam mortigis la Caron, kaj ekbruligis fajron de iu revolucio, kiu glutegos la tiranon kaj tutan lian filaboron. La tago de Nikolaj Aleksandroviĉ estas jam pasinta, kaj lian memoraĵon oni universale kaj eterne malbenegos.

Nova solidareco nun hodiaŭ komencas unuigi la proletarojn de ĉiuj landoj, kaj la tago venos baldaŭ, kiam estos nur unu proletario, fortega ĉampiono por la paco.

Finkondamnita estas la lasta de la Romanov-oj..... Morgaŭ tre povas vidi finon de la Caro kaj lia reĝimo. Investo en la dua rusa monprunto estas krimo. La popola registaro, kiu sekvas la caran, ne akceptos respondecon por la pruntoj kontraktitaj post 22 Januaro 1905. La venonta rusa elektitaro ne rekonos la pruntojn, kiuj provizis financon al masbuĉo kaj civitana milito....la rublo estas sangoŝmirita kaj ĝi malleviĝos valore.

#### ERARO.

Paĝo 265, linio 45 legu "nature" anstataŭ "native."

#### EXAMINATIONS.

Grupsekretarioj kaj aliaj bonvolu uzi la terminojn "Elementa" kaj "Supera" (aŭ "Komenca" kaj "Altgrada") por nomi la ekzamenojn. Tiauze ili evitos la tre konfuzan vorton "Unuagrada," kiun unuj uzadas kun senco "Elementa" kaj aliaj kun senco "Supera."

(Konsilo de "British Esp-ist.")

#### AVERTO EL EKSTREMORIENTO

Sin bazinte sur la neceso de evoluo de la lingvo, multaj verkistoj, lastatempe, enkondukis multajn novajn vortojn en Esperanton. Tiujn vortojn ili precipe ĉerpis el la latina lingvo. La pli granda parto el ili estas balasto por la lingvo, kiun ili pli kaj pli komplikas. Atendu, sinjoroj, atendu, ne rapidu tro, ĉar se la hinoj kaj la japanoj komencos, siaflanke, enkonduki vortojn el sia lingvo, vi estos la unuaj, kiuj diros, ke la Fundamento de Esperanto malfundamentiĝas.

Nia opinie, oni devas krei novajn vortojn nur pro absoluta neceso, kiel diris Zamenhof. Oni do kvietanime povas diri "filmo," "anteno," "kurzo," sed la vortojn: "ekspliki," "ekskuzi," "descendi" kaj aliajn balastojn la Es-

perantistoj ne devas uzi, se ili ne volas, ke Esperanto prepariĝu al pereco.

#### DECI, KONVENI, TAŬGI, OPOR-TUNA.

In Millidge's dictionary "deci" is correctly defined as "to be fit, proper, becoming, as it ought to be, right, only due," and by some of the same words or their synonyms "konveni" and "taŭgi" are also correctly defined. It therefore often happens that beginners, and even some writers, incorrectly use the words, through not clearly seeing the difference in their sense. The writer in his early days in Esperanto found these words a very puzzle until over 20 years ago an article by Paul de Lengyel in "Lingvo Internacia" completely removed all difficulty. As the article probably will be of equal help to others I quote it:

"Deci" estas sekvi aŭ obei la kutimajn kondutregulojn de bonedukita societo, t.e., agadi plaĉe, kondukti neri-proĉeble. "Konveni" estas kondukti tiel, kiel la cirkonstancoj deziras. Oni povas deci malkonvene kaj konveni maldece. "Deci" povas nur persono,— "konveni" povas persono, besto (ekz. hundo, kiu ne bojas je la amiko de sia mastro), objekto (ekz. kulero, kiu estas nek tro granda, nek tro malgranda por manĝi per ĝi supon), abstraktaĵo (ekz. juĝkondamno, kiu estas farita laŭ la koncernanta paragrafo de la leĝo). "Konveni" estas pli ol "taŭgi," ĉar ekz. kafkulero ankaŭ taŭgas por supmanĝo. (Everything "taŭgas" that serves, suits, is fit for, will do, answers the purpose of, even if only as a substitute for the "konvena" (proper) thing). La decreguloj estas artefaritaj de la homaro mem,—la konvenreguloj estas naturaj aŭ spontanaj, kaj la homaro ilin ne faris, sed nur ekkonis, konstatis.—Oni ne devas konfuzi la dececon kun la ĝentileco, kiu estas speco de servopreteco."

[Parenthetical comment in English by G. G.]

In translation one must be guided by the context as to whether "dec'" aŭ konven'" is the right word, and never use "taŭg'" as equivalent of either of them.

Never translate "convenient" in its ordinary present-day meaning (handy, opportune) by "konvena" but by "oportuna" (see Marko vi, 21, xiv, 11; Agoj xxiv, 25). "Convenient" in the sense of

“proper, seemly” a sin Ephesians v, 4 and Philemon 8 is rightly translated in the Esperanto Nova Testamento by “konvena.”

G.G.

### KION VI SCIAS?

1. Kial estas ringo de edziĝo portata je la tria fingro de la maldekstra mano?
2. Kiom da ripoj ni havas?
3. Ĉu ŝima manĝaĵo estas venena?
4. Kiun lingvon parolis Jesuo Kristo?
5. Kiu estis dua edzo de unua edzino de Napoleono?

### New Zealander in Philadelphia.

Ĉeestis kiel surpriz-vizitanto s-ro William McGuigan. Ne ofte ni gastigas samideanon de alia lando, sed tiu neatendita sinjoro antaŭ nelonge loĝadis en la vera antipodo,—Nov-Zelando! Tie, li kaj lia patrino kaj frato, nun ĉiuj loĝantaj daŭre en Philadelphia, estis aktivaj en la Esperanta movado. Kompreneble la grupo kore bonvenigis lin kiel valora aldono al la loka samideanaro, precipe post lia salutparolado, en kiu li montriĝis kiel lerta Esperantisto. (El “Amerika Esp-isto”).

### “ANSTATAŬA EDZINO”

de Erica Maxwell.

Traduko el la angla de M. Sampson.  
Eldonita de Heroldo de Esperanto:  
havebla ĉe B.E.A.

Prezo: 5ŝ. tolbindita; kartonita 3/6;  
212 paĝoj.

Bedaŭre estas, ke la Koln-a eldonejo ne elektis ion pli indan ol la supra por reprezenti la aŭstralian literaturon. La verko recenzata estas tipa felietono, interesa ĉefe por legantoj nekritikemaj, kiuj kontentiĝas je distra romano, kies meza kvalito prezentas malmulton al la juĝkapablo.

Tamen, ne tro aŭdiĝu la pepgrumblo. Ĉe tre multe da legemuloj la cerbo ne povas, ne volas, mueli la malmolan pensgrenon troviĝantan en la rafinitaj

romanoj de la stilmajstroj. Tiuj prefere prenu al si la nune recenzatan kaj regale sorbu kun facileco rakonton pri sufiĉe stranga sortimplo.

“Erica Maxwell” (Lillian Pyke), mortinta jam de 1927, estas bofratino de nia perdita sam batalanto, J. G. Pyke. Fervora amiko de Esperanto, ŝi netrude enteksis en ĉi-verkon menciojn pri la lingvo, kio sendube utilas ankoraŭ al la movado.

La verkaĵo estas ĝenerale flulegebla, sed la tradukinto tro ofte lasis sin influu de la angla esprimmaniero, penas traduki “vortojn” anstataŭ sencon de frazoj, kaj iuj parolturnoj, kvankam ili estos kompreneblaj al anglo, eble ne estos tiaj al alilingvanoj. Estas multaj ekzemploj de nebona uzo de vortoj, kelkaj mallertaj frazkonstruoj, kaj ie-loke la leganto stumblas ĉe rekte fuŝitaj linioj. Ni pruvon havu per cito al 37/22, 15/20, prutedonis, pruntas (don’); 51/12. personigi (prezenti sin kiel); 29/36, kelkajn jarojn antaŭe (antaŭ kelke da jaroj); 41/2, pleto. kiun estis ordoninta s-ro G. (pleto, kiun alporti ordonis s-ro G.); 66/34, bolŝeviko el bolŝevikoj); (rabia, frenezfervora bolŝeviko); 115, prenu tempon (ne rapidu decidi); 122/34, mimozo estas “wattle”; 24/2/, ŝi trovos (si ne trovos); 151/20, Albanujon (Albany’on).—Robo.

### KRONIKO.

Perth, Okt. Aŭst. — Ankoraŭ nia societo bone laboras, spite malbonajn vivkondiĉojn. S-ro Saar vizitis la porviran societon en la preĝejo halo ĉe Subiaco (filurbo de Perth), kaj trafe parolis pri Esperanto. Ĉirkaŭ 25 sinjoroj ĉeestis. S-ro Saar klarigis pri la deveno kaj utilo de nia lingvo kaj sciigis al kunvenintoj iom pri la gramatiko. Ĉiuj montris fortan intereson kaj kelkaj petis informojn pri lernlibroj ktp.; ili tre deziris lerni. Espereble tiuj trovos la studadon interesa kaj feliĉa okupo

Ĉe societo por junuloj en Nedlands (Perth-parto), s-ro Byatt faris klarigan parolon, pritraktante la historion de Esp-o; li ankaŭ prezentis unuan lecionon. La ĉeestantaro bone ĝuis kaj la parolon kaj la lecionon; kelkaj volis lerni “tiun admirindan lingvon.”

**Melburno, Viktorio.**—Je la sepa de Julio okazis la jarkunveno de la Melb. Esp. Soc. kaj la oficistoj elektitaj por la jaro estis: Prezidanto, s-ro P. Holmes; Vic-Prezidantoj, f-ino L. Irwin kaj s-ro Skurrie; Sekretario, f-ino V. Cox; Helpsekretario, f-ino L. Irwin; Kasisto, s-ro E. Cox; Bibliotekisto, s-ro S. Bishop.

Granda intereso montriĝis en la instruado de Esperanto per la rekta metodo, kaj, sekve, s-ro P. Hudson iom klarigis pri la maniero de tia instruado, kaj donis simplan lecionon al la anoj.

Je la 28a de Julio f-ino H. Bostock distris la anojn per Esperanto konkurso, kaj la sukcesaj konkursintoj, f-ino Payne kaj s-ro Ballard, ricevis premiojn.

### TO B.E.A. MEMBERS.

In the British Esperantist for July (p. 26) appears the statement that La Suda Krucio is the organ of the N.Z.E.A. Mr. M. Butler, who was inadvertently responsible for the error, asks the pardon of those concerned.

### ESPERANTO POŝTMARKOJ DE U.S.S.R.

La redaktanto de La S.K. tre volas ricevi de rusaj sam-oj kompletan de ĉiuj Esperanto-poŝtmarkoj eldonitaj de la Sovetia Poŝto, precipe la lastajn, unu- kaj durublajn. Li intencas enkadrigi ilin orname, por montri kiel propagandaĵon ĉe vizitantoj. Rekompencon laŭinterkonsente.

### TO OUR SUPPORTERS

thanks for the following, which has again made possible the appearance of our little gazette.

Mr. Cox, 4/6, June, '32; Miss Irwin, 4/6, June, '32; Mr. J. Mader, 5/-, Aug., '32; Mr. R. Pike, 4/-, Apr., '32; Mrs. Margaret Dixon, 5/-, July, '30; Miss H. Batchelor, 5/-, June, '32; Miss Griffin, sales, 2/8; Miss Hopton, 4/6, June, '32; Miss C. Hannaford, 4/6, June, '32; Mrs. Purnell, 4/6, June, '32; Mr. J. A. McDonald, 4/-, Apr., '32; Exchange on N.Z. postal-note, 1/4; Mr. G. Gordon, 5/-, June, '32; Mr. J. Hodges, 5/-, June, '32; Mr. J. Girdwood, 4/6, June, '32; Rev. Lambton, 4/6, July, '32; Miss Carrick, sales, 2/-; Dr. F. Williams,

sales and donaco, 20/-; Mr. J. Dobrich, 5/-, Aug., '32; Mr. M. Martinek, 4/6, June, '32; Masterton E. Grupo (anonco), 5/6, Apr., '32.—Total: £5/5/6.

Error, last issue: Mrs. Pocklington, 5/-, July, '32; Mr. P. Hudson, 5/-, July, '32.

Sums acknowledged up to 28th of each month.

### "L.E.A. KANTARO."

Eldonita de Arbeiter-Esperanto-Bund, Berlin C25, Dircksenstr. 42.

Kontraŭ du respondkuponoj, homoj simpatiaj kun komunisma ideologio povas havigi al si 74-paĝan poŝkanton de la Laborista Esp. Asocio. Jam ĝi, reviziita, fieras pri tria eldono. Por voĉa regalo nestas en ĉi tiu 28 "batalkantoj," 7 historiaj, 8 liberpensulaj kaj 14 popolaj. Tiuj destinitaj por la senreligiuloj montras intelektan nivelon bedaŭrinde malaltan; la pensenhavo taŭgas ja nur por infanĉambra horo, sed kuna elgorĝo de la "Proleta Marseljezo" kaj la "Kanto de la Ruĝaj Maristoj," vestitaj per vortrubandoj de flama lingvo, ne povas ne saltigi la korojn al "klasbatalemuloj."

Troviĝas kelkaj diskutindaj formoj. Uzon de "tirani" kun signifo "tiraneĉ"; "aterist" (F. atterrer, subprem(eg)i) estas tre fremda; "legionoj" (legioj); ne estas permesebla elizio de akuzativo, kiel ekz., "forpeli la malnikan ar'", "ili rikoltu la propran semad'"; "mitraĵlo" (F. mitrailleuse, mitralilo, Christaller); "por iĝu rev' realo" estas tre neplena esprimo por "por ke revo fariĝu realo"; "avia," aŭdaca por "aviada"; "privenku la klastiranec'" estas iom neklara; 36/12, "kun manoj, piedoj ĉenita(j)"; "por ke vi ne povas rigardi" (pro tio, ke vi ne...); "por ke nian trafan kuglon sendi al la kapital'" (por ke ni la trafan kuglon sendu...) "degenerato" (degenerulo); 62/3 distino (destino).

(Robo.)

### RECENZOTAJ.

**Julio Baghy: Printempo en la aŭtuno.**

Rakonto pri dolĉe melankolia renkonto. Verkita originale en Esperanto. 114 paĝoj. 13,5x20 cm. Kartonita. Prezo 2ŝ.

**Florence Barker: La Lingvo de la Bestoj.**

Prelego farita ĉe la 22-a Universala Kongreso. 24 paĝoj. 10,5 x 15 cm. Broŝurita. Prezo 3p. Propra eldono de la aŭtorino.

**Sigelmankoj kun propagandoteksto por Esperanto.**

En lingvoj angla, Esperanta, franca, germana, hispana kaj sveda. Trikolore presitaj. En folioj po ok markoj tekstantaj pri Radio, transoceana aviada. fervoja kaj aŭtomobila trafikoj, sporto, turismo kaj internacia komerco. La tekstoj harmonias kun rilataj vinjetoj. Unuopa marko 3,5 x 5 cm. Prezo: 10 folioj 6p. afrankite. Ĉio supra havebla ĉe Eldonejo „Heroldo de Esperanto“, Brusseler Strasse 94, Koln, Germanujo.

J. Welzl: TRIDEK JAROJN EN LA ORA NORDO. 320 pp, 16 x 22, nebindita 5ŝ., plus 10 p.c. afranko; bindita, 6ŝ., sampluse; eldonita de la Moraviaj Esperanto-Pioniroj, Olomouc Ĉeosl.

**EN OKCIDENTO NENIO NOVA  
Kion ĝi instruas?**

Ĉu ne,

(1) Ke malsamaj lingvoj kaj naciaj kulturoj ne povas kaŝkovri la esencan unuecon de l'homaro. Franco, germano, anglo kaj ruso emociiĝas de la samsamaj impulsoj de l' amo, de l' malamo, de l' kuraĝo, de l' timo. Oni vidas ilin faritaj "el unu origino, por loĝi sur la tuta supraĵo de la tero."

Ni pensas pri Paŭl Baŭmer en la konuskavaĵo kun la mortfrapita franco. (2) Ke la bestaĉiga influo de la masakrejoj ne povis malhelpi la ĉiamfreŝefloradon de la unusola purblanka lilio de l' militjaroj,—sinofera kamaradeco.

Ni pensas pri la celita sed vana saviro al la vundita Katzinsky.

(3) Ke tia sanga katastrofo, kia la eŭropa militego ankoraŭ ĉiam minacas la mondon, ĝis la tempo, kiam la popoloj liberiĝos el la terura sento de nepoveco regi tiujn nedifineblajn, ĝis nun nekonatajn fortojn, kiuj suĉas ilin en la ruĝan kirlakvon de l' militado.

Ke la longa, malluma Epoko de Fratmortigado forpasos por ĉiam, nur tiam, kiam plenkuriĝos en la kolektiva homkonscio firma kredo, ke la interbuĉado estas absurda frenezo, — nur tiam, kiam la interligitaj popoloj efikege

esprimos sian absolutan volon, ke neniam plu estu permesata tiu barbara rimedo decidi internaciajn disputojn.

Ni pensas pri la sceno en kiu la simplaj soldatoj diskutas la kaŭzojn kaj esencan de la milito.

**AMRAKONTO.**

**El malnovaj fontoj reverkis Pan Loti.**

La eta dio Kupidono ne ĉiam estis armita per pafarko kaj sagoj, sed pli frue nur portis torĉon, per kiu liflamigis la korojn de feliĉaj geamontoj. Tamen unufoje, laŭ diro de la Granda Poeto, la eta dio de l'amo, metinte flanken sian amigilon, kuŝis por dormi en arbaro. Dumtempe multaj nimfoj, ĵurinte je ĉasta vivo, dancetante preteris. Sed la plej bela el la ĵurintoj forprenis la fajrostangon, kiu jam antaŭe estis enamiginta legiojn da fidelaj koroj. Tiele dormante, la generalo de l'amo estis malarmita.

Nu, ĉi tiun torĉon la nimfo subigis en la akvon de apuda fonto kaj ĝin estingis. Tamen la fonto porĉiame varmigiĝis per la fajro de la amo kaj fariĝis resaniga banejo por la korpe suferantaj.

Plorĝeme la Granda Poeto poemas, ke, vekigiĝinte, la eta dio furiozis pro la perdo de sia brulstango, kaj proklamis venĝon kontraŭ ĉiuj ĉastĵurantoj. Irinte al la dio de l'milito Kupidono havigis al si pafarkon kun sagoj, per kiuj li nun trafe-maltrafe celas la korojn de la homoj. Ne plu la eta dio promesis aŭ fidelon aŭ feliĉon al enamigiĝintoj—kaj—la Granda Poeto amsklaviĝis al sia amatino.

Tamburas la Granda Poeto:

"Mi iris al la fonto por serĉi kuracon, sed nur povis konstati ke, 'La fajro de l'amo varmigas la akvon, 'Sed la akvo ne povas estingi la amon."

**KONKURSO.**

La prez. de la Sydney Esperanto Society premie donacos originalan dramon de E. Privat "Ginevra" al la samideano, kiu antaŭ la 31 Septembro divenos la nomon de "la Granda Poeto" kaj ankaŭ plej akurate indikos la versaron el lia verkaro el kiu la supra "Amrakonto" estas reverkita.

**MORE ABOUT OURSELVES.**

From a Sydney well-wisher comes an interesting letter in which he gives, among other things, his opinion of "La Suda Kruco." We feel impelled to answer him publicly, for we believe the open discussion to be not without interest for readers generally. He says:

"La Suda Kruco" is not a good title for a propaganda gazette. "The Australian Esperantist" or even "Esperanto sub La Suda Kruco" would be preferable. The present name would attract nobody. Furthermore, the paper is too compressed and difficult to read. The content is at times too shortened and the use of compound words to save space somewhat too frequent.

In reply to the first objection we would say that "La Suda Kruco" is NOT primarily a propaganda organ; it is, before all, a link to bind together the widely dispersed Esperantists of Australia, New Zealand and elsewhere, conveying to them news of the movement in this country and from the outside world, and supplying them with short inspirational articles and paragraphs, and a modicum of Esperanto reading matter. Together with this function, it strives to serve as a medium for bearing abroad news of Australian Esperanto activity, making known to the central organisations in Europe that the language of Zamenhof is a living thing in the far-away Antipodes. It can be called a propaganda organ only insofar as it is sent regularly to diverse publications and institutions which we deem to be good ground for such attention. As a consequence of this policy, reproductions from our pages have appeared from time to time to encourage us, but it must be confessed that direct, large-scale publicity work must be left to more powerful gazettes, such as "The British Esperantist and International Language" (the title of the now amalgamated London organ).

We agree that "La Suda Kruco" is not the best title for a propaganda organ, but as stated above the gazette is not such. One might go even further and doubt whether sense of the phrase is immediately clear to every foreign reader's understanding. "The Southern Cross (constellation)" is, perhaps, better translated by "La Suda Stelkruco." However, to change the title would necessitate re-registration at the Post Office and other formality, which in the present circumstances we think unwarranted.

True it is, that heretofore the pages have been rather too tightly packed. This is the outcome of the printer's generosity and the earnest desire of the editor to utilise to the fullest extent the limited space at his disposal. The matter is, however, one that merits consideration, and henceforth one may look for a few more rules and "whites" to relieve the denseness. We were not aware that our paper contains more compounds than the average European organ; the rather frequent use of adverbs instead of prepositional locutions is in some measure influenced by the remarkable article by Dr. Privat in "Esperanto" (April 1930).

We thank those who from time to time manifest their interest in the little paper by sending us their impressions, opinions, and suggestions; and we assure them that we will do all we can to make it ever more interesting and efficient.

**"GALLANT."**

(1) In the sense of "brave," "courageous," "fearless" render "brava," "kuraĝa," "sen- or maltima," but when meaning

(2) "polite and attentive to women" render "galanta" as Zam. uses it at "Batalo de l' Vivo" 58/13 and Rabeno de B. 41/16. In the sense of

(3) "gay," "fine," "splendid," "magnificent" or "showy" as regards dress

**HAROLD PUDNEY**

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcianta fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

**Specialisto pri Fontanplumoj**

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

**7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.**

or personal ornamentation one could use "bele (or peneme) vestita," "belvesta," "dande" or "belege or "grandioze" or "pompe" vestita, or some such expression as the context calls for. There is another, and unpleasant, meaning which some authors express by "kavalir'", "amaj'", "amajem'", or "amist'" (G. Dandin 25/14).

### LA 3AN DE DECEMBRO, 1854. (daŭrigata)

Carboni sen ĉia ceremonio eniris lian tendon.

"Nu, kio?" demandis Lalor lakone.

"Petro, kamaraĉjo, alvenas por nin helpi dek mil el distrikto Creswick (elp. krezik). Ili venas, ili venas!"

"Ĉu ili havas sufiĉe da pafaĵo? Se ne, estus pli saĝe, ke ili restu tie. Iru, Carboni, por peni akiri pli da pulvoro ĉe la butikistoj. Donu al la vendantoj nian pagpromeson. For!"

Vendredo finiĝis, aŭ pliĝuste dirite, neniam finiĝis, ĉar ili daŭrigis ĝin en la venontan tagon. La tutan nokton aŭdiĝis la sonorado de la forĝistaj marteloj, la krioj de la ĉefoj, la Marseillaise hore kantata de akraĵoj vagantaroj.

Sabatmatenon dudeko da buĉistaj vagonoj alvenis alportante de favoraj buĉistoj provizojn da viando por la ribelantoj.

Eĉ ne unu rajdpolicano montris sin aŭ en la urbeto aŭ sur la terplato de post la lasta persekuto al fosistoj, kio okazis la pasintan jaŭdon.

Je tagmezo John Haynes (elp. ĝon hejnz) kun mil fosistoj nevidate de la cetero kaŝe foriris. Ili rapide aliris al Soldiers' Hill (elp. solĝerz hil), kie tendaris la soldataro.

En la tendaro estis eĉ ne signeto de vivo ĝis kiam la fosistoj venis en distancon de kvindek jardoj. Tiam surprize ekfulmis, el embusko je dekstre de la tendoj, longa kraklinio de fajro.

Kelkaj fosistoj falis. La cetero haltis. Haynes sola antaŭeniris. "Antaŭen! Antaŭen—!"

Pafilo krakis. Li ĵetis supren la brakojn kaj falis dorsaltere. Neniam li plu moviĝis.

La sendisciplina amaso terurite forkuris kvazaŭ ŝafoj, sinsave, tien-ĉien, kvankam neniu persekutis.

Lalor, en sia tendo, aŭdis la forkuregon dum la senspira hordo sin premis en la Stockade (elp. stokejd; enfermita defendoplaco). Sciiginte pri la kaŭzo de tio li kolerege pugnofermis

la fingrojn kaj flamis liaj okuloj. Kurinte ekster la tendon li saltis sur arbostumpon.

"Viroj de la Suda Kruco! Ĉu vi faris min komandanto nur por moki al mi? Ĉu vi intencas obei min? Aŭ ĉu mi estras nur minan rubon? Kiu estas kulpa pri ordono je tiu frenezaĵo? Kiu planaĉis tiun sinmortigon? Parolu iuj el vi!"

Kriis respondon Tom Mullins, vigla, juna giganto el Irlando, kiu sidis sur la tero penante foseti kuglon el la brako. "John Haynes ordonis. Ja vere!"

"Kie estas Haynes? Montru vin, vi sovaĝa Irlandano! Alvenu! Kie vi vin kuŝas? Ĉu vi tro hontas—"

"Li kuŝas sanga kadavro—tie," informis Mullins, montrante neprecize en direkto al la polica tendaro.

Ĝemo eliris el la homamaso.

"Kompatinda Jack (elp. ĝak)," diris pli mole Lalor. "Pacon al lia animo. Li pagis sian frenezaĵon per la vivo. Sed fine, ĉu plaĉas al vi, ke mi restu via komandanto?"

"Jes, jes, jes!" aŭdiĝis el ĉie.

Granda vejno ekelstaris nigre sur lia vasta frunto. "Pro ĉielo, do, mi mortpafos la plej sekvontan, kiu malobeos iun mian ordonon. Lessmann! Prenu kvindek elektitojn kaj patrolu la vojon Main. Mortpafu ĉiun kanajlon rabantan la butikistojn. McGill, elektu centon por postena deĵoro. Tiuĉinokte estos donita signalvorto kaj iu ajn nescianta ĝin ne povos eliri aŭ eniri tiun ĉi enfermaĵon. En la nuna tempo malkonvenas viziti la drinkbudojn. Jam malkonvene estas danci kaj kartludi! Mi avertas, ke jam de nun malobei signifas ekmorti.

Li rapide turniĝis kaj reeniris sian tendon. La viroj staris grupe. Tiu nova fazo de la afero malplaĉis multajn, kiuj enviciĝis en la ribelantaron nur por "ĝui sportaĵon."

Sunsubiro kunkondukis pluvon, kaj multaj gardistoj forlasis la postenon por ŝirmiĝi. En la mallumo dekduoj da fosistoj kaŝe iris al teatro kaj dancejo kaj kartludejaĉo kaj drinkbudo. Tremo de superstiĉa timo travibris la ribelantojn, kiam ili eksciis, ke la signalvorto por tiu nokto estas la malbonsigna "Vinegar Hill" (2). Tim Kelly de Red Hill ĵetis teren la pafilon.

"Mian maljunan patron oni mortigis ĉe Vinegar Hill. Nenia bonaĵo povos trafi nin per tiu finomo! Me ne volas

la aferon plu! Mi ne volas!

“Mi eksiĝas pro ‘Vinegar Hill’”, subvoĉis ankoraŭ alia. Tiel, tra la tuta nokto, aretoj da viroj forlasis la flagon, pri kiu ili jam antaŭe ĵuris, ke ili bataldefendos ĝin. Je la dua horo la larmema (3) patrioto Fred Vern kun granda nombro da siaj pikilegistroj malaperis kaj ne plu vidiĝis ĝis post semajno.

Je la kvara horo malpli ol kvarcent viroj restis interne de la enfermaĵo. Goodenough (elp. gudinuf), polica spiono, ŝteliris for. Tio estis por li facila, ĉar la plejparto el la gardistoj jam dormis ĉepostene aŭ sidis grupe ĉirkaŭ la subĉielaj fajroj.

Ĝisrinte Soldiers’ Hill li informis kapitanon Thomas pri la aferstato ĉe la Stockade.

Tiu brava oficiro rapide elpensis planon. Je la kvina horo lia malgranda armeo enviciĝis apud la sidloko de la nuna stacidomo. Ĉio batalpreta! Sufiĉega pafaĵo jam donita al ĉiu viro. Thomas, sur nigra militĉevalo, finordone alparolis siajn soldatojn.

Singardeme, senbrue la ruĝvestuloj glitis malsupren laŭ la deklivo en la malluman valon. Ili ŝovis sin tra la densa kreskaĵo sur la terplato, kie nun troviĝas la kriketejo. Sen brueto ili kaŝiris ĝis la barikadoj.

Je la kvardek minutoj post la kvina, Thadeus Moore (tadius mur), unu el la malmultaj gardistoj deĵorantaj ĉe la Stockade, pensis ekvidi ruĝvestulon movantan inter la apudaj arboj.

“Parolu!” li haltige vokis. “Kiu estas vi, apud tiu arbo? Ne moviĝu Konigu vin—se ne, mi pafos!”

Nenia respondo. Sian longan pafilon levinte li ekpafis.

“Kure ataku!” kriegis Thomas, kaj dragonoj, rajdpolicanoj kaj infanterio subite forlasis ŝirmon kaj atake kuregis al la muroj.

“La Joes (elp. ĝoz)! La Joes!” (4), tranĉe kriis Moore je plenvoĉo.

Pafilo ekfulmis de la soldatoj, kaj la Irlandano falis, tordante sin kaj dolore ruliĝante. Lia paroksismo subite finiĝis, kaj li kuŝis tute senmova.

La mortkrio de Moore donis alarmon al la fosistoj, kaj nun el tendo kaj barako kaj kampfajra rondo ili rapidis al defendo.

(Finota)

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro Jas. P. Lauder. Komunikajojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto,** s-ro P. Holmes; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots Church Hall, 97 Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, “Age” Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, “Manning Building,” 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ “Hotel Sydney” kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo “State Insurance.” Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinlando (Queensland)

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

---

## Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

---

N-ro 135 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. SEPT.-OKT., 1931.

---

## N.Z.E.A. SECTION.

In common with other countries, New Zealand is feeling the full force of the economic crisis; and so are the various national organizations, etc., the New Zealand Esperanto Association not being an exception. The case of the N.Z.E.A., however, gives cause for certain satisfaction to its office-bearers, for notwithstanding the fact that the depression is affecting seriously the strength of the N.Z.E.A. membership—about 50 members are still required before last year's figure is equalled—the useful work of the Association is very little affected, and the work of furthering Esperanto is steadily continued. In prosperous times the N.Z.E.A. will no doubt enjoy the full financial support of its past and present membership (250), for in such times a subscription of half a crown is inconsiderable; whereas now, when almost everyone is making sacrifices and many are wholly unemployed, the amount represents a substantial sum. Appreciation of the manner in which many old friends have stood by the Association (and the movement, too) at a time when help is most needed, must, however, be recorded—their loyalty will be remembered in later days when reference is proudly made to the "healthy state of our membership." During 1931 the N.Z.E.A. has obtained ten new members for itself and one for the U.E.A., and five members have paid subscriptions for next year. The N.Z.E.A. also acknowledges with thanks donations from Messrs. D. J. Munro, Tarras, and B. Berry, Kai-kohe (7/6 each), and T. G. Creedon, Taumarunui (2/6).

## CONGRESS AFTERMATH.

The N.Z.E.A. received an enormous quantity of work from the 2nd Congress. All records and reports were prepared, and the following tasks, decided upon by congress, were undertaken: Copies of congress resolutions were supplied to the Prime Minister (Hon. G. W. Forbes), to the Minister of Education (Hon. H. Atmore), and to the Minister in charge of Tourist and Health Resorts and Publicity Department (Hon. T. K. Sidey); efforts are being made to have a remit favoring Esperanto discussed at the next teachers' conference; a draft questionnaire is to be sent to all candidates at the general election has been prepared for the N.Z.E.A. Executive's approval; additional broadcasting facilities are being sought from stations 1YA (Auckland), 2YA and 1WZ (Wellington), and 4YA (Dunedin); and preliminary correspondence has been written in connection with the 3rd Congress—due to be held at Christchurch next Christmastide.

## EXECUTIVE DECISIONS.

During the past quarter the Executive decided to donate £1 to "La Suda Kruco"; to issue to all members a circular letter setting out the position of the N.Z.E.A.; to appoint a personnel of the Examination Committee as follows:—Messrs. E. C. Jack (Chairman), W. L. Edman-son, L. E. Dust, Bertram Potts, and W. H. King (Secretary); and that in view of the present unsatisfactory circumstances, political and economic, together with the fact that a general election is approaching, not to arrange



another deputation to the Minister of Education in the meantime.

#### N.Z.E.A. MEETINGS.

Since publishing the 6th "Official Bulletin," three meetings—two Committee and one Executive—have been held; the Examination and the Tuition Committee met on 24th June, and the Wellington members of the Executive on 24th July.

The Examination Committee discussed the scope and the forms to be used in the N.Z.E.A. oral test, and the question of appointing qualified examiners at the three centres, Auckland, Christchurch, and Wellington. A list of names was prepared, and the secretary was instructed to obtain the consent of the Esperantists concerned to nomination by the Committee to the N.Z.E.A. Executive.

Directed by congress, the Tuition Committee investigated the establishing of a course of Esperanto tuition by correspondence, and unanimously made an affirmative decision. A suitable course will shortly be drawn up.

The local members' Executive meeting decided that the secretary should write to (1) the Wellington Branch of the League of Nations Union outlining the recognition given Esperanto by the League itself and asking the Branch to discuss the subject and to accord support by passing a favorable resolution; (2) the Prime Minister, requesting him to instruct the New Zealand representative at the League of Nations to introduce the question of Esperanto with a view to obtaining the League's official authorisation of Esperanto-teaching in the schools of the members of the League; (3) the Editor of "La Suda Kruc" informing him that provided the gazette appears with a certain degree of regularity the N.Z.E.A. will extend in the future the same support as given in the past; (4) Mr. L. E. Pfahl, Sydney, enquiring the position regarding the congress proposed to be held at Sydney early next year.

#### INTERNATIONAL CO-OPERATION.

The N.Z.E.A. is ever willing to cooperate internationally. It has forwarded a letter congratulating the N.S.W. Minister of Education upon his decision to permit the instruction,

as an experiment, of Esperanto in a State school for one year; provided a list of New Zealand Esperantists and supporters to the Esperanto Society, Sydney, for use in connection with the projected congress; and supplied information on the Dominion's system of radio broadcasting and control to Mr. S. Meusch, Nieuwe, Netherlands. Furthermore, a statement regarding Esperanto and Scouting was obtained from the Chief Scout, Lord Baden-Powell, during his recent visit to the Dominion, and forwarded to the Scout's Esperanto League, Netherton, England; and an outline of the Esperanto movement in New Zealand was supplied to Mr. L. C. Mansfield, Perth, W.A., who sought particulars.

#### PROPAGANDA.

Although valuable work is being accomplished in this field by clubs and isolated Esperantists, the N.Z.E.A. does not allow to pass an opportunity to propagand. Official letters have been written to "The Dominion," Wellington (Defilement of English), "The New Zealand Observer," Auckland (2nd Congress), "The Otago Daily Times," Dunedin (A Universal Language), and with Mr. Bertram Potts, Secretary of the Wellington Club, arrangements were made for the publication in the newspapers (2) at Wellington and at Lower Hutt, of a splendid half-column article relating to the recently appointed Lectureship of Esperanto at the Liverpool University.

#### F.O.R. AND ESPERANTO.

On 24th July, the N.Z.E.A. secretary attended a committee meeting, held at Wellington, of the New Zealand Branch of the International Fellowship of Reconciliation for the purpose of discussing the work and value of Esperanto. The committee accorded an attentive hearing, and decided to suggest to F.O.R. headquarters that the Fellowship's official "Statement of Purpose" should be enlarged to include a paragraph recommending increased study and use of Esperanto. A circular about to be issued by the committee to the F.O.R. membership is to contain a reference to Esperanto and a special report covering

N.Z.E.A. activities. Special thanks are due to Mrs. M. Drury, Hon. Sec. of the F.O.R. in New Zealand, who was instrumental in having the matter brought forward.

### SECRETARY'S REMINDER.

N.Z.E.A. subscriptions (2/6 per annum) fell due on 1st April last. Correspondence should be addressed to the Honorary Secretary, N.Z.E.A., 10 Queen-st., Wellington.—W.H.K.

### NEKROLOGO.

Je la 23a de Julio, 1931a, forpasis ankoraŭ unu el la plej bone konataj pioniroj de Esperanto en Nov-Zelando—s-ro James Hampton, D.B.E.A. Li mortis ĉe Christchurch, kie li naskiĝis antaŭ 56 jaroj.

Scipovinte stenografion (Pitman'an k. Gregg'an), s-ro Hampton legis pri "la nova internacia lingvo, Esperanto" en "Pitman's Magazine" en la jaro 1904, tuj akiris lernolibron, kaj gajnis la B. E. A. diplomon en Julio, 1907. Li interkorespondis per i.p.k. alilande pogrande kaj diligente propagandis dum multaj jaroj. Unu el liaj ĉeflaboroj estis fondi la Christchurch'an Esperanto-Klubon, kiun li faris post klarigparolado liverita ĉe publika kunveno okazigita ĉe la "Norma Lernejo," Christchurch, en 1906. Liaj kunoficistoj tiamaj estis s-roj Cedric F. White, O'Bryen-Hoare, kaj Rabeno I. A. Bernstein (Vic-prezj.), s-ro J. A. Clarke (Hon-Sek-o), s-ro T. Newburgh (Hon. Kas-o), s-ino A. Chapman-Taylor (Hon. Bib-o), s-roj E. D. Bernstein, C. J. Whittaker, R. W. Eastwood kaj Prof. Bickerton (Komitatanoj), kiujn multaj restantaj pioniroj kredeble bone memoras.

Kun lia edzino, kiu postvivas lin, s-ro Hampton aniĝis (N-ro 10533) al la B.E.A. en 1904, kaj samtempe abonis al "La Esperantisto" (en 1905 ŝanĝita al "La Brita Esperantisto"); kaj li aliĝis al la nuna N.Z.E.A. je starigo de la asocio en 1929, sed pro premo de negocaferoj li devis forlasi sian por Esperanto laboron publikan. Fine la sano rompiĝis kaj, malfeliĉe, li estis vokita antaŭsiatempe. Nian profundan simpatian kaj Esperantistaran dankon pro laboro kuraĝege kaj fidele elfarita.

—W.H.K.

### KRONIKO.

**Perth, W. Aŭst.**—Nune ni semojn disŝutas en la frukteman teron de l'gejunula menso. La 4an de sep-o s-ro Byatt vizitis al la Metodista Halo ĉe Nedlands, por paroli al junuloj pri Esp-o. S-ro Claxton, per trafvorta traktaĵo, stimulus ilin ĝis granda entuziasmo. F-ino Byatt kantis Esperante, per tio, montrante, kiel oni povas la lingvon ankaŭ tiumaniere uzi.

S-ro A. Saar atentontene alparolis geanojn de la A.N.A. (asocio de en-Aŭstraliaj naskitoj) ĉe Suda Perth. Post kiam tiu klarigis la devenon kaj celon de Esp-o, s-ro Claxton donis malmultevortan trakton, rimarkigante kiel logika, scienca kaj bela estas la interlingvo. La kunvenintoj streĉe aŭskultis kaj inteligente metis demandojn. Iuj deziras eklerni.

**Wellington, N.Z.** — Interesplenan parolon pri Esp-o liveris s-ro E. Jack, prez-o de la ĉi tiea Esp-Klubo dum julia vespero al ĉ. 30 junuloj ĉe "Donbank," pensionego de la Kristana Junularasocio (Y.M.C.A.). La 27an de aŭg. s-ro Jack lekciis al 59 membroj de la loka grupo de la Societo de Nov-Zelandaĵ Sekretarioj. Kapable pritraktante sian temon, li forte impresis la aŭskultantojn, inter kiuj troviĝis multaj el tre varbinda tipo, kaj multaj neniam antaŭe havintaj okazon aŭdi la faktojn pri Esp-a progreso. Bona laboro en tutnova kampo.

De post lasta raporto la W.E. (laboristkultura) klubo ĉiumarde laboris jenprograme (krom unu horo da instruo ĉiukunvene):—

28 julio: Paroladis s-ro E. C. Jack, La Ligo de Nacioj kaj Ĝia Raporto Pri-Esperanta, s-ro W. H. King, La N.Z. Esp-o Asocio, s-ro Josefo Major, Psikanalizo. Originala komedio, La Interpretisto renkontas Francan Vizitanton, rolis f-ino C. Smythson, s-roj V. Leck, Bertram Potts, kaj Major.

4 aŭg.: Parolado de s-ro Jack, La Disvastiĝanta Utilo de Esp-o; originala humoraĵo, La Afero de la Paciento, rolis s-roj Potts kaj Major.

11 aŭg.: Paroladis s-ro Jack pri Esperanto kaj Rotario; originala komedio, La Stranga Eraro, rolis f-inoj Smythson, G. Carty, s-roj Leck, Major kaj Potts.

18 aŭg.: Legado de s-ro W. T. Brown, La Pesimisto parolis al Amiko,

de s-ino Drury, La Skota Farmisto vizitas la Urbegon; f-ino E. M. Penman deklamis Kiam Nigra Kokino demetas Ovon, s-ino Potts prezentis La Signo super la Butiko, kaj s-ro L. Meredith, La Soldato respondas al la Oficiro. Interese lekciis s-ro Major pri Kriminologio. Originala komedio, La Poŝt-oficisto havas Surprizon, rolis f-ino Smythson, s-roj Potts kaj Major.

25 aŭg.: Farante semajnan alparolon kiel prezidanto, s-ro Jack konriĉe traktis pri Esp-o kaj Eduko. F-ino Smythson legis lumigan artikolon el eŭropa ĵurnalo pri la Progreso de Esp-o en Nov-Zelando; s-ro L. Dust kapable lekciis pri Arheologia Esplorado en Pompejo; lego de s-ro Brown, La Knabo parolas pri la Horo; originalan komedion durolan, Tro Avida, prezentis f-ino Smythson kaj s-ro Potts.

Krom la distro kaj kulturo, kiujn tiajn programoj havigas al klubanoj, la ĝenerala movado profitas ilin, ĉar taggazetoj sendadataj ĉien en la Dominio enhavas tiukoncernajn raportojn, kompilitajn de s-ro Potts, kies laboro foje instigas homojn ekenketi en diversaj lokoj.

**Christchurch, N.Z.**—S-ro N. M. Bell lastatempe grave malsaniĝis, kio kaŭzis al liaj amikoj akutan maltrankvilon. Lia efika laboro ĉe la laboristkultura kurso, radidissendo, kaj monata Esp-a kolumno en la "Christchurch Star" estis daŭrigataj de kunlaborantoj. Baldaŭan resanon!

**Coburg.** — The Coburg Esperanto Group still meets for study every Thursday evening in the Labor Hall, Sheffield-st., Coburg. Like all growing things in the depth of winter, the organisation has been more or less at a standstill during the last two months. But doubtless the weather is not so much to blame as the distressing economic conditions, which are interfering with the regularity of members' attendance, and discouraging those who might otherwise be disposed to devote time to our worthy cause.

We are, however, not downhearted, and still hope to be well represented, when the results of the Pyke Memorial Examination are announced.

The return of Mrs. A. Hintze, after an absence of several weeks through ill-health, was hailed with sincere

pleasure. All members are glad that she is practically restored to her former self, glad for her own sake and that of the Club, on whom she has such a stimulating influence. During her absence Mr. Glaisher, of the Melbourne Club, kindly came to the rescue and instructed Mrs. Hintze's class. It will indeed be a boon to Coburg if he can give his able assistance indefinitely.

### EL LA FOLIETO DE LA MELBURNA KLUBO.

"Ĉe Moe, Viktorio, s-ro Max Schmidt starigis grupon el naŭ kursanoj. Li ankaŭ penas fondi grupojn inter skoltaj ĉe Trafalgar kaj Yallourn."

"De post la jaro 1923 la sekretario, s-ro Rawson, ĉiun kvaran sabaton disaŭdigis paroladon pri Esperanto de la radistacio 3LO, Melbourne. Kiel rezulto de tiuj ĉi paroladoj li ricevis multajn leterojn. Kutime proksimume ĝis 30 leteroj alvenas monate de aŭdintoj, kiuj deziras pluan sciigon pri la lingvo. Ofte pli granda nombro riceviĝas. Fakte tiom multe kiom 135 leteroj riceviĝis dum unu monato. Al ĉiuj leteroj la sekretario respondos persone. Ne malgranda devo."

Eĉ de malproksima Kvinlando kaj Nov-Zelando venis informpetoj.

Je la 19a de aŭgusto s-ro Drummond por la klubanaro prezentis al s-ro E. McKenzie kaj f-ino Belcher edziĝan donacon el kristala pelvo kaj vesperservico.

La 26an s-ro M. Hyde, mallonge feriante en Melburno, alparolis la klubon pri Brisbano. Oni diras, ke s-ro Hyde estas la plej fluparola Esp-isto ne nur en Aŭstralio sed eble en la tuta Suda Duonsfero, kaj oni nur devas aŭdi lin paroli esperante, por konvinkiĝi, ke la famo estas vera.

S-ro C. Hughes, kiu estas instruisto ĉe la lernejo kaj estro de la grupo, raportas pri la Esperanto-klubo ĉe la Brighton-a Teknika Lernejo. "Dum 1931 ni havas Esp. klubon ĉe la suprenomita lernejo. Ĝi kunvenas dusemajne kvardek minutojn. Ni, ankaŭ dusemajne, eldonas esperante gazeton por la klubanoj. Estas 20 membroj. Ĉirkaŭ 200 knaboj deziris aliĝi la klubon, sed la reguloj de la lernejo permesis nur 20. La plej bonaj knaboj do estis elektitaj, kaj progresas rapide. Ili scias la gramatikon kaj malgrandan vortaron.

Ili legas kaj nun lernas paroli."

Ni jam luis la Queen's Hall, Collins-st., por koncerto, kiu okazos la 2an de decembro. Ĉe tiu koncerto oni deziras kunigi la tutan Esp-istanon de Melbourne. Ni tre streĉe penados por prezenti taŭgan programon.

### KION VI SCIAS?

#### Respondoj.

1. Estis iam opinio, ke la vejno direktigas de la tria fingro al la koro.
2. Dekdu je ĉiu flanko.
3. Nigra ŝinto ne estas vera, sed blua iu-foje estas.
4. La aramean lingvon.
5. Napoleono.

(El "Amerika E-isto.")

### TO OUR SUPPORTERS.

Thank you for the following:—

Mr. H. Love, 4/6, June, '32; Miss P. McCabe, 4/6, June, '32 (gift 1/-); Mr. Yuzo Hazegawa, 4/-, July, '32; Sales Club, 3/-; Dr. F. Williams (sale), 10/-; Miss Chisholm, 5/-, May, '32; Miss D. Bell, 5/-, July, '32; Miss K. Krass, 5/-, July, '32 (1/- adv.); Mr. F. Pavlinovich, 9/6, Mar., '32; Mr. A. Slade, 4/6, July, '32; Anony., 10/-; N.Z.E.A. (subsidy), 22/6; Mrs. Trewin, 4/- (pd. Feb.); and nine others.—Total: £6/8/11.

### KIAL NE APERIS SEPTEMBRA NUMERO?

Laŭ kontrakto kun N.Z.E.A. devas aperi oktobra n-ro. Je la 13a de Aŭgusto mi havis disponebla £2/2/-, kiu sumo, laŭ mia antaŭzorga konstato, ne rajtigis min estigi ĉe presisto ŝuldon £4/15/-, koston de unu numero. Tial, la 17an de Aŭgusto, mi urĝe flugigis informojn al ĉ. 20 personoj, petante reabonon. Nur kvar respondis monbilete. Verdire, N.Z.E.A. sendis subvencion 22/6 (por oktobra n-ro) kaj du homoj kune 19/6, sed tro malfrue por pravigi eldonon de septembra. Se tiumonte mi estus aperiginta "Sudan," sendube fiaskus pro monmanko la precipe grava specialnumero de N.Z.E.A.

Kio estas al tiuj, al kiuj mi jam sendis diverstempe avertojn pri abonkonsumiĝo? Pli ol £35 devus laŭrajte kuŝi en nia organkaso. Sendube aferoj mone krizas ĉe multaj poŝoj, sed, eĉ enkalculante tion, konstatende estas, ke generale respondo al miaj alvokoj estas tre guteta, ĉagrena. Ne pagintaj jam de

1928 kaj ricevintaj jam kvinon de avertoj, certaj homoj ne volas sendi al mi eĉ linion klarigan.

Vekiĝinte el indiferenteco, sentante vian ŝuldon, oferu teatran bileton, aŭ nenecesan galanterion, por ke nia organeto ne sensuke fariĝu periode-aperto, stumbe faliranta al tomo.

—Redaktanto.

### ESPERANTO KAJ RADIO

#### BRODKASTOJ EN N.Z.

Du stacioj en Nov-Zelando dissendas E-ton, nome 3YA (Christchurch) kaj 1ZR (Auckland). De la unua s-ro N. M. Bell, M.A., longatempe regule parolis ĉiusessemajne, kaj pastro T. R. Wolloxhall jam de 24 junio parolas el 1ZR pri E-to. En 16 septembro li traktos pri "Esperanto en lernejoj de la tutmondo."

### 1928, 1929, 1930 JARKOLEKTOJ DE "LA SUDA KRUCO" ESTAS HAVEBLAJ.

ĉe Box 731 F., P.O.  
Elizabeth-st., Melbourne.

Interesaj artikoloj kaj skizoj Esperant-kaj angalingve.  
Pike atentotenaj prilingvaĵoj kaj librocenzoj.  
Prezo: tri ŝilingoj, inkluzive sendkosto, por ĉiu.  
(fratorganoj bv. represu)

### ESPERANTO EN PAPUO.

D-ro Fred. J. Williams, iama membro de la melburna E. klubo kaj pliposte prezidanto de la sidneja E. societo, nun deĵoras kiel registara kuracista funkciulo ĉe Samarai, plenumanta kròme oficon de delegito U.E.A.

Liaj devoj kiel kvarantena oficisto ekestigas al li oftajn bonokazojn por propagandi Esperanton ĉe vizitantaj ŝipoj. La ŝalupo, kiun provizis al li la registaro, portas la nomon "L'espero."

Alia Esperantisto nelaŭte sed efike laboranta estas pastro A. H. Lambton, de la anglikana misio ĉe Gedulalara, pervoje de Samarai; li estas traduke revestanta en Esperanton kelkajn ferakontojn el la papua lingvo.

“LA 3AN DE DECEMBRO, 1854”  
de Nathan F. Spielvogel,  
en “The Lone Hand Magazine.”  
(Finata)

Petro Lalor kuris ĝis la barikadoj.  
“Ĉi tien, knaboj!” Donu al ili salvon!”

El la fosista vico ekfulmis linio da fajro. La soldatoj iome haltis.

“Ankoraŭ unu tian kaj ni jam venkos,” instigis Lalor.

Elkrakis ankoraŭ amaspafo.

La ruĝvestuloj komencis disiĝi en malordo.

La voĉo de kapitano Wise aŭdiĝis riproĉe super la bruego. “La 40a! Ĉu vi intencas retiriĝi?”

Tio estis liaj lastaj vortoj. Kuglo trafis lin en la fruntomezo, kaj neniam plu li parolis.

“Ankoraŭ unu salvon!”, venis de Lalor.

Ree oni obeis.

La soldatoj nun retiriĝis malorde. Sed iu kuraĝa knabo klarionisto—lian nomon oni nun ne tenas en memoro—grimpite sur muron, trumpetis la “Kure ataku,” kaj ankoraŭ denove, denove, denove, li tion faris tra tuta tiu mallonga sed sanga duonhoro. Eĉ ne unu fosisto levis pafilon kontraŭ li. Tie li staris urĝante antaŭen la soldatojn.

La tonoj rekuraĝigis ilin kaj rememorigis al ili la tradiciojn de la regimento, la honoron de ilia insula hejmlando — kriegante, huraante, denove antaŭenkuris la malgranda armeo, dragonoj, rajdpolicanoj, infanterianoj!

La laste nomitaj, nezorgante pri la kugloj, kiuj terenfaligas iliajn kamaradojn, surgrimpis la barikadojn el lignoplatoj kaj minrubo kaj renversitaj ĉaroj. De sur la supro ili eligis salvon post salvo sur la ribelantojn. Tuj kiam kapo aperis el barako, aŭ tendo, aŭ sakto, ŝprucis pluvo da kugloj ĉirkaŭ ĝin.

La fosistoj nun haose cedis lokon. Lalor starigis sin supre sur kovrita per traboj ŝakto. Neatentite de li kugloj fajfis apudege.

“La venko estas nia, kamaradoj! Nun aŭ neni—” Li ekklinis sin flanken, ŝanceliĝante, sed sukcesis firmigi sin per ekteno al lignoplato de la nefortika konstruo. Lia vizaĝo estis kadavre pala.

“Antaŭen, kamaradoj—” Tiam okuloj kaj cerbo nebuliĝis. Li peze falis teren, tiamaniere ke la platoj pro ellokiĝo frapfalas sur lin.

La soldatoj vidante lin fali elpuŝis triumfan krimon. Ili nun estis interne de la Stockade.

Paniko, freneza senprudentiga paniko, ekkaptis la fosistojn. Iuj, transsaltinte la barikadojn, rifuĝis inter la montar-ojn malantaŭ Canadian (5)—unu vundita mizerulo tie mortiĝis pro malsatego—aliaj eniris ŝaktojn kaj funde tie kaŭris.

Sed forta Jock Robertson, netrudiĝema kiam ekzistis aliaj ĉefoj, sed preta je respondeco kaj kuraĝa kaj firmstara pro tio, ke frontis lin krizo, kriegis: “Ataku per ŝtalo!”

Tri paŝojn antaŭen li faris. Tiam ruĝa makulego ekaperis sur lia maldekstra korpoflanko. Li deŝiris sian vestaron kaj kuŝis en dolorego tordiĝante kaj baraktante sur la grundo.

Ross—kiu antaŭ du tagoj tiel gaje marŝis ĉe la fronto de la procesio al tiu loko—nun arigis la restintojn ĉirkaŭ tiu nova blua kvartagaĝa flago. Estis kvindeko da ili, armitaj per pikilegoj kaj glavoj. Jam de longe pafaĵo elĉerpigis.

Tiu rondo da fosistoj, en bluj bluzoj nomitaj “jumpers” (elp. ĝumpers) kaj strihavaj trikotoj, silente staris atendantante morton. Ĉiam pli proksime alvenis la soldatoj kun bajonetoj alfiksitaj.

“Al ili!”, instige kriis rajdpolicano. Kompatinda Teddy Thonen, iu vendisto de limonado, staris antaŭ la flago. Li

## —HEROLDO DE ESPERANTO—

estas la ĉiusemajna, supernacia kaj superpartia ĵurnalo de Esperantujo. Aperas jam 11 jarojn, regule kiel horloĝo, en granda formato, kun bonaj informoj pri la Esperanto-movado kaj el ĉiuj sferoj de la tutmonda vivo. Bonstila redaktita, riĉe ilustrita. Sendependa de iu ajn organizacio, sed servanta al la tuta movado.

Petu senpagan specimenon, kun senpaga riĉenhava „Katalogo de Libroj“!

„HEROLDO DE ESPERANTO“

Koln (Germanlando), Brusseler Strasse 94.

estis huraanta kaj krianta en sia gepatra Germana, kiam kuglo enflugis lian malfermitan buŝon.

"Ĝoja Jack," sennoma vaganta malŝparulo, subite sidiĝis. Turninte sere nan vizaĝon al unuokululo Ted McGlyn (elp. maglin), kiu kuŝis sangante kaj ĝemante, li diris per firma voĉo, "Mi hejmen iras."

Li ektenis la manon de sia kamarado. "Adiaŭ, kamaraĉjo, adiaŭ."

La soldatoj kaj policianoj nun kuregis supren laŭ la deklivo: restis nur malmultaj jardoj inter ili kaj tiu blua flago kun ĝia areto da pormorte difinitaj defendantoj.

"Deŝiru tiun ribelulan flagon!" ordone kriis kapitano Thomas. "Antaŭen, bonuloj!"

Ross el Toronto saltis el la rondo de fosistoj. Li ĵetis sin rekte inter la soldatojn, bategante dekstren-maldekstren per sia glavo. Bajoneto penetris lian bruston. Ĝi eltiriĝis kaj denove eniris. Jam la brava Kanadano plenumis sian ĵuron.

Tintego de stalo kontraŭ ŝtalon! Bajonetoj sur krudajn pikilegojn! Huraoj kaj fiĵuroj! Kun buŝoj malfermitaj, okuloj flamantaj, la du armeoj interbatalis simile al sovaĝaj bestoj.

Sindediĉo al afero, sentimeco, braveco, ne povis longe rezisti antaŭ disciplino kaj supera nombro. La malgranda fosistaro estis frakasita kaj la piedoj de la soldatoj premis la korpojn. La mortiga bajoneto ritme movis sin posten-antaŭen.

Glitis al tero tiu nova blua flago.

Mokkrioj kaj huraoj!

Oni dudekfoje enpuŝis bajonetojn tra ĝi: trenis ĝin tra koto: ĝi ricevis bapton en la sango de la defendintoj: ĝin oni suprenĵetis kaj kaptis sur ruĝaj bajonetoj.

"Tri huraojn por la Union Jack!" (6), kriis kapitano Thomas, dum oni tirtrenis ĝin supren sur la stango, kie antaŭe dum du tagoj flirtis la Suda Stelkruc.

"Gluteton da akvo al mi," ĝemis Ned Moore, kuŝante sur la tero, kun dismalfermita vundo en la ŝultro.

Iu besteca rajdpolicano kolerege turniĝis al li.

"Ribelulo!" Li levis sian bajonethavan pafilon por trapiki lin, sed leŭtenanto Hall—pacon al la ombro de tiu humana homo — flankenpuŝis la kanajlon kaj genuiĝis ĉe la mortanto.

Levetante ties kapon li donis trinki el sia boteleto.

"Elserĉu la terenon! Mortigu ĉiun malvolantan cedi!", iris la tuj posta ordono.

La soldatoj disiris serĉante. Cent dudek kvin kaptitojn ili prenis; multaj el tiuj estis vunditaj.

La barikadojn oni malstarigis, la tenojn kaj barakojn oni ekbruligis. Densa fumo supreniris de la brulanta ligno, kiu nigre forcindrigis la longajn, purpurajn branĉetojn de hardenbergio (hardenbergia monophylla) kaj la delikatan ruĝan erikon.

Tiam klariono trumpetis la alvokon, "Enviciĝu!"

La soldatoj levis siajn mortfalintojn kaj forportis. Post tiuj venis la kaptitoj, kunkatenitaj po duoj, gardataj de dragonoj, kiuj, armitaj per pistolegoj, estis pretaj kontraŭ ĉia porsava atako. Finposte iris la rajdpolicanoj. Ligita al la vosto de unu ilia ĉevalo, kaj trenata tra ĉiu kotaĵo, estis la ĉifonaĵo de tiu nova blua flago.....

Tiam la fosistoj revenis al la scenejo de dezertigiteco.

Kia vidaĵo por dimanĉa mateno!

Teruraj nenomaĵoj, kiuj antaŭ horeto estis viroj plenaj de vivo kaj forto, kuŝis tere, kun vizaĝoj al la blua ĉielo, buŝoj malfermitaj, okuloj larĝe streĉitaj, senbrilaj.

Iuj ankoraŭ agoniis. Kelkaj petegis akvon; kelkaj mortigon. Malgranda hundaĉo malfeliĉege hurlante sidis sur la brusto de sia mortinta mastro. Ĝegmantaj virinoj larmis super la kadavriĝintaj edzoj. Tio estis korŝira vidaĵo, sur la deklivoj de Eureka tiu dimanĉmateno, inter la pacaj eŭkaliptoj, la bonodoraj akacioj, la purpura hardenbergio.

La fosistoj forportis la senvivajn kamaradojn. Patro Smyth, unu el la plej mildaj pastroj, rajdis sur sia maljuna, blanka ĉevalino ĝis sur la montetan deklivon. Forte li jam antaŭe penis pacigi la intencon de la fosistoj, kaj multfoje en sia ligna preĝejeto li petegis la kongregacion, ke ili ne fluigu sangan.

Deĉevaliĝinte li genuiĝis ĉe unu post alia, jen donante trinkon de brando, jen la finan riton de sia eklezio, jen al nemiembro de sia kunkredantaro kelkajn vortojn de konsolo.

Li ekvidis figuron sub amaso da lignoplatoj. Post du-tri ŝovoĵoj per siaj

fortikaj ŝultroj li sukcesis disigi ilin. Tie kuŝis la ĉefkomandanto, Petro Lalor, verŝajne senviva. De sultro ĝis talio lia ĉemizo estis tramalsekigita de sango.

Patro Smyth kliniĝis super li.

La koro de Lalor ankoraŭ pulsas.

La pastro alvokis fosistojn al si. Ili zorge levis la korpon en siajn brakojn. Lalor ĝemis pro doloro. "Lasu min, pro Dio!"

Unu brako svinge pendis je lia flanko, frakasita kaj senpova.

"Alportu lin en mian loĝejon," ordonis la pastro, kaj la malfeliĉa procesieto nerapide foriris.

Venis nokto kaj ĉio silentis ĉe la dezerteca loko, krom nur la stranga krio de numenio el marĉo.

Sola figuro moviĝis en la mallumo, inter la fumiĝantaj ruinoj—ĥino (7) portante surŝultre du korbegojn pendantajn je ekstremoj de stango. Li rastis inter la cindraĵo de la estingiĝintaj fajroj, serĉante valorajojn ankoraŭ ne tute bruldifektitajn.

Sono alvenis el la arbetoj—dolorĝemo. La ĥino terurite ŝirkriis kaj forkuris tiel rapide kiel permesis tion liaj korbegoj.

Dezertigiteco! Morto! Silento!

La tago finiĝis.

## RIMARKOJ DE LA TRADUKINTO

- (1) La "Commune." Temas pri la Komuno de junio, 1848, en Parizo.
- (2) Vjnegar Hill, monteto en Irlando, estis la scenejo de malvenko de Irlanda ribelantaro antaŭ generalo Lake (elp. lejĵ) je la 21a de Junio, 1798.
- (3) "larmema patrioto." "Larmema" ĉi tie havas malestiman signifon pri "patrioto," kiu estis larmema pri la maljustaĵoj de sia lando sed ne havis kuraĝon batali.
- (4) "Joes." Moknomo donita de la fosistoj al la rajdpolicanoj.
- (5) "Canadian" (elp. kanejdj'n) estis tiam tendaro de fosistoj apud Bal-larat.
- (6) Union Jack. Nacia flago de Granda Britujo.
- (7) Ĥinoj iom tre grandnombre akompanis la unuajn fosistojn alrapidantajn al ĉiu ĵus trovita orloko.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro Jas. P. Lauder. Komunikajojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Holmes; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots Church Hall, 97 Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinlando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj:

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 135 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. NOVEMBRO, 1931

## “TRIDEK JAROJN EN LA ORA NORDO.”

Jan Welzl al la mondo rakontas.

En 1893 iu ĉeĥo, flamiĝinta pro ardo al akiro de riĉaĵoj laŭfame troveblaj en la Arkto, piede ekiris de Irkutsk norden trans Siberion. Tio estis por li longa, riskplena vojaĝo, kiu fine kondukis al 30-jara vagloĝado inter tiu stranga popolo, kiun tenas la glacivastoj kuŝantaj de Kanado ĝis Nova Zemlja.

Ĝisfunde li konas la Eskimojn. El mirinde funkcianta memoro li prirakontas ilian malpurecon, kompletan amoralcon (mankon de ajna seksmorala sento), mallongan vivpovon, la ĉiupaŝe variajn dialektojn, kaj la barbaran ĥirurgarton, laŭ kiu ili uzas kiel flikajon por la amputitoj karnon de kompatindaj infanetoj.

Li revenis al la patrujo en 1926, kaj, ekirante denove al amata Nordo, pensis, ke ĉagrene estus morti tie ekster la civilizo sen antaŭa transdono al posteula mondo de la stranga historio nestanta en lia cerbo. Tial, li venigis al si du ĉeĥajn ĵurnalistojn, ke tiuj steno-grafu rekte el la buŝo. Tion ili faris, zorgante per trafa demandado, ke la disvolviĝanta vivaventuraro iru sur glata relo. El tio ĉeĥa libro naskiĝis, kun frapa sukceso.

Jam ni havas Esperantan tradukon. La stilo estas naive simpla; nenia provo ornami faktojn per florbukeda lingvaĵo. La krudeco, ja bruteco, kion estigis en tiu ĉi bonhumorulo la malfacila vivado, ofte sin trudas al leganto. Lia Aŭgea puriĝo de malbonegodora kaverna de eksloĝintaj Eskimoj, lia puna mortbruligo al vendistoj de venenlikvaĵo, vomemigas ordinaran homon per nura lego. Alie en la libra enhavo levigos la brovojn al kelkaj legantoj pro forta dubo, se ne rekta nekredo. La aserto

pri la Malemute Kid kaj la kanguruo pensigos multajn pri tio, ĉu vere tiu besto povus elteni la morte-malvarman klimaton de la Arkto? Tamen, fininte la volumon eĉ tiuj kritikantaj konsentos kun la recenzanto, ke ili ĝuis la plej eksterordinare interesan vojaĝrakonton ĝis nun verkitan en Esperanto.

Unu el la impresoj donitaj de la verko estas tio, ke la kompatindaj Eskimoj, fundiĝintaj en la plej kruela bestbarbareco, per siaj naŭzaj, korŝiraj fikutimoj, elokvente atestas sian bezonegon de spirite puriganta kulturo. La absoluta manko de ia interfamiliana korligo, la terura forĵeto de infana vivo, la porkeja anarĥio intersekse, estas nepre aferoj, kiuj devas esti foredukita en la nomo de sana homaro. La perversaj eksperimentoj de fihomoj, kia la hundbredisto Kid, estas konformaj kun la eksterleĝa vivo, kiu karakterizas la senpolican neĝvaston. Feliĉe ekestas lumo, en tio, kejam la Soveto atendas la aŭtoritatan manon super tiu regiono. Negrave, kia politika opinio sidas en la koro, ĉiu homo ne povas ne konsenti, ke per tio almenaŭ le plej abomenindaj trajtoj de ilia senkultura vivo estos forviŝitaj al la Eskimo.

La cerbofrakasa fenomeno de la glacimara diskreviĝo; la brila gajaĉeco en Nome kaj Dawson en la orfrenezo de 1898; la mortriska veturo laŭ la Yukonrivero; la teruroj de la Chilcoot-Pasejo; la spirita febro, kiu plenmane ĵetis for sumegojn kontraŭ varo kaj servo; ĉion ĉi Welzl priskribas kun la sincereco de homo, kiu ja tremvibris tra la realo.

La traduko, farita de la Moraviaj Esperanto-Pioniroj, dediĉe al Mr. John Merchant, prezidanto de la I.C.K., estas bonega. Ĝi fidele spegulas la parolmanieraĵojn de la simplanima rakontinto, kaj sendube servos kiel bazo, laŭ



kiu oni revestos ĉi tiun modernan Odiseon en la idiomojn de malgrandaj popoloj, ĉe kelkaj el kiuj povas esti, ke nur malfacile oni trovas homojn kompetentajn traduki laŭ la ĉeĥa originalo.

La jenaj vortoj estas nekompreneblaj almenaŭ por anglo: pimplo, tvirnaj, mosheroj. Formaj aŭ sencaj devioj for de la S.A.T. Plena Vortaro: kopejk', prospekt', prostit', dimens', stift', pres-taj', hronometr', parti', hareng', tetu', marŝal', linole', drez', frunt', fret', kenguru'. Ŝerifo laŭ Boirac estas araba aŭ maŭra princo, ne usona "sheriff." Neologaj vortoj: kajuzo, sinamona, leadro. Bonven' estas netractiva; hard' terur', glor' kaj honor' estas transitivity. Dekses ekzemploj troviĝas de radikoj uzitaj kun neĝusta signifo. La formo "kelka homo" anstataŭ "iu homo" kaj similaj ne plaĉas.

Kvin ŝil. nebindita, ses sil. bindita. 320 paĝoj, 16 x 22.—Robo.

#### A WORD TO THE WILTING.

Idealism, defined here as the will to clothe with reality a noble idea, even at the cost of time, money and travail, is, one must fear, a hothouse plant with many of us, and can burgeon only in that warmth of spirit afforded by freedom from economic cares. The slow gnawing search for the ever more elusive means of livelihood, the shrunken annuity of them that fear that the barrier erected against a poverty-stricken old-age is crumbling before them—all the stress of life in these days of pressure—quickly restricts the souls of men who normally would feel their hearts expanding in search of some object outside their mere self-interest. Many of those who joined the Esperanto movement in a warm surge of enthusiasm are now subject to the withering influence of the present depression, which is inhibiting in them the play of a splendid instinct—the urge to share consciously in the evening of the world's rough places for those that follow.

The leaves of the subscription book impart to one charged with the life of the "Suda Kruc" a mingled sympathy and disappointment when he makes the tale of such spiritual casualties. Some of these who have, as lapsed subscribers, been receiving the paper for years, are, it seems, so bound to the wheel

of circumstance as to find it outside their power even to acknowledge to the administration receipt of it. Now, it would be satisfactory to know if the paper is appreciated by these silent recipients or not; whether it is carefully read and filed, or consigned to a more or less degrading annihilation. As some thirty pounds is outstanding through this indifference, we feel justified in regarding it as a matter that calls for their attention.

But there are encouraging offsets. In the same spirit that lighted the eyes of their most penniless "Majstro," there are friends of "La Suda Kruc" who, in clear recognition of the facts and their implications, are denying themselves to defend from the blast the sacred flame he lighted. They are of the company of those brave spirits, the glow of whose unchronicled sacrifice is diffused through the pages of Esperanto story.

It is well that there is sufficient strength of esperantist spirit behind the paper to hold on in the belief that, with the passing of the present difficulties, the fossilizing names in the address book will receive a new, flesh-and-blood significance, and that their owners will be inspired with fresh fervor to raise the torch now fallen from their tired hands.

#### KRONIKO.

**Palmerston North, N.Z.**—Estas ĝojige kroniki, ke post ampleksa parolado publika de s-ro R. Ross en aŭgusto, fondiĝis dekkvar-ana E. klaso sub la aŭspicio de la Laborista Eduka Asocio (W.E.A.). Kapable gvidata de s-ro Ross la klaso firme progresas. Gratulon!

**Wanganui, N.Z.**—S-ro S. Nolan, malnova amiko de E., gvidas klaseton tie ĉi. Li celas pligrandigi la anaron en 1932. Lia espero realiĝu!

**Papatoetoe, N.Z.**—Per la energio de f-ino E. Lindquist (ĉe 7 Wallace-rd.) rondeto de amikinoj kunvenas por studi E-ton. Trovinte la lingvon interesa, la rondanoj brave progresas, malgraŭ bedaŭrinda manko de kompetenta spertulo.

**Masterton, N.Z.**—Nian grupon vizitis en septembro la mondvojaĝantoj s-roj Kotulsky kaj Masluk, Latvoj. La sinjoroj estis gastoj de nia grupo je tagmeza manĝo en la ĉambraro de la Junu-

lara Kristana Asocio (Y.M.C.A.), kie staris tabloj belaranĝitaj, en la mezo de kiuj estis granda verdstelo el floroj kaj folioj. Gastoj kaj grupanoj kun reciproka plezuro vigle interparolis. Antaŭ adiaŭo, la vizitantoj informis pri la E. movado kaj esprimis dankon, precipe al s-ino Dewar, kiu aranĝis la tablojn kaj preparis la manĝon. Aperis en la taggazetoj taŭgaj raportoj, kiuj impresis la urbanojn pri la utileco de E.

**Wellington, N.Z.**—En urbrondoj jam graviĝis la loka klubo tiomgrade, ke tagĵurnaloj nun donas klubraportojn sub dulinia rubriko. La klubo kunvenas ĉiumarde por hor-longa instruo, post kio sekvas paroladoj, komedioj k.t.p.

**Upper Beaconsfield, Vik.** — S-ro Flanagan fondis grupon ĉe la ŝtatlernejo. Ĝi konsistas el dudek anoj.

**Bendigo, Vik.** — Grupeto estrata de s-ro Wooley.

**Melbourne, Vik.**—En Scots' Church Hall je la 3a de Oktobro okazis danc-festo, kiu estis tre sukcesa afero, kaj oni multe bedaŭris, ke ĝi estis la lasta en la jaro.

Ĉe la Melb. Societo okazis debato je la 20a de Oktobro. Ok anoj partoprenis kaj debatis pri la temo "Ke la noveloj de la 20a jareento estas pli bonaj ol tiuj de la 19a." S-ro Ballard, pli juna, afable konsentis aljuĝi, kaj li donis la plej multe da poentoj al la jesa partio.

### ANOTHER VICTORY FOR ESPERANTO.

Dr. F. Williams, Samarai, Papua, sends the following:—

"Some years ago my wife lost touch with relatives in Canada. In spite of attempts on the part of both parties to communicate with each other no success resulted.

"Recently I decided to see what could be done through the Universal Esperanto Association. I wrote to the delegate in Vancouver, British Columbia, where the relatives had last been heard of, sending full particulars.

"Soon a reply came back that the relatives had been located. Now, to the delight of all concerned, a correspondence interrupted seven years ago has been resumed."

### Postal Institute Esperanto Class. (From our Brisbane Correspondent.)

As a result of a heavy reduction in the Government subsidy paid to the Postal Institute, during the last year or so, educational activities have been curtailed. Unfortunately, some classes had to be abandoned, while others struggled along under difficulties. Since the depression set in, however, a new class has been formed, at which Esperanto is taught. The pupils are under the tutorship of Mr. A. M. Hyde, F.B.E.A., a leading authority on this subject in Australia. A knowledge of Esperanto is no mean accomplishment. It serves as an introduction to the study of other languages, and its value as an international auxiliary language has long since been recognised. Esperanto is useful to the student of international affairs, and to others who are fond of reading, as it makes available to readers a quantity of literature which is not obtainable in English.

(From the "Federal Public Service Journal, 31/7/31.)

### LA DISFENDITA LANGO DE LA LACERTO.

El la papua lingvo  
tradukita de Pastro A. H. Lambton.

Iam estis lacerto kaj pigo, kiuj en la sama domo loĝis. Ili estis bonaj kunuloj. La manĝaĵon, kio ajn ĝi estis, ĉu rato, aŭ serpento, aŭ fruktoj, aŭ kion ajn ili kaptis en retoj aŭ aliaj kaptiloj, pri kies uzo ili bone komprenis, ili ĉiam porciigis amike.

Okazis, ke ofte ili forlasis nutraĵon en la domo, kiam ili eliris. Unu tagon, elirante al rivereto por naĝi, bonan manĝaĵon ili metis kaŝitan en la domo. Survoje la lacerto, sentante sin malsata, diris al sia amiko, "Mia amiko, aŭskultu. Mi scias la lokon de verdaj formikoj. Hieraŭ mi vidis grandan neston. Mi forlasos vin, por mallonga tempo, por havigi ĝin al mi. Ne min atendu; baldaŭ mi vin ĝisatingos. Mi estas malsata, kaj sopiras formikojn kaj ankaŭ iliajn ovojn." "Certe," respondis la pigo, "iru kaj alportu la frandaĵon, por ke ni ĝin ĝuu post nia bano."

"Bone," respondis la lacerto kun ruza rideto. Li sin returnis kaj iris rapide tra la herbaĵo, sed anstataŭ serĉi

formikojn li faris ĉirkaŭiron al la loĝejoj, kie estas la manĝo, kaj tie avide manĝis la duonon. Poste li returne atingis sian amikon, kiu estis jam en la akvo. "Kie estas la formikoj, kiujn vi promesis alporti ĉi tien?" demandis la pigo. "La nesto ne estas havinda, kaj mi ĝin forlasis. Ne ĝenu vin pri ĝi. Ni naĝu."

Post la naĝo ili iris returne hejmen. Malferminte la pordon, ili vidis nur duonon de la nutraĵo. La surprizo de la lacerto, kaj la malbenoj, kiujn li eligis el sia buŝo, pli ol egaligis la eksciton kaj furiozon de la pigo.

De tempo al tempo la lacerto agis sammaniere, farante pretekstojn por lasi sian amikon, kaj revenante hejmen por ŝteli la ĉefmanĝon. Fine la pigo eksuspektis pri la tre oftaj pretekstoj de la lacerto; li ekkunigis la pretekstojn kun la malapero de la nutraĵo. Sed li tenis sekrete sian opinion kaj decidis starigi ruzon, por eltrovi la kulpulon. Poste, kiam ili eliris laŭ sia ordinara kutimo, la pigo decidis fari pretekston por lasi la lacerton kaj reveni hejmen, por starigi bone elpensitan ruzaĵon. Li antaŭe kaŝis en la domo malgrandajn sed akrajn pecojn la obsidieno (F. obsidienne. Substanco, kiu devenas de vulkanoj, similanta botelvitron), kiujn li nun prenis kaj zorge metis en la plej bonan nutraĵon, kaj, farinte tion, li tuj reiris al sia kunulo. Tre baldaŭ poste la lacerto denove faris pretekston, laŭ sia kutimo, kaj, lasante la pigon, revenis al la loĝejo kaj manĝis avide la duonon de la preparita nutraĵo. Dum li manĝegis, la pecoj da obsidieno tranĉis al li la langon en la mezo laŭlonge. La tranĉo, kaj la gutetoj da sango sur la tablo, konsternis lin. Kion nun li devas fari, por kaŝi la makulojn, kiuj kondamnos lin. Lavu ĉion? Jes, sed la sango sur la buŝo! Kion diros la pigo pri lia disfendita lango? Longan tempon li atendis la ĉeson de la sangado, sed vane. Survoje returne al la pigo li iris malrapide, tre malrapide, sentante sin honta, ne pro tio, ke li estas ŝtelisto, sed ĉar lia malbona ago eltroviĝos. Fine li alvenis pigon, kiu tuj vidis la signojn de kulpeco sur lia buŝo. "Kion vi faras je via buŝo? Sango ĝin kovras." "Estas nenio," respondis lacerto. "Dum mi trapenetas la arbaron akra dorno trapikis kaj ŝiris al mi la langon." "Ho mia amiko! Mi bedaŭras, ke vi tion faris, sed ni tuj returnu hejmen,

por ke mi ĝin pansu (F. panser, prikuraci, bandaĝi vundon). Mi rigardu: Ho terura, terura, via lango estas disfendita. Ni iru rapide. Venu!"

Kiam ili alvenis hejmon la pigo vidis la kutiman vidon pri la ŝtelita nutraĵo. Ankoraŭ unu fojon iu ĝin manĝis dum ilia foresto. La pigo, rigardante la duonmalplenan poton, diris al la lacerto. "Kiu faris tion? Ĉu tiu ĉi sango estas la via aŭ ne?"

"Mi ne povas nei mian kulpon. Mi intencis forviŝi la sangmakulojn, sed mi tion forgesis."

"Jes, nun mi trovis pruvojn de via kulpo. Vi estas tiu, kiu ĉiutage sekrete kaj senhonte manĝegas nian manĝon. Mi nun rifuzas pansu por vi la vundon, kiun vi ricevis pere de la por vi preparita nutraĵo. Foriru kaj neniam plu proponu al mi amikecon. Tiel longe nia amikeco restos disrompita, kiel longe ankaŭ via lango restos disfendita."

De tiam ĉiuj lacertoj portas du pintojn al la lango, ĉar la lacerto kaj la pigo neniam amikiĝis plu.

[Ni plezure dankas al s-ro Lambton por lia supra verketo. Per ĝi li ebligas al la mondo iom rigardi en la naivan koron de la papuanoj, inter kiuj li laboras kiel anglikana misiisto ĉe Gederalara, voje al Samarai. Ankoraŭ unu traduko lia aperos. Tiuj, kiuj eventuale klopodos kompili antologion el kiel eble plej da lingvoj, tre povos profite konsideri ĉi tiujn literaturaĵojn el malmulte konata popolo. Red.]

### TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following. Accounted in the last issue:—Mr. Hayes-Williams, 10d. in stamps; Dunedinano, 1/-; Mr. G. Bird, 4/6, Aug., '32; Mr. C. Clarke, 4/6, May, '32; Miss P. Abbott, 4/6, July, '32; Miss J. Pollock, 5/-, July, '32; Mr. Bishop, 2/3, Feb., '32; Mr. F. Taylor, 5/-, Oct., '32; Mr. H. Franks, 4/6, Nov., '30; per Miss Carrick, sales 3/4.

Mr. C. Smith, 9/-, Dec., '31; Anon., 5/-; Mrs. Tondut, 4/6, June, '32; Mr. A. Roberts, 4/6, Oct., '32; Miss E. Griffin, 4/6, Oct., '32; W.E.S. (advert.), 5/6, July, '32; per Miss Griffin, sales, 2/-; Mr. Pudney, 2/3, Feb., '32; Mr. H. Walker, 7/-, Mar., '33; Mr. K. Simons, 10/-, June, '35; Mrs. Dunne, 4/6,

May, '32; Sydney E. Soc., adv., 5/6, Aug., '32; Dr. Williams, adv., 2/-; Exchange on N.Z. notes, 7/5; Mr. Byatt, 10/-, July, '33; Mr. A. Towsey, 4/6, Oct., '32; Mr. T. Enderby, 8/-; Mr. D. Haccou, 5/-, Oct., '32.—Total £5/1/2.

### 3rd N.Z. CONGRESS.

Arrangements are now in train to hold the Third New Zealand Congress at Christchurch. At time of writing the N.Z.E.A. Executive had not authorised one of the two congress programmes proposed by the Christchurch Esperanto Society, but it is certain the congress will take place during the days immediately following Christmas. As in the past, the N.Z.E.A. will issue separately invitations to all known New Zealand Esperantists and sympathisers.

### ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—

That (Nov., 1930) the membership of the Soviet Esperanto Union is 5116 in 687 places. The union has opened a recruiting offensive to gain 10,000 active members by the end of 1931.

That Japan has four Esperanto magazines. "Esperanto Kiboŝa" is the largest, with a monthly edition of 14,000 copies. Who said Orientals would never learn Esperanto?

That Berlin has made Esperanto an optional subject in 25 public schools, and there have been so many enrolments that a marked shortage of teachers is felt. If these can be found to meet the demand Berlin will have thousands of young Esperantists within three years.

That a generation ago books and pamphlets in Esperanto were published at the rate of one a month. To-day there is a production of one a day!

That Esperanto textbooks are now available in 55 languages, of which five were added last year. Manuscripts for five more are ready to be published.

That yet another street has been honored with the name of the inventor of Esperanto. The Kracow (Poland) thoroughfare hitherto bearing the name Niecala-street is now adorned: Ulica Dra Ludwika Zamenhofa."

### "JARMILOJ PASAS"

(Volumo Dua)  
de Hermann Haefker.

Eldonita de "Heroldo de Esperanto"  
Koln, Germanl.

Prezo: 8 ŝil. por aparta vol., 13 ŝil. por kune bindita. 500 paĝoj entute, kun artaj reproduktaĵoj kaj geografiaj skizoj. Leda dorsbindo.

La kompletiga volumo de rimarkinda entrepreno, mondhistorio originale verkita en Esperanto. Ĝi estas farita de homo, kiu, pro sia forte esprimita personeco kaj provokanta opiniaro, tre povos trafi en maron da disputoj rilate al ĝia pensenhavo. Ambaŭ ortodoksaj kristano kaj marksano, legante la verkon, sentos en si ofendon al siaj kredoj, kaj ektenos al dialekta glavo, por defendi ilin.

Sed malsame ol Carlyle, Marks kaj Buckle, kiuj prezentis al la mondo ĉiu sian apartan interpreton de la homa historio, Haefker ne donas sub formo de nete ĉizita teorio ian novan kontribuadon al la scienco soci-evoluata. Piprante la tekston per siaj konstatoj, li estas kontenta nur pentri la miljarlongan dramon de l'rasoj kaj popoloj; li ne forĝas por si propran kadron el fera teorio, en kiun li povu enpreme aranĝi la ŝajne haosan mason da eventoj. Almenaŭ li ne igas ion tian substreke rimarkebla. Kion do li pove instruas? Funde li estas kredanto je la fina venko de la Homo kontraŭ la materiaj kaj precipe spiritaj fi-fortoj, kiuj, jam de la hom-ekestigo, konstante minacas sub mil formoj la sanan evoluon de la kolektiva animo. Li vidas fariĝanta mondon porĉiame pacan; laŭ li, la popola volo al la granda milito estis "nursole la profunde homeca indignego pri tio, ke la **paco estis rompita**, ke bruta perforto kuraĝis perturbi la pacan konkuradon de la popoloj." Lia optimismo sin streĉas eviti konfesi probablecon de ĉieprofetata klasmilito. El tio venas la frapa aserto, ke "la estonta pacigita mondo estos sintezo de la kontraŭeco Ruslando-Ameriko, bolŝevismo-kapitalismo....Socialismo nenie estas kontraŭ de kapitalismo, sed ĉie nur la kontraŭo de troigita, degenerinta sed evolukapabla privatkapitalismo." Per tio li malamikigas al si ĉiun marksanon.

Sed al la "forsonanta kristanismo" li asignas nenian rolon en la nova epoko. Tio estas forte diskutbla. Ĉi tiu religio, kiu malgraŭ ĝia disa organiziteco kaj multsekta apartiĝemo, estas mistere vivipova, kaj regas per certaj fundamentaj kredbazoj la korojn de milionoj ĉe la plej kulturaj popoloj, ne povas ne efiki iagrade sur la antaŭen-marŝon de la homa raso. En nenombreblaj kazoj la kristana kredo pli-malpli influos sur la manojn de unuopaj homoj, kiuj trovos sin gvidantaj ĉe gravegaj historiaj decidoj.

La dua volumo malfermas je la hufatoj de kavileroj forrajdantaj al krucmilito; ĝi fermas je la martelado de proletoj konstruantaj tutnovan socion. Brile la aŭtoro priskribas la malkovradon de ankoraŭ pli vastaj mondoj. La spirita gajno el la cetero kruelaj militeroj al Sankta Lando, la trovo al Ameriko, kaj ties grandega efiko sur la sorton de Eŭropo, la vica kaj foje kolizia ekspansio de la ĉefpotencoj al Azio-Afriko, ĉio-ĉi tenas varme la imagon de leganto.

La Reformacio estis "multe pli grava ol la Renasenco";...dum ĉi lasta "revivigis forgesitajn trezorojn kaj pensformojn" la verko de Lutero "alportis novan pensmanieron."

La sanga furiozo de la franca revolucio "ekmartelis en la cerboj por ĉiuj teniĝoj, ke ne ekzistas sociala beno, dum iu resto da homoj estas eligita el la vere egale libera kaj frata partopreno en la bonoj de la kulturo."

Sur la paĝoj pri la milito (1914-18) kaj posta tempo, la aŭtoro lasis al sia spirito esprimon en plej arda lingvo. Lertplume li donas birdokulan perspektivon de la buĉado; denuncas la perfidan neplenumon de la Wilson'aj Dek kvar Punktoj; forte rebatas la maljuston fiksi militkulpon sur unuopan nacion; montras absurdon de la "reparacia" plano kaj ties nepran haosefikon forme de mondovasta senlaboreco.

La libro bezonas streĉan atenton ĉe la legado, ĉar plejparte kaj stilo kaj pensmaterialo pezas. La recenzanto ne volas diskuti apartajn lingvaĵojn sed volas nur demandi, kial s-ro Haefker ne sekvis Zamenhofan konsilon (Originala Verkaro p. 92) ĉe transliterigo de "Commonwealth" kaj "Smith," nome "Ko'menŭelt(h)," "Smit(h)." Fine, kio signifas "interboigon" (p.140, lasta linio)?—Robo.

## "PRINTEMPO EN LA AŬTUNO"

Originalo de Julio Baghy.

114 paĝoj, prezo 2ŝ. 3p.

Eldonita de Heroldo de Esperanto, Koln.

—o—

Estas ne necese, ke Baghy metu la nomon ĉe siaj verkoj; lia frapa personeco riĉe eksudas el ĉio de li skribita. Jen tipa cerbfrukto de la genia hungaro; naĝas en la teksto "taŭzitaĵoj kaj mienoj," "sortmuelo," "vivŝajno," "zorgpelo" kaj multo cetera el liaj jam konataj stileroj.

La rakonto estas mallonga, dolĉa. Ĝi atestas la fakton, ke en la koro de la junaj ĉeffiguroj la spirito de Adam-Eva, kun Edena freŝeco, senmakule transvivas ĝis la nuna tempo. Ni legas simpatie la profetan vorton de Baltazar al la gimnaziano en la foirbudo, kiam ĉi tiu por la unua fojo ekvidas Suneton, la molokulan vagknabinon; la disvolvigon de l'Amo, tiel neoponeblan, tiel rememorigan pri Paŭlo kaj Virginio; la klopodojn de la Lerneja Instruo kateni la junviran spiriton per banala konakiri; la rifuĝon de la turmentata animo sub arbora ŝirmo, por ensorbi ties Diecan silenton; lian tiean verkon de poemo, kies forblovitaj paperoj kaptas el la vento la objektino de lia sopiro; la sekan sed sinceran komprenon de liaj profesoroj, ke la knabo efektive envivas printempon de l'amo malgraŭ aŭtuna jartempo.

Estas multe da kortuŝaj epizodoj, kiuj ankoraŭ pli kroĉigos la koron de legantoj al tiu de la aŭtoro—ni aludas ekzemple la angoron de la pajaco Fridolin, kiam li ekkonscias, ke aliulo ame forprenis la koron de Suneto for de lia patreca; la plenan sindonon de ŝiaj du maljunaj protektantoj. Tio kaj cetero emigas nin danki al Baghy pro tio, ke li almenaŭ iommezure helpas konservi ĉiamverda en la homa koro la "plej grandan el ili" (1 Kor. 13/13).

La fina necerteco pri la sorto de la amanta, adiaŭanta duoj; la alporto piedon al apudvoja Kruco de la blankaj floroj, destinitaj, timinde, por garni la tombon de l'Espero, tio ĉio estas vea bildo el multpersona vivo.

La verko estas tamen esence inspira; ŝajnas, ke la internaj okuloj de la verkinto trapenetas optimisme le murojn de ĉi-tera vivo, kaj legas racion en la homa sortkirlo. Li ne povas reteni

sian fundan emon elpentri la propran filozofion, eĉ en kelkpaĝa libreto. Tio rezultigos ĝenan haltigon al multaj legantoj, ĝis kiam tiuj povos travadi longan spacon de por ili iom tre nebula vortmaro.

19. "Respektive," kiel iuj aŭtoroj ĝin uzas, estas nekomprenebla por anglo-lingvano, ĉar la angla signifo de la vorto estas tute alia; 5, 49, "ŝtelis sin" estas stranga; 51/2-3, legu: "la lipoj de la knabino senvolan ĝemon lasis for"; 67, "kiu mensogis sin mia vivo-celo" estas nekomprenebla (komparu 68/6); 100/14-15, donita(j) kaj akceptita(j); nana (F. nain, A. dwarfish); darfi (G. durfen, esti ricevinta permeson. La aŭtoro montras kiel kutime sian lingvan lertecon, sed ankoraŭ ni atendas de lia plumo la libron, kiu, ni kredas, superos lian "Viktimoj."

—Robo.

### COMPETITIONS.

The Redakcio will forward one bound volume of

En Okcidento Nenio Nova (Re-marque), or

Tridek Jarojn en la Ora Nordo (Welzl)

to the person who forwards the subscription money for four new members before the end of January.

To the person who forwards the subscriptions of three new readers by that date will be offered the choice of

Du Majstraj Noveloj (Storm)

Baha'u'llah kaj la Nova epoko (Esslemont), or

Aelita (A. Tolstoj).

**Now then, Course-leaders!**

The winner of the competition announced in the August number was Miss B. Blyth, Victoria-av., Surrey Hills, Vic., who correctly indicated the identity of "La Granda Poeto" and the source of the translation. (1) Shakespear; (2) Sonnets cliii, cliv.

### PRI REPRESOJ el "Heroldo de Esperanto."

Antaŭ iuj monatoj amiko skribis al ni, plendante, ke ni represas en La S.K. paragrafojn, informojn el "H. de E." Li opiniis tion nesaga refaro de sama laboro, ĉar li kaj verŝajne konsiderinda parto el la S.K. abonantaro ankaŭ ricevas la eŭropan gazeton.

Ni nun povas informi legantojn, ke el la 3100 abonantoj al "H. de E." nur naŭ sin trovas en Aŭstralio! Sekve, represo el tiu organo estas tute ne laboro neutila en ĉi tiu lando; ni, la administracio, firme kredas, ke almenaŭ okdek p.c. de la Sudkruccano neniam legas alian gazeton ol la aŭstralia.

Espereble estas, ke kiam fine jam forpasos la nuna ekonomia plago, legantoj de La S.K. povos pli ĝenerale aboni la entrepreneman eŭropan ĵurnalon kaj ties belajn eldonaĵojn pli rekompence subteni.

### "Tutmonda Kolektanto"

La sola gazeto por kolektantoj. Redaktas **D-ro Jozefo Takacs**. Administracio en **Jablone n. Orł.**, Ĉ.S.R.—Aperas dumonate. Abono 0.40 dolaro aŭ egalvaloro. Specimennombro kontraŭ respond-kupono.

"La Suda Kruco" rekomendas.

### NEW PRESIDENT OF LANGUAGE ACADEMY.

With pleasure we announce that Mr. J. M. Warden has been elected president of the Esperanto Lingva Akademio in the stead of the late Professor T. Cart.

### CORRESPONDENCE.

T. in H.—"Unu grandan ronkon familian." Press error for "rondon."

Al ĉiuj, kiuj sendas jarabonon, mi kalkulas sendi po dekdu numeroj de La S.K. (red.).

## KVAKERISMO KAJ PACO

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

Bonvole petu per ilustrita poŝtkar to aŭ letero. Ankaŭ mi sentus plaĉon ricevi nomojn-adresojn de eventualaj korespondantoj el plej malproksimaj mondpartoj.

DR. FRED. J. WILLIAMS,

Samarai, PAPUA.

(fratorganoj afable represu)

"PRI LA PRONONCADO EN  
ESPERANTO."

(Krysta Ludw.)

Mondlingvo-Eldonejo, Katowice, ulica  
Plebiscytowa 25, Ĉeĥoslovakio.

Nepre atentinda libreto 30-paĝa, verkita de homo, kiu akrasente plendas pri "fakte ekzistanta sed ne necesa malagrablo," nome ĝenerale neĝusta, nacieca prononcado de Esp-o de ĝiaj diverslandaj parolantoj. Preninta kiel bazon de sia traktateto la naŭan regulon de la Fundamento, s-ro Krysta avertas pri gravdanĝero, en tio, ke povos veni dialektiĝo de nia lingvo, ĝuste pro la nomita fuŝo. Li montras ateste al la jida, ĉina kaj germana lingvoj, kiuj, kvankam skribataj same tra la koncernaj landoj, estas vastdiference prononcataj. Li kritikis bedaŭrante la "ne atenditan malsamecon" de la naciaj Esp. gramatikoj, kaj voke petas, ke oni substituu tiun malĝustan instruon per vere internacia normo.

La konsilo al angloj: ne parolu do, "Li estas bedisto de kotbidoj" (li estas bredisto de kotbirdoj) ŝajnas netrafa. La angla E-tisto sonigas la "r" sed ordinare ne trilas ĝin. Li prononcas karto, parko kaj similajn, samkiel kato, pako. La aŭtoro avertas al legantoj ne "gluti" la finsilabojn ŝajnas precipe aplikinda al rusoj, kiuj ne nur parole sed ankaŭ skribe (ekz. en "La Vojo al Klerigo") ellasas la "aŭ"-finiĝon, uzante "ante, balde, anstat, kontr" kaj cetera.

La afero meritas esploron de lingvaj gvidantoj; d-ro Privat tre supozeble respondos, ĉar la diroj de s-ro Krysta rekte kontraŭas liniojn en ties "Historio de Esp."

Ni iom kritiku la kritikanton. Ŝajne nacieca influo kuŝas en la formoj, "Ĝis la nacioj ekkonos, kio estas nacieca en ilia esperanta prononcado...ili certe penados forigi ĉi tiun maloportunaĵon" (Legu: **Kiam** la nacioj...); "Ĝis vi estos vizitinta kelkajn kongresojn, vi komprenos ĉiujn paroladojn" (Legu: **Kiam** vi...); "kun la deziro, ĝi donu utilon" (...deziro, ke ĝi...); "tio ne tiel gravas, ol paroli" (...gravas, kiel...). Krome, uzante "empire" (empirie) kaj "birokratismo" (burokratismo), li lasas la pordon al ankoraŭa danĝero. Sendu 2 respondkuponojn al la supra adreso.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere. Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A. Skribu al Sekretariino.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro Jas. P. Lauder. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Holmes; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots Church Hall, 97 Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbane Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance" Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A. Del. U.E.A. Write for book list.



# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 137 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. DECEMBRO, 1931

## ALL THE WORLD SPEAKS ENGLISH??

Here is yet another example, if such were needed, of with what little wisdom the world is governed. It is from the "Age" of 20th November.

"The meetings of the League Council are being further complicated by the insistence of Dr. Sze and Mr. Yoshizawa on speaking in their own languages, necessitating lengthy interpretations in English and French."

These two gentlemen, highly educated representatives of their countries, men who, doubtless, have spent years in language study, prefer to conduct their case in their respective tongues. Yet we are asked by some to believe that English is destined to become the universal tongue of common men.

While events of the utmost gravity move in Manchuria with lightning rapidity, and humanity is by them exposed to the danger of another world cataclysm, senility, enthroned at Geneva, dodders along with its antiquated and unsatisfactory system of translating ad infinitum. Not only is there the shocking waste of time in actual translation but there is also the certainty of ceaseless bickering over the doubtful renderings in the translated texts.

Esperanto should be the language of introduction to the national tongues. As it is, by far the greater part of those who study foreign languages in school learn just enough to launch themselves on to a sea of unending embarrassments.

The above delegates, by their rejection of English and French, give no encouragement to those who think that the problem of language diversity will solve itself and that the curse of Babel will be lifted from a passive, do-nothing humanity.

## PRI LA DEVENO DE LA KOKOSO.

El la papua lingvo  
tradukita de Pastro A. H. Lambton.

En la antikvaj tempoj la kokoso ne ekzistis en Papuo. En tiuj maldolĉaj tagoj akvo sola estis trinkata de la homoj por sensoifigi, kaj "taro," t.e., botanike "Colocasia Antiquorum" (eble "kolokasio" esperante) ne estis mikсата kun kokosa oleo; tial la korpoj de papuanoj ne estis ŝmirataj per oleo kiel hodiaŭ.

La antikvuloj, ne sciante la bonaĵon en la kokoso, estis kontentaj sen ĝi. En tiuj tagoj estis unu vilaĝo, kies loĝantoj fiŝkaptis senĉese. Ili iris por fiŝkapti matene, kaj revenis vespere kun la kaptitaj fiŝoj, vicigitaj sur branĉetoj. Unu el la loĝantoj, nomata Matamelo, ĉiufoje iris sola por fiŝkapti, kaj vespere li revenis kun korbo plena de fiŝoj, ĉar lia kaptajo estis tro multa por vicigi sur branĉeto. La loĝantoj de la vilaĝo miregis pri la grandaj kaptoj de Matamelo. Li ankaŭ ĉiufoje malpermesis ĉiun sekvi lin, kiam li iris fiŝkapti. De tempo al tempo la vilaĝanoj diskutadis inter si la kutimojn de Matamelo, kaj konsiliĝis amase, por eltrovi, kion li faras, sukcesante havigi al si kaptajn pli grandajn ol tiuj de aliuloj. Okazis, ke unu knabo aŭdis ilian diskutadon kaj elmontris projekton:

"Morgaŭ, kiam li eliros," diris la knabo, "mi observos sekrete, el la longa herbaĵo, kion li faros."

"Vere, vi diris bone," respondis la viroj, kaj ĉiuj estis kontentaj, ke li faru tion, kion li diris. En la morgaŭa tago la knabo faris tiel, kiel li aranĝis. Frumatene en la sama tago Matamelo leviĝis kaj eliris vojeton, laŭkutime, kaj la knabo sekvis lin aliflanke tra la



longa herbaĵo. Iafoje en lia deziro por vidi tion, kio okazis, la knabo rampis tre proksime, kaj la folibruadon Matamelo aŭdis, kaj kaŝrigardis herbajon, pensante, ke la bruadon kaŭzis porko aŭ alio, kiun li mortpikos per ĵetponardo. Sed la knabo kaŝis sin ruzege kaj sekvis Matamelon tre silente, ĝis ili alvenis marbordon. Tiam la knabo sin kaŝis post korka arbo kaj de tie vidis tre kuriozan sed teruran aferon. Matamelo demetis sian korbon kaj poste ambaŭmane detiris for de si mem la propran kapon! Li ĝin demetis sur sablon flanke de la korbo. Poste li piediris en maron al la nivelo de sia talio. Tie li staris, dum la knabo ek-tremis pro timo antaŭ la terura vidaĵo. Longan tempon li staris; tiam subite sin klinis en la akvon, kaj multaj fiŝoj malsupren-ĵetis sin en lian gorgon. Post mallonga tempo la senkapa viro leviĝis kaj vadis al la marbordo. Tie li deskuis la fiŝojn kaj poste palpe serĉadis sian kapon. Trovinte ĝin, li ĝin metis sur sian kolon. Tiam li sidigis kaj klasigis la fiŝojn, kiujn li estis kaptinta, plenigante sian korbon per la plej grandaj kaj forĵetante la malgrandajn. Cion ĉi la knabo vidis de kie li kuŝis kaŝe, kaj poste li forkuris hejmen.

Denove vespere ĉiuj krom la knabo manĝis la fiŝojn, kiujn Matamelo kaptis. Multaj demandis lin, kial li ne manĝas. "Ĉu vi fastas?" "Ne, ne," li respondis, "mi tute rifuzas eĉ tuŝi per la mano la fiŝon, kiun Matamelo kaptis." Matamelo, aŭdinte liajn vortojn, ekkoleris kaj malbenis la knabon, dirante, "Iru kaj formanĝu la hepaton de via patro kaj mortu." Tiu malbeno estas la plej malbona, kiun la papuanoj povas eldiri. Poste vidiĝos, ke la malbeno resaltis sur la kapon de la malbeninto. Post la manĝo la ceteraj viroj iris kun la knabo aparte kaj demandis lin, "Pro kio vi ne manĝis fiŝon?" Tiam la knabo rakontis al ili la veron pri la aferoj, kiujn li vidis en la hodiaŭa tago. Nu, la viroj, aŭdinte la rakonton, siavice naŭzon sentis. Ili tiam diris:—

"Do, morgaŭ ni iru kaj punu Matamelon, kiu faris ĉi tiun malbonagon, nutrante nin per ensorĉitaj fiŝoj." Kompreneble, ĉiuj konsentis. Morgaŭan tagon ili faris tion, kion aranĝis ili. Baldaŭ veninte al la kaŝejo, la observantoj vidis Matamelon forpreni de si la kapon kaj demeti ĝin sur la sablon. Tiam, laŭ sia antaŭa kutimo, li sin klinis en maron, por ke la fiŝoj malsupren-ĵetu sin en lian gorgon. Tuj

unu el la observantoj sin levis, elkuris, kaj ekkaptis la kapon kaj forĵetis ĝin de si malproksimen en arbetojn. Nature, ĉiuj atendis, por vidi tion, kio okazos. Post ne longe Matamelo turniĝis kaj rapide revenis marborden. Tie deskuante la fiŝojn, li palpe serĉadis la kapon ambaŭmane. Sed, ho ve, li ne povis ĝin trovi. La observantoj lin vidis rampanta sur ŝtonetojn, kun ambaŭ manoj etenditaj palpe serĉadante, sed senrezulte. Subite la senkapulo leviĝis kaj kuregis denove en la maron. Jen! antaŭ iliaj okuloj li fariĝis granda fiŝo kaj subakviĝis for de ilia vido. Tiam ili reiris hejmen. Post kelka tempo la knabo, kiu unue kaŝrigardis Matamelon, rememoris la kapon, kiu estis forĵetita en la arbetojn. Li iris, por serĉi ĝin, por ke li sciu tion, kio okazis pri ĝi. Sed kiam li alvenis al la loko, kien ĝi estis forĵetita, li ne povis ĝin trovi, sed anstataŭe li vidis maldikan palmon kun etenditaj folioj. Neniu sciis de kia speco ĝi estas. Sed poste, kiam ĝi fruktis, la vilaĝanoj ne manĝis ĝin pro timo. Fine unu el la virinoj manĝis kaj trinkis la sukcon, kaj ankaŭ ŝmiris sin per la oleo. Ĉiuj observadis ŝin, ĉu si malsaniĝis aŭ ne; sed kontraŭe ŝi plisaniĝis. Tiel ĉiu homo ekkonis pri la kokoso, ke ĝi estas bona. De tiam, eĉ ĝis nun, ĝi estas manĝaĵo kaj trinkaĵo. Sciu, ĉi tiu rakonto estas vera. Vidu nun sur la kokosan kernon, kiam ĝi estas ankoraŭ en la ŝelo, kaj vi vidos la vizaĝon de la viro Matamelo, kies kapo fariĝis la unua kokoso.

#### FRENCH ESPERANTIST IN MELBOURNE.

In October Mr. Rawson received a visit from s-ro Daniels, a French Esperantist on his way to France after a holiday in New Caledonia. Owing to the shortness of his stay here he was unable to visit the club, but Mr. Drummond showed him the sights of our city. He spent a month in Sydney, being a frequent attender at the society there.

This is but another proof of the international worth of Esperanto, for, although Messrs. Rawson and Drummond speak no French, and M. Daniels is mute in the English language, they experienced no difficulty whatever in their conversation.

## FOR BEGINNERS

### HONESTA BUTERVENDISTO.

En iu franca vilaĝo panvendisto aĉetadis la buteron, kiun li bezonis, ĉe terkulturisto de la ĉirkaŭaĵo. Iutage, ŝajnis al li, ke la buterbuloj ne havas la pezon kontraktitan. Li do pesis ilin kaj konstatis, ĉiukilogramo, pli aŭ malpli grandan mankon.

Pro tio li indigniĝis kaj denunciis la terkulturiston, kiu estis venigita antaŭ la juĝiston.

"Ĉu vi havas pe silon?" demandis la juĝisto al la akuzito.

"Jes, sinjoro juĝisto."

"Kaj peziloj?"

"Ne."

"Kiamaniere do vi povas pesi vian buteron?"

"Estas tre simple. De kiam la panvendisto aĉetas ĉe mi la buteron mi aĉetas la panon ĉe li, kaj mi uzas liajn panbulojn de unu kilogramo por pesi mian buteron. Se la pezo estas ne ĝusta, la kulpo ne estas mia, sed lia.

### AN HONEST BUTTER-VENDOR.

In a certain French village a baker used to buy his butter from a peasant of the neighborhood. One day it seemed to him that the blocks of butter were not of the right weight. So he weighed them and found that in every kilogram (2.2 lb.) there was, more or less, a shortage.

At this he was indignant, and denounced the peasant, who was summoned before the judge.

"Have you any scales?" the judge asked accused.

"Yes, your worship."

"And weights?"

"No."

"Then how do you weigh your butter?"

"That's easy. Since the baker buys my butter I buy his bread, and I use his one-kilogram loaves with which to weigh my butter. If the weight is short, the fault is not mine but his."

### TO OUR SUPPORTERS

We give thanks for the following:—

Mr. F. McLeod, 4/6, Apr., '33; Mrs. Bigelow, 5/-, Oct., '32; Melb. E. Soc. (adv.), 5/6, Sept., '32; Mr. L. Wirth, 4/6, Nov., '32; Mr. A. Greiser, 10/-, Sept., '33; Mr. T. Enderby (sales), 6/-; Mr. Franks, 6d.; Mr. Alexander, 1/-; Sales, Club, 2/4; Mr. D. Munro, 7/6 (abono k donaco), Sept., '32; Advert., 2/-; Mr. R. Fitzgerald, 4/6, Sept., '32; Mr. A. Kelley, 10/-, Oct., '33; Miss Carrick (sales), 2/-; Miss Cox (adv. and sale), 2/4; Mr. F. Bury, 5/-, Jan., '33.—Total, £3/12/8.

### KRONIKO.

**Perth, W.A.**—Estimata samideanino nia antaŭ ne longe forlasis Perth-on kaj migris al Harvey, en la sudokcidenta regiono de tiuĉi ŝtato. Jam f-ino M. Miller klopodas disvastigi konon de Esperanto inter homoj en tiu ŝtatparto. Ŝi starigis grupon, kaj nuntempe ok anoj partoprenas lernadon de nia lingvo. Ĉiu el ni deziras al la instruistino kaj lernantoj sukcesplenan kurson. En Perth-o ni tre sentas la foreston de kelkaj anoj, kiuj devis forlasi nian societon pro diversaj kialoj; espereble, post iom da tempo tiuj re-aligis.

**Melburno, Vic.**—Sub la titolo "Memoraĵoj de Vojaĝisto" s-ro P. Hudson, ĉe la Melburna Societo, donis interesan paroladon pri la bestaro de Hindujo. Krom la rakontado de propraj spertoj, li parolis pri la loko, kiun la bestoj okupas rilate al la religioj de la lando. Iuj bestoj estas sanktaj, kaj estas krimo mortigi ilin, kaj oni ankaŭ kredas, ke la animoj de homoj iras post la morto en la korpojn de bestoj.

La Societo plezure anoncas, ke s-ino M. Dunne kaj s-ro P. Holmes gajnis la Diplomon de B.E.A. S-ro Holmes gajnis kun distingo.

Gesinjoroj Beswick, el Perth, ferias en Melburno, kaj vizitis la Societon.

### ORIENTA GAZET-SERVO.

We have received from the "Komitato por Internaciaj Rilatoj," 5 Mao-tan Street, Nanking, China, a statement in Esperanto setting forth China's case against Japan. The above Service, by issuing regular bulletins, aims at securing world-wide publicity by translated reproductions in the different countries' press. The indictment is restrained in tone, and closes with a call to the world to witness China's patience. Copies will be sent free on request.

## TO ALL CONCERNED.

The administration would be greatly encouraged were it to receive some notification from the many lapsed subscribers who, for a long time now, have been the recipients of La Suda Krucio. The sending out of notice after notice informing such of their indebtedness to the paper represents no small charge on our resources. It is with the greatest reluctance that we cease despatch of the gazette to readers, as we desire above all that it have the widest possible circulation among those whose interests it is pledged to serve. We do, however, want to know if it is being appreciated. The most eloquent affirmative would be provided by wiping off some, if not all, of the debt owing it.

Will such readers as have, for this reason or that, suffered their subscriptions to fall into arrears, do their level best to provide at once salve to their conscience and life blood to our organ, which, despite a hurricane of adverse circumstances, is still voicing to the world that Australasia counts as a factor in the acceleration of the Esperanto movement.

Every Esperantist worth his salt will strain every nerve with us to make 1932, year of golden opportunity, the year of salvation for S.K. This, the last issue for 1931, goes to press under a small deficit. This must be met and a January number assured, for conditional on regular appearance during 1932, auxiliary revenue has been promised from an advertisement which, together with an awakened response from certain readers, would lift the paper into safety.

Into the rampart we are rearing build your brick NOW, mortared if necessary with the cement of sacrifice. So you shall share in the pride of participation in that victory whose coming is as sure as the sun.

## —TO LET—

In the popular mountain resort, Belgrave, Vic., comfortably furnished 4-r. cottage, with bathroom, E.L., 2 verandahs, accom. six., close tennis courts, shops, rail, station. Moderate rental. Apply Miss V. Cox, 31 Albany Cres., Surrey Hills, Melb.

## KOMPATINDA KLEM.

Originalo de John Merchant.

Havebla ĉe B.E.A. Prezo 1/6, 2/6 bindita.

Rakonto 90-paĝa pri nedezirita flin-fano, kiu, fariĝinte riĉa E-tisto, vizitas la Kongreson ĉe Helsingforso. La tieaj travivoj estas supozinde tiritaj el la taglibro de la aŭtoro, prezidanto de I.C.K. La verketo, malgraŭ ĝia nemulta literatura valoro, taŭgas por neanglalingvanaj E. rondoj, se la paĝoj pri negoc-aferado ne ilin tro ĝenos.

Lingvaĵo tre korekta, flustila. 13, volvigataj (volvitaj); Ĉu komprenebla estas, "Tiri haringon trans la vojeton"? 32, "Finlande" (finlingve); metu "miro pri" antaŭ "malŝpareco" sur p. 58/4. "Snob'" mankas al multaj vortaroj. "Havigi" postulas nerektan komplementon.—Robo.

Pri la prepozicioj DE, PER, kaj JE post pasiva participo.

Post pasiva participo:

(a) Ĉiam uzu "de" (by) por montri la aganton. Laŭ la konsilo de doktoro Zamenhof (Lingvaj Respondoj, Plena Kolekto pĝ 73) neniam uzu ĝin alisignife. Kvankam kelkfoje en sia verkaro Zamenhof uzis ĝin en la senco de "from" por montri devenon aŭ komencon punkton, li evidente tion faris ne konscie (Fundamento de Esp. pĝ vi). Oni tial evitu eraran uzon de "de," uzante alian prepozicion aŭ lerte ŝanĝante la konstruon de la frazo.

Ekzemploj: La libro estas legata de (by) Adolfo. (L.R. pĝ. 73). Lia palto estis ŝtelita for de (from) la hoko, sur kiu li pendigis ĝin. (L.R. pĝ 73). Ŝi troviĝis ŝirmata kontraŭ (from) liaj entreprenoj. (L.R. pĝ 73). Jen estas la letero ricevita el (from) Londono. La tero estas kovrita de (by) neĝo. (Rimarko: Ĉar la neĝo mem kovris la teron, ĝi estas la aginto. (L.R. pĝ 73).

(b) Por montri la ilon aŭ rimedon ĉiam uzu "per" (by aŭ with).

Ekzemploj: Li estis mortigita per sago. La letero estas skribita per blua inko. (L.R. pĝ 73).

(c) Por montri la uzatan materion uzu "je" (with), aŭ oni povas uzi "per," se "per" montranta ilon ne okazas en la frazo.

Ekzemploj: La kavo estis plenigita

je sablo de Johano per ŝovelilo. La kavo estis plenigita per (aŭ je) sablo de Johano. (Gego)

**Domo de Homamo.** — Projekto kaj Opinioj pri grandioza entrepreno. 14p., unu respondkuponon. "Oomoto," 1 rue Felix-Faure, Paris 15.

**Fundamento de Animo.** — "Klarigo pri la spirita mondo kaj la postmorta vivo," de Onisabro Deguĉi. Pensigas okcidentanojn pri simila instruo de Emanuel Swedenborg. 2 respondkuponoj ĉe Oomoto-Propaganda Oficejo, Kameoka Kioto-Hu, Japanujo.

**Aliĝu senprokraste al la 10a jubilea eldono de**  
**BES-ADRESARO**

**de Esperantistoj de ĉiuj landoj!**

Tiu ĉi jarlibro celas kolekti adresojn de ĉiuj E-istoj, de ĉiuj E-entreprenoj kaj de ĉiuj firmoj uzantaj Esperanton, ebligante al ĉiu helpe de praktike aranĝita registro trovi la deziratan adreson. Simpla aliĝo 0.50 svisa franko (aŭ 2 respondkuponoj); aliĝo kun adresaro 1 sv. f.; anonca paĝo 25 sv. f. Postulu tuj senpagan detalan interesan prospekton kun aliĝilo ĉe la eldonanto: BES (Bohemă Esperanto-Servo) Potštejn, Ĉeĥoslovakio, Europo.

### GRATULON

al s-ro P. F. Mulrennan, de Hokitika, Nov-Zelando, kiu honore eltenis la Superan Ekzamenon de la B.E.A.

### PARDONON!

Unu el la plej bonaj anekdotoj pri profesora distriteco estas jena:

Unu tagon profesoro eniris kafejon por refreŝigilo. Li donis al la kelnerino dumarkan bileton kontraŭ taso da kafo kun sukerpecoj. Post iom da tempo li petis de ŝi la sangmonon. "Mi ĝin jam donis al vi," respondis la servknabino. "Sed ne!" rebatis koleriĝe la profesoro. La disputo finiĝis sen kontentigo, kaj la erudiciulo foriris en ĉagreno. Post tri tagoj li ankoraŭ fojon vizitis la ejon por sia kutima regalaĵo. "Jen via mono restinta el la bileto, kiun vi donis antaŭ tritago," diris la veninta kelnerino, etendante al li kelkajn moneretojn. "Ja bone, vi estas en tio kulpa, kaj ŝuldas al mi pardonpeton," ridetis facilokore la profesoro. "Tute ne," finbatis la ino malice, "palpu en la poŝo por trovi tie la sukerpecojn; la moneretojn mi eltiris el la tasfundo."

## "BUCH DER GUTEN WERKE."

### Vi sendu kontribuojn!

Iu germana eldonisto nun kolektas materialon por libro, kiu espereble estos tre multpaĝa.

La verko havos titolon "Buch der guten Werke" (libro de bonaj agoj). Invito kontribui estas proponata al ĉiu homo batalinta en la mondmilito. Taŭgaj por enmeto en la libron estas rakontoj pri iu ajn amikaĵo farita de kontraŭbatalantaj soldatoj al la kontribuanto mem, aŭ al homo, kiu ricevis la bonvolaĵon en la ĉesto de la kontribuanto. Kompreneble, ankaŭ la libro celas enteni rakontojn pri amikaĵoj faritaj de la kontribuanto aŭ ties kamaradoj al militistoj de la kontraŭa armeo.

Estas necese, ke ĉiun eblan detalon oni donu, precipe pri la loko, dato, nomo kaj rango de l'koncernataj soldatoj.

La celo de l'libro de bonagoj estas pruvi, ke la ennaska korboneco de l'homo ne estas komplete sufokita eĉ dum la bestaĉa frenezo de la militjaroj.

Kontribuadojn, kiuj ne ampleksu pli ol du nacilingve maŝinskribitaj kvartfolioj, oni sendu al Dr. Bernhardt Diebold, Berlin N. 65, Edinburger Strasse 19. ii. Germanlando.

(El "Foreign Languages," Londono.)

### CORRESPONDENCE.

B. en T. Ni opinias "tonelo" la plej bona vorto por "ton."

Teo. en N. "Tagulo" estas la plumnomo de Sir Henry Hyams, kiu ankoraŭ vivas, en Londono, sed ne multe viglas por E-to. Lia romano "Nova Sento" estas simpla, flulegebla, tre interesa.

### KION VI SCIAS?

1. Kiu estis la unua viro, kiu vizitis ambaŭ polusojn?

2. Kie estas la plej mallonga distanco inter Ameriko kaj Azio?

3. Kie estas la sola ĉirkaŭ-murigita urbo en Nord-Ameriko?

4. Kiu estas la plej granda statuo de la mondo?

5. Kie estas la plej granda profundo de la Atlantiko?

**Radio! 4QG, 8 p.m. Brisbane time, on 15th December.**

**"THE NORTH AMERICAN  
ESPERANTO ALMANAC."**

Edited by J. Sussmuth.

Although issued late in the year, this 1931 directory to Esperanto in the United States is bigger and better than that for 1930. Its 170 pages contain "The Birth of Esperanto" (Zamenhof), a pithy history of Esperanto's progress, by Armin Doneis, a list of members of the E.A.N.A. individual and corporate, the elements of Esperanto and vocabulary. 50 cents.

**"THE BIRTH OF ESPERANTO."**

An English translation by Mr. H. Hetzel of the "Extract from letter to N. Borovko," in which Zamenhof explains how the interlanguage took shape in his brain. Every Esperantist should be familiar with the lines of this famous epistle, written originally in Russian, and translated by V. Gernet, whose masterly rendering faces the English text. Price 5d. from the Esperanto Assoc. of N. Amerika, Fort Lee, New Jersey.

**"AMERICAN ESPERANTO KEY."  
J. Sussmuth.**

Ĉi tiu "ŝlosilo" ne estas supera al la angla "ĉefeĉ" dekgrama. La papero estu malpli dika, la formato estu pli malgranda, por faciligi enŝovon en leterkoverton. Nekonsentinde estas konsilo doni al "e" la sonvaloron de la angla "a" en "case"; "e" estas prefere duonsono inter la "a" en "dale" kaj la "e" en "dell." Ni ne allasu du signojn (e kaj ej) por marki unu sonon. Tial ne ĝusta estas "Tŭen" (Twain); devas esti "Tŭejn." Ne ĉiu "sendaĵo" estas "shipment." La frazo "meeting of the local Esperanto Chapter" hirtigus la harojn de neanglalingva Esp-ist. La vortaro estas troŝargita je botanikaj kaj bestaj nomoj, kelkaj el kiuj eĉ ne troviĝas en La Plena Vortaro. Cetere, ĉu ne malkunlaboreme nomi "chimpanzee" kaj "penguin" antropopiteko kaj aptenodito? La aŭtoro devas scii, ke en La Plena Vortaro kaj en Millidge sidas "ĉimpanzo" kaj "pingvino." Ĉe la verbradikoj bone estas uzi la anglan infinitivon: ekzemple, "atenti, to be attentive." Prezo 10 cendoj, ĉe Esperanto Assoc. of N. America, Fort Lee, New Jersey.

(Robo)

**"LANDO DE ARGENTA AKVO"**

de V. E. Roe

trad. E. Payson; eld. Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko.  
Prezo 1ŝ. Paĝoj 46.

Emocia epizodo el la vivo de usonano, kiu, vojaĝante en Arizono, enamiĝis kun edukita Navaja indiano. Sed io pli potenca ol amo gehoma nebligis kunfandon de l'koroj.

20, Pantro (pantero); 20, humaneco (en la koncerna linio pli ĝuste estus "homnatureco"); 31, Ultimata Perdo (la formo estas sensenca; supozinde, ke la tradukinto celas "Ultima Thule"); 36, dum preskaŭ tutan tagon. (...tuta tago); nebona uzo de -ad, 36, 41, formado, etendado (formacio, etendaĵo); 46, nenumerebla (nenombrebla); 16, pentrita (pentrinda) valetto; 46, koksofalita (koksofalinta), with dropped or relaxed hips.

(Robo)

**"HOMARISMA LABORO."  
Originalo de Kenelm Robinson.**

Kelkpaĝa teatropeco tuŝanta certan mentalecon, kies manifestaĵoj ne konvenas esti paradataj de la diletantismo. Prefere, ke la psikistoj, kun difinita faka celo, priverku tiun kampon.

Cetere, ĉu presindas tiu mizera rubaĵeto? Prezo ne indikita. Eld. de l'aŭtoro per "L. Mondo."

**"THIRTY YEARS IN THE  
GOLDEN NORTH."**

J. Welzl tell the world.

Esperanto literature can now boast its de Rougemont. He is one Jan Welzl, a Czech who, in 1893, roused by stories of wealth to be gained in the Arctic, left his bridge-building on the trans-Siberian line at Irkutsk to embark on a lone and awesome journey northwards that led to a vagrant sojourning of some 30 years among the strange people that inhabit the white wastes lying between Canada and Nova Zemlya.

He knows the Eskimos as very few men do. Their filth, their complete sex-amorality, their shortlivedness, their hut-to-hut diversity of dialect, their barbaric surgery, in which helpless infants are used, as it were, for patching up mutilated patients, all these and a

ĈU VI NOMAS VIN HONESTA HOMO? SE JEŜ, PAGU DO VIAN  
ABONON!

hundred other features of these folk are dilated on by the long-memoried wanderer.

He visited his home country in 1926, but again left for his loved North. Having no ability to set down his experiences, and fearing to die far from civilisation without giving some form of permanence to his strange memoirs, he arranged that certain Czech journalists should stenograph the account direct from his lips. This was done, not, however, without tactful interrogative guidance on the part of his literary executors, and the result was published in the form of a book in Czech. Its appearance in the inter-language Esperanto is symbolic of the man, for Welzl is indeed a type of the international man, citizen of the world, and in no point more than in that of language. He had by 1924 in great part forgotten his mother-tongue Czech; German, which he knew from his youth, had likewise almost evaporated; Russian and English he had used in simple chatter with those that spoke them; and some thirteen Mongol-Eskimo dialects jostled in his brain. President Masaryk, a polyglot, using all the tongues he knew, strove to engage him in sustained conversation, but was forced to the conclusion that Welzl was a man with no language of his own and possessed of only a hotchpotch of many. The editors of this, his book, found it necessary to have on hand all the dictionaries they could get of the diverse idioms to which Welzl had recourse while telling his adventures.

His style is plain, naively so; there is no attempt at adornment. The crudeness, and at times brutality, that a hard life has engendered in this good-humored, observant man often presents itself to the reader. His Augean cleansing of the Eskimo's foetid cave,

his penal burning alive of the sellers of poisoned liquor are repulsive even in the telling. Some of the passages will never feature in reports of public lectures on the Eskimo.

From his youth he was a wanderer. It was in the family blood, for his brother was swallowed up in the heart of Australia. As a young man Jan left finally his home in Zabreh, Northern Moravia, to walk to Genoa, whence he left for America. He forsook that country to visit Africa, and then crossed the Indian Ocean to Vladivostok and Irkutsk. Then, after a spell of labor there, he pushed on across Siberia by foot to the Arctic Sea, whose shores were to know him for thirty long years. Trading and hunting as one with the Eskimos, he so gained their esteem as to be elected their judicial chief, an "Arctic Bismarck." Voyaging off the Pacific coast of America, he suffered shipwreck and, being without passport, was escorted to Hamburg. Although a wealthy man, Welzl could do nothing as his estate was thousands of miles away, held by the frozen North. So he shipped to Canada, engaged in trapping there and finally bought his passage home to Czecho-Slovakia.

Some of the book's content will cause the discriminating reader to raise his eyebrows in doubt, if not unbelief. Certain it is, however, that having finished the volume he will agree with the reviewer that he has enjoyed the most extraordinary travel tale yet done into Esperanto. One may question such a story as that of the Malemute Kid and the kangaroo, for one must be permitted to doubt the likelihood of that animal's surviving the bitter Arctic climate. The dogbreeder's perverse experiments are in keeping with the lawless life that characterised the un-

---

## KVAKERISMO KAJ PACO

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

Bonvole petu per ilustrita poŝtkar to aŭ letero. Ankaŭ mi sentus plaĉon ricevi nomojn-adresojn de eventualaj korespondantoj el plej malproksimaj mondpartoj.

DR. FRED. J. WILLIAMS,

Samarai, PAPUA.

(fratorganoj afable represu)

policed wastes of the pre-Soviet North.

The brain-shattering phenomena attendant on the break-up of glacial seas, the dazzling life of Nome and Dawson in the wild days of '98, the hazardous voyage up the Yukon River, the terrors of the Chilcoot Pass and the Whitehorse Rapids, the fever of spirit that lavished fortunes for goods and services in that mad time, are all described with the blank sincerity of one who has thrilled through the reality.

The translation, mirroring faithfully the mannerisms of the simple-souled raconteur, is excellent. The user of the international language has here, indeed, a literary advantage over him that only English knows. The Esperanto edition will doubtless serve in translating this modern Odyssey into the idioms of several of the smaller peoples, among many of whom may well be very few competent to deal with the Czech original.

The book is dedicated to Mr. John Merchant, president of the International Central Committee of the Esperanto Movement. It has 320 pages and costs 5/- unbound, 6/- bound. Published by the Moraviaj Esperanto-Pioniroj, Olomouc, Czechoslovakia.

### KION VI SCIAS. Respondoj.

1. Amundsen.
2. La markolo de Behring; tridek-ses mejloj.
3. Quebec, Kanado.
4. La Statuo de Libereco.
5. Norde de Porto Riko; 31,336 futoj.  
(El "Amerika Esperantisto.")

### "RIMPORTRETOJ."

Galerio de Esperantaj Steloj  
Pentris: K. Kalocsay.

Eldonita de Literatura Mendo,  
Budapest.

Prezo 3s. ĉe B.E.A. Paĝoj 128.

Per lerta mano ĉi tiu riĉrimeda ver-sisto ĉizas la karakteraĵojn de bonekonataj verdanoj, trafe, interese. Kontraŭ la fotoj de 55 pli-malpli eminentaj batalantoj por nia ideo staras koncerna bukedo da belsonaj linioj. Iom mire, ke mankas tiaj nomoj, kiaj Collinson, Warden, Butler, Ŝidlovskaja. 50/51 (legu: Grosjean).

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere. Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A. Skribu al Sekretariino.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro Jas. P. Lauder. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Holmes, D.B.E.A.; sekretariino f-ino V. Cox, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbana Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Belncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.